

HENRIK IBSEN

HEDDA GABLER

Dramo en kvar aktoj

(1890)

Tradukis

Odd Tangerud

Eldonejo: Jec Scandinavia a/s

Postboks 54. N - 3401 Lier

Tlf. 32 85 50 01, Fax. 32 85 50 82

ISBN 82-91707-61-8

ROLOJ:

- JØRGEN TESMAN, stipendiulo pri arthistorio
- SINJORINO HEDDA TESMAN, lia edzino
- FRAŬLINO JULIANE TESMAN, lia onklino
- SINJORINO ELVSTED
- ASESORO BRACK
- EJLERT LØVBORG
- BERTE, servistino en la domo de la geedzoj Tesman

(Brack prononciĝas: *Brak*

Jochum prononciĝas: *Jokum*

ø prononciĝas: franca *eu* aŭ germana *oe*)

(La intrigo okazas en la vilao de **Tesman** en la okcidenta parto de la urbo.)

UNUA AKTO

(Grandspaca, bele kaj elegante meblita salono kun dekoru en malhelaj koloroj. Sur la fona muro estas larĝa pordaperturo kun flankentiritaj kurtenoj. Tiu aperturo kondukas en pli malgrandan ĉambron, meblitan en la sama stilo kia la salono. Sur la dekstra muro de tiu ĉi estas duala pordo, kiu kondukas al la antaŭĉambro. Sur la kontraŭa, maldekstra muro estas vitra pordo, ankaŭ tiu kun flankentirita kurteno. Tra la fenestroj oni vidas parton de ekstera verando kun tegmento kaj foliarboj kun aŭtunaj koloroj. Antaŭe sur la planko staras ovala tablo kovrita de tuko kaj kun seĝoj ĉirkaŭe. Antaŭe sur la dekstra muro estas larĝa, malhela porcelana forno, altdorsa apogseĝo, skabelo kun kuseno kaj du taburetoj. En la dekstra angulo estas angulsofo kaj malgranda ronda tablo. Antaŭe, iom tirita de la muro, estas sofo. Interne apud la vitra pordo estas piano. Ambaŭflanke de la fona pordo staras etaĝeroj kun aĵoj el terakoto kaj majoliko. Ĉe la fona muro de la malantaŭa ĉambro oni vidas sofon, tablon kaj kelkajn seĝojn. Super tiu sofo pendas portreto de belaspekta, maljuna viro en uniformo de generalo. Super la tablo pendas lampo kun neklara, laktokolora, vitra kupolo. — Ĉirkaŭe en la salono estas multaj florbukedoj metitaj en vazojn. Aliaj kuŝas sur la tabloj. Sur la plankoj de ambaŭ ĉambroj kuŝas dikaj tapiŝoj. — Matena lumo. La suno brilas tra la vitra pordo.)

(**Fraŭlino Juliane Tesman**, kun ĉapelo kaj sunombrelo, envenas de la antaŭĉambro, akompanata de **Berte**, kiu portas bukedon, ĉirkaŭvolvitan de papero. **Fraŭlino Tesman** estas bonaspekta kaj bonanima sinjorino de proksimume 65 jaroj. Belete sed simple vestita en griza promena vesto. **Berte** estas iom aĝa servistino kun ordinara kampara aspekto.)

FRAŬLINO TESMAN

(haltas interne de la pordo, aŭskultas kaj diras mallaŭte) Vere mi kredas, ke ili ankoraŭ ne ellitiĝis.

BERTE

(same mallaŭte) Estas ja kiel mi diris, fraŭlino. Pensu, — tiom malfrue kiom la vaporŝipo alvenis en la nokto. Kaj jen poste! Dio mia, — kiom la juna sinjorino volis elpaki, antaŭ ol sin retiri por ripozi.

FRAŬLINO TESMAN

Jes, ja, — lasu ilin nur bone ripozi. Sed freŝan matenan aeron ili almenaŭ havu enen al si, kiam ili venos. (ŝi iras al la vitra pordo kaj tute malfermas ĝin)

BERTE

(apud la tablo, iom konfuzita kun la bukedo en la mano) Honto al mi se plu estas konvena loko. Mi opinias, ke mi metu ĝin ĉi tien, fraŭlino. (metas la bukedon antaŭe sur la pianon)

FRAŬLINO TESMAN

Do nun vi havas novajn gemastrojn, mia kara Berte. Dio sciu, ke estis por mi pli ol zorgoplene rezigni pri vi.

BERTE

(plorprete) Tamen pri mi, fraŭlino! Kion mi diru? Mi, kiu dum tiom da jaroj estis en la servo de la fraŭlinoj.

FRAŬLINO TESMAN

Ni devas trankvile akcepti la staton. Vere estas nenio alia farebla. Vidu, Jørgen *devas* havi vin en la domo ĉe si. Li devas. Vi ja kutimiĝis mastrumi por li ek de kiam li estis knabeto.

BERTE

Jes, sed tamen, fraŭlino, mi tiom zorge pensas pri ŝi, kiu kuŝas hejme. Kompatinda ŝi, kiu mem estas tute senhelpa. Kaj jen kun la nova servistino! Neniam en la mondo lernas ŝi kontentigi al la bezonoj de tiu malsana homo.

FRAŬLINO TESMAN

Nu, mi certe sukcesos instrui ŝin al tio. Kaj la plimulton mi kompreneble prenos sur min mem. Pro mia malfeliĉa fratino vi ne bezonas maltrankviliĝi, mia kara Berte.

BERTE

Nu jes, sed estas ankaŭ alia afero, fraŭlino. Mi multe timas, ke mi ne povos sufiĉe kontentigi al la juna sinjorino.

FRAŬLINO TESMAN

Nu bona Dio, — en la unua tempo eble okazos io tia.

BERTE

Ĉar aspekte ŝi estas tre pretendema.

FRAŬLINO TESMAN

Kompreneble. Filino de generalo Gabler. Kaj pripensu al kio ŝi estis kutimita dum la generalo vivis. Ĉu vi memoras, kiam ŝi kune kun sia patro rajdis laŭ la vojo? En la longa, nigra draprobo? Kaj kun plumo en la ĉapelo?

BERTE

Jes, jes, — estu certa! — Sed vere mi ne tiam imagis, ke fariĝus paro el ŝi kaj la kandidato.

FRAŬLINO TESMAN

Ankaŭ mi ne. — Sed atentu — Berte, — dum mi memoras: De nun vi ne titolu Jørgen kandidato. Vi devas diri “la doktoro”.

BERTE

Jes, ankaŭ la juna sinjorino menciis tion — ĉinokte, — ĵus kiam ili envenis la pordon. Ĉu vere *estas* tiel, fraŭlino?

FRAŬLINO TESMAN

Jes, efektive estas tiel. Imagu, Berte, — ili faris lin doktoro eksterlande. Nun dum la vojaĝo, komprenu. Pri tio mi aŭdis eĉ ne vorteton, — antaŭ ol li mem rakontis tie malsupre sur la ŝipkajo.

BERTE

Jes, ja, li certe kapablas fariĝi kio ajn. Tiom lerta kiom *li* estas. Sed mi neniam kredis, ke li ankaŭ volis komenci kuraci homojn.

FRAŬLINO TESMAN

Ne, ne estas tia doktoro, kia li fariĝis. — (kapskuas signifoplene) Tamen baldaŭ vi eble nomu lin io alia, kio estas ankoraŭ pli grandioza.

BERTE

Ĉu vere! Kio estos tio, fraŭlino?

FRAŬLINO TESMAN

(ridetas) Hm, — nu, tion vi sciis! (emociita) Aj, Dio mia, — se karmemora Jochum povus rigardi el sia tombo, kaj vidi, kio fariĝis el lia knabeto! (ĉirkaŭrigardas) Sed aŭskultu, Berte, — kial vi *jenon* faris? — Forprenis la kovraĵojn de ĉiuj mebloj?

BERTE

Sinjorino diris, ke mi tion faru. Ŝi ne ŝatas kovraĵojn sur la seĝoj, ŝi diris.

FRAŬLINO TESMAN

Ĉu ili do uzos ĉi tiun ĉambron — ĉiutage?

BERTE

Jes, ŝajne. Almenaŭ laŭ Sinjorino. Ĉar li mem, — la doktoro, — li nenion diris.

(**Jørgen Tesman** venas kantetante de la dekstra flanko de la malantaŭa ĉambro, portante malplenan, malfermitan valizon. Li estas mezstatura, juneca viro de 33 jaroj, iom diketa, kaj kun fidema, ronda, kontenta vizaĝo, blondaj haroj kaj barbo. Li portas okulvitrojn, kaj estas vestita en komforta, iom neglektema hejma vestaĵo.)

FRAŬLINO TESMAN

Bonan matenon, bonan matenon, Jørgen!

TESMAN

(ĉe la pordo) Onklino Julle! Kara onklino Julle! (proksimiĝas kaj vigle agitas ŝian manon) Vi, ĉi tie — tiom frue en la tago! Ĉu?

FRAŬLINO TESMAN

Jes, kompreneble ke mi devis fari etan viziton al vi.

TESMAN

Kaj tio eĉ se vi ne havis sufiĉan ripozon dum la nokto!

FRAŬLINO TESMAN

Ho, neniel afektas min.

TESMAN

Nu, cetere vi venis bone hejmen de la kajo? Ĉu?

FRAŬLINO TESMAN

Jes, vere mi faris, — dank' al Dio. La asesoro ĝentile akompanis min ĝis la pordo.

TESMAN

Domaĝe ke ni ne povis kunpreni vin en la veturilo. Sed vi ja mem vidis —. Hedda havis tiom da skatoloj, kiujn ni devis kunpreni.

FRAŬLINO TESMAN

Jes, vere ege multe da skatoloj ŝi havis.

BERTE

(al Tesman) Eble mi eniru por demandi Sinjorinon, ĉu estus io pri kio mi povus ŝin helpi?

TESMAN

Ne, dankon, Berte, — vi ne faru. Se ŝi ion deziras, ŝi sonorigos, ŝi diris.

BERTE

(dekstren) Nu tiel.

TESMAN

Sed jen, — kunprenu tiun ĉi valizon.

BERTE

(prenas ĝin) Mi metos ĝin en la subtegmentejon.

(Ŝi eliras tra la pordo de la antaŭĉambro.)

TESMAN

Imagu, onklino, — tiun valizon mi havis tute plenŝtopita de nuraj kopioj. Estas nekredeble kiom mi sukcesis kolekti en la arkivoj. Malnovaj, strangaj dokumentoj pri kiuj neniuj ion sciis —

FRAŬLINO TESMAN

Jes certe, vi ne malŝparis vian tempon dum la nuptovojaĝo, vi, Jørgen.

TESMAN

Ne, tion mi ja povas diri. Sed demetu vian ĉapelon. Jen! permesu al mi malnodi la banton. Ĉu?

FRAŬLINO TESMAN

(dum li tion faras) Ho Dio mia, — tio ĉi estas ja kvazaŭ vi ankoraŭ estus hejme ĉe ni.

TESMAN

(turnas la ĉapelon en sia mano) Jen, — kian belan, grandiozan ĉapelon vi havigis al vi!

FRAŬLINO TESMAN

Mi aĉetis ĝin pro Hedda.

TESMAN

Pro Hedda? Ĉu?

FRAŬLINO TESMAN

Jes, por ke Hedda ne hontu pri mi, kiam ni kune promenos surstrate.

TESMAN

(karese frapetas ŝian vangon) Vi ja pensas pri ĉio, vi, onklino Julle! (metas la ĉapelon sur seĝon ĉe la tablo) Kaj nun, — jen, — ni eksidu ĉi tie en la sofo. Kaj iom babilu ĝis Hedda venos.

(Ili sidigas sin; ŝi metas sian sunombreton en la angulon de la sofo.)

FRAŬLINO TESMAN

(prenas ambaŭ liajn manojn kaj rigardas lin) Kiom benate bone estas denove havi vin vigle vivanta antaŭ miaj okuloj, Jørgen! Ho vi, filo de nia karmemora Jochum!

TESMAN

Kaj kiom por mi! Ree rigardi vin, onklino Julle! Vin, kiu estis por mi kaj patro kaj patrino.

FRAŬLINO TESMAN

Jes, mi certe scias, ke vi daŭre amos viajn maljunajn onklojn.

TESMAN

Sed estas do neniu plibonigo por onklino Rina. Ĉu?

FRAŬLINO TESMAN

Ho ne, kara, — estas ja neniu plibonigo atendebla por ŝi, povrulino. Ŝi kuŝas tiel, kiel ŝi kuŝis dum tiuj multaj jaroj. Sed Dio permesu al mi havi ŝin ankoraŭ iom da tempo! Ĉar alie mi ne scias por kio vivi, Jørgen. Eĉ pli nun, komprenu, kiam mi ne plu havas vin por kiu mastrumi.

TESMAN

(frapetas ŝian dorson) Nu, nu, nu, —!

FRAŬLINO TESMAN

(abrupte ŝanĝas temon) Kaj jen eĉ imagi ke vi estas edziĝinta viro, Jørgen! — Kaj ke estas vi, kiu kaptis Hedda Gabler! La ĉarmegan Hedda Gabler. Jen imagu! Ŝi, kiu havis tiom da amindumantoj ĉirkaŭ si!

TESMAN

(kantetas kaj ridetas kontente) Jes, mi vere kredas ke mi havas sufiĉe da bonaj amikoj promenantaj en la urbo, kiuj min envias. Ĉu ne?

FRAŬLINO TESMAN

Kaj ke vi ankaŭ povis fari tian longan nuptovojaĝon! Pli ol kvin, — preskaŭ ses monatojn —

TESMAN

Nu, — por mi estis ja ia studvojaĝo samtempe. Kiom da arkivoj kiom mi devis ekzameni! Kaj kiom da libroj kiom mi devis tralegi, kara!

FRAŬLINO TESMAN

Nu jes, tiel do estas. (pli intime kaj iom mallaŭte) Sed aŭskultu nun, Jørgen, — ĉu vi ne havas ion — ion kroman rakontindan?

TESMAN

De la vojaĝo?

FRAŬLINO TESMAN

J-e-e-s.

TESMAN

Ne, mi ne scias pri io alia ol tio, kion mi rakontis al vi en la leteroj. Ke mi ricevis la doktoran rangon tie sude — tion mi ja rakontis al vi hieraŭ.

FRAŬLINO TESMAN

Jes, tiaj aferoj, jes. Sed mi pensas, — ĉu vi ne havas iujn, — iujn tiajn — esperojn —?

TESMAN

Esperojn?

FRAŬLINO TESMAN

Dio mia, Jørgen, — mi ja estas via maljuna onklino!

TESMAN

Jes certe mi havas esperojn, ho jes.

FRAŬLINO TESMAN

Nu?

TESMAN

Mi havas ja la plej bonajn esperojn fariĝi profesoro post nelonge.

FRAŬLINO TESMAN

Jes, profesoro, jes —

TESMAN

Aŭ, — mi povas rekte diri, ke mi certe scias, ke mi fariĝos. Sed kara, bona onklino Julle, — tion vi ja mem bone scias!

FRAŬLINO TESMAN

(ridetante) Jes, certe mi scias. Vi pravas. (ŝanĝas temon) — Sed ni parolis pri la vojaĝo. — Ĝi certe postulis multe da mono, Jørgen?

TESMAN

Nu, bona Dio, — la granda stipendio helpis ja longe.

FRAŬLINO TESMAN

Sed mi vere ne komprenas, ke ĝi estis sufiĉa por du.

TESMAN

Ne, ne. Tio ne estas facile komprenebla. Ĉu?

FRAŬLINO TESMAN

Kaj aldone *tio*, ke estas sinjorino, kun kiu oni vojaĝas. Ĉar tio estas ekstreme pli multekosta, laŭdire.

TESMAN

Jes, kompreneble, — iom pli multekosta tio ja estas. Sed Hedda *devis* havi tiun vojaĝon, onklino! Ŝi vere *devis*. Io alia ne konvenus.

FRAŬLINO TESMAN

Ne, ne, ja ne konvenus. Ĉar nuptovojaĝo estas ja kutimo nuntempe. — Sed diru nun, — ĉu vi jam sufiĉe trarigardis la apartamenton?

TESMAN

Ho jes, kredu. Mi jam estis surpiede de post heliĝo.

FRAŬLINO TESMAN

Kaj kiel ĉio al vi plaĉas?

TESMAN

Bonege! Tute bonege! Estas nur tio kion mi ne komprenas, por kio ni uzu la du malplenajn ĉambrojn, kiuj situas inter jena malantaŭa ĉambro kaj la dormoĉambro de Hedda?

FRAŬLINO TESMAN

(ridetas) Ho, mia kara Jørgen, tiujn vi certe bezonos — post iom da tempo.

TESMAN

Jes, certe vi pravas, onklino Julle! Ĉar kiam mia libraro kreskos, tiam —. Ĉu?

FRAŬLINO TESMAN

Ĝuste, mia kara knabo. Ĝuste pri via libraro mi pensis.

TESMAN

Plej kontenta mi ja estas pro Hedda. Antaŭ nia fianĉiĝo, ŝi ja ofte diris, ke ŝi nenie ŝatus loĝi krom en la vilao de ministrino Falk.

FRAŬLINO TESMAN

Jen imagu, — ke okazis, ke ĝi estis por vendo. Ĵus post via foriro.

TESMAN

Jes, onklino Julle, bonŝanco akompanis nin. Ĉu?

FRAŬLINO TESMAN

Sed multekoste, mia kara Jørgen! Multekoste estos por vi, — ĉio ĉi.

TESMAN

(rigardas ŝin iom timeme) Jes, eble fariĝos, onklino?

FRAŬLINO TESMAN

Ho, granda Dio!

TESMAN

Kiom, vi opinias? Proksimume? Ĉu?

FRAŬLINO TESMAN

Ne, tio neblas por mi scii antaŭ ol ni estos ricevintaj ĉiujn fakturojn.

TESMAN

Nu, feliĉe ke asesoro Brack akiris avantaĝajn kondiĉojn por mi. Tion li mem skribis en letero al Hedda.

FRAŬLINO TESMAN

Jes ja, pri tio neniam timu, mia knabo. — Krome por mebloj kaj tapiŝoj mi garantiis.

TESMAN

Garantiis? Vi? Kara onklino Julle, — kian garantion povis *vi* doni?

FRAŬLINO TESMAN

Mi asignis miajn rentojn.

TESMAN

(eksaltas) Kion! Viajn — kaj la rentojn de onklino Rina!

FRAŬLINO TESMAN

Jes, mi ne trovis alian eblecon, kara.

TESMAN

(starigas sin antaŭ ŝin) Sed ĉu vi tute freneziĝis, onklino! Tiuj rentoj, — estas ja la sola vivtenado por vi kaj onklino Rina.

FRAŬLINO TESMAN

Nu, nu, — ne ekscitiĝu pro tio. Estas ja nur afero de formo, komprenu. Tion ankaŭ

diris asesoro Brack. Ĉar estas li, kiu tiom bonvoleme ordigis ĉion por mi. Nur afero de formo, li diris.

TESMAN

Jes, eble bone. Sed tamen —

FRAŬLINO TESMAN

Ĉar nun vi ja ricevos vian propran salajron por pagi. Kaj, Dio mia, eĉ se ni devus iom elspezi —? Iom aldoni komence —? Estus ja nur ia feliĉo por ni.

TESMAN

Ho, onklino, — neniam vi laciĝas oferi vin por mi!

FRAŬLINO TESMAN

(ekstaras kaj metas siajn manojn sur liajn ŝultrojn) Ĉu mi do havas iun alian ĝojon en tiu ĉi mondo, krom ebenigi la vojon por vi, mia kara knabo? Vi, kiu havis nek patron nek patrino al kiuj vin teni. Kaj nun ni staras ĉe la celo, kara! Aspektis malespere kelkfoje. Sed, bona Dio, nun vi superas, Jørgen!

TESMAN

Jes, estas strange kiel ĉio aranĝis sin avantaĝe.

FRAŬLINO TESMAN

Jes, — kaj tiuj, kiuj kontraŭstaris vin — kaj volis bari al vi la vojon, — ili devas nun resti sube. Ili falis, tiuj, Jørgen! Tiu kiu estis por vi la plej danĝera, — li falis plej fatale, li. — Kaj nun li kuŝas tiel, kiel li por si sternis, — povra, miskonduta homo.

TESMAN

Ĉu vi ion aŭdis pri Ejler? Nome post kiam mi forvojaĝis?

FRAŬLINO TESMAN

Nenion krom tio ke li eldonus novan libron.

TESMAN

Kion? Ejler Løvborg? Ĵus nun? Ĉu?

FRAŬLINO TESMAN

Jes, tion oni diras. Dio scias ĉu ĝi ion valoras, ĉu? Ne, sed kiam la *via nova* libro aperos, — tio estos ja io alia, Jørgen! Pri kio ĝi temos?

TESMAN

Ĝi temos pri la hejma industrio en Brabant en la Mezepoko.

FRAŬLINO TESMAN

Jen, imagu, — ke vi povas skribi ankaŭ pri tia temo!

TESMAN

Cetere eble daŭros ankoraŭ longe pri tiu libro. Mi havas ja tiujn kompleksajn kolektojn, kiujn mi devas unue ordigi, komprenu.

FRAŬLINO TESMAN

Jes, ordigi kaj kolekti, — tion vi vere scipovas. Ne vane vi estas la filo de karmemora Jochum.

TESMAN

Mi tre antaŭĝojas komenci pri tio. Precipe nun, kiam mi ekhavis mian propran domon kaj hejmon kie labori.

FRAŬLINO TESMAN

Kaj antaŭ ĉio nun, kiam vi gajnis ŝin, kiun via koro sopiris, kara Jørgen.

TESMAN

(ĉirkaŭbrakas ŝin) Ho jes, jes, onklino Julle! Hedda, — ŝi estas ja la plej ŝatinda el ĉio! (rigardas al la pordo) Jen mi kredas, ke ŝi venas. Ĉu?

(**Hedda** venas de maldekstre tra la malantaŭa ĉambro. Ŝi estas sinjorino de proksimume 29 jaroj. Vizaĝo kaj staturo aspektas noble. La koloro de la haŭto iom pala. La okuloj estas ŝtalgrizaj kaj esprimas malvarman, serenan trankvilon. La hararo estas bele bruneta, sed ne tre densa. Ŝi estas vestita en eleganta, libere pendanta antaŭtagmeza kostumo.)

FRAŬLINO TESMAN

(iras al Hedda renkonte) Bonan matenon, kara Hedda! Kore al vi bonan matenon!

HEDDA

(donas al ŝi la manon) Bonan matenon, kara fraŭlino Tesman! Vizitante tiom frue? Estas ja tre afable.

FRAŬLINO TESMAN

(aspektas iom ĝenata) Nu, — ĉu la juna sinjorino bone dormis en sia nova hejmo?

HEDDA

Nu ja, dankon! Elteneble.

TESMAN

(ridas) Elteneble! Jen, jen, vi trovas esprimon, Hedda! Vi vere dormis profunde kiel ŝtono, kiam mi ellitiĝis.

HEDDA

Feliĉe. Krome oni devas ja sin kutimigi al ĉio nova, fraŭlino Tesman. Iom post iom. (rigardas maldekstren) Hu, — jen la ĉambristino lasis la pordon de la altano malferma. Enondas kvazaŭ maro da suno.

FRAŬLINO TESMAN

(iras al la pordo) Nu, do ni ĝin fermu.

HEDDA

Ne, ne, tion ne! Kara Tesman, kuntiru la kurtenojn. Tio donas pli malakran lumon.

TESMAN

(ĉe la pordo) Nu jes, — nu jes. Jen, Hedda, — nun vi havas ombron kaj ankaŭ freŝan aeron.

HEDDA

Jes, freŝa aero estas ĉi tie vere bezonata. Ĉiuj tiuj benitaj floroj —. Sed, kara, — bonvolu preni sidlokon, fraŭlino Tesman!

FRAŬLINO TESMAN

Ne, dankon. Nun mi ja scias, ke ĉio statas bone, — dank' al Dio! Kaj nun mi devas trovi mian vojon hejmen. Al ŝi, kiu kuŝas kaj sopire atendas, la kompatinda.

TESMAN

Do vi kore salutu ŝin multfoje de mi. Kaj diru al ŝi, ke mi faros viziton al ŝi iom poste hodiaŭ.

FRAŬLINO TESMAN

Jes, ja, tion mi faros. Sed jen atentu, Jørgen — (serĉas en la poŝo de sia robo) Tion mi preskaŭ forgesis. Jen io kion mi kunportis por vi.

TESMAN

Kio estas do tio, onklino? Ĉu?

FRAŬLINO TESMAN

(eltiras platan paketon en gazetpapero kaj donas ĝin al li) Jen, mia kara knabo.

TESMAN

(elpakas) Ho, bona Dio, — ĉu vi vere gardis ilin por mi, onklino Julle! Hedda! Estas vere kortuŝe, kara! Ĉu?

HEDDA

(ĉe la etaĝeroj dekstre) Jes, kara, kio do estas?

TESMAN

Miaj malnovaj matensuoj! La pantofloj, vidu!

HEDDA

Nu do. Mi memoras, ke vi ofte parolis pri ili dum la vojaĝo.

TESMAN

Jes, mi vere sentis la mankon de ili. (proksimiĝas al ŝi) Jen, rigardu ilin, Hedda!

HEDDA

(iras al la forno) Ne, dankon, ili vere ne interesas min.

TESMAN

(postsekvas ŝin) Imagu — tiujn onklino Rina brodis por mi kuŝante en sia lito. Eĉ malsana kia ŝi estis. Ho, vi ne povas imagi, kiom da memoroj ili revokas.

HEDDA

(ĉe la tablo) Efektive ne por mi.

FRAŬLINO TESMAN

Pri tio Hedda ja pravas, Jørgen.

TESMAN

Jes, sed mi opinias, ke nun, kiam ŝi apartenas al la familio —

HEDDA

(interrompante) Kun tiu ĉambristino ni certe neniam interakordos, Tesman.

FRAŬLINO TESMAN

Ne interakordos kun Berte?

TESMAN

Kara, — kial vi *tiel* ekpensas? Ĉu?

HEDDA

(montras) Jen rigardu! Tie ŝi postlasis sian malnovan ĉapelon sur la seĝo.

TESMAN

(konsternita, perdas la pantoflojn sur la plankon) Tamen Hedda do —!

HEDDA

Imagu, — se iu venus kaj tiaĵon vidus.

TESMAN

Tamen, Hedda, estas ja la ĉapelo de onklino Julle!

HEDDA

Ĉu?

FRAŬLINO TESMAN

(prenas la ĉapelon) Jes vere, ĝi estas mia. Kaj cetere ĝi ne estas malnova, kara sinjorineto Hedda.

HEDDA

Mi vere ne proksime rigardis ĝin, fraŭlino Tesman.

FRAŬLINO TESMAN

(ligas la ĉapelon sur sin) KREDU min, vere la unuan fojon mi nun portas ĝin. Jes, Dio scias ke tiel estas.

TESMAN

Kaj grandioza ĝi estas. Vere grandioza!

FRAŬLINO TESMAN

Nu, ne bombastu, mia kara Jørgen. (ĉirkaŭrigardas) La sunombreton —? Nu, jen. (prenas ĝin) Ĉar ankaŭ tiu estas mia. (grumbletas) Ne tiu de Berte.

TESMAN

Novan ĉapelon kaj novan sunombreton! Jen, Imagu, Hedda!

HEDDA

Belaj, eĉ belegaj ili estas.

TESMAN

Jes, ĉu ne? Ĉu? Sed onklino, pririgardu nun vere Hedda antaŭ ol vi foriros! Vidu kiom belega ŝi estas!

FRAŬLINO TESMAN

Ho, kara, *tio* estas ja nenio nova. Hedda estis ja ĉarmega ĉiujn siajn tagojn. (ŝi kapsalutas kaj foriras dekstren)

TESMAN

(sekvas ŝin) Jes, sed ĉu vi rimarkis ke ŝi fariĝis iomete korpulenta kaj floranta? Kiom ŝi ete dikiĝis dum la vojaĝo?

HEDDA

(transpaŝas la plankon) Ho, lasu nun tion —!

FRAŬLINO TESMAN

(haltas kaj sin turnas) Dikiĝis?

TESMAN

Jes, onklino Julle, vi ne povas tion bone vidi nun, kiam ŝi portas tiun robon. Sed *mi*, kiu havas okazon —

HEDDA

(ĉe la vitra pordo, senpacience) Ho, vi ne havas okazon al io ajn!

TESMAN

Certe estas la montara aero tie sude en Tirolo —

HEDDA

(abrupte, interrompante) Mi estas nun ĝuste tia, kia mi estis je la forvojaĝo.

TESMAN

Jes, tion vi pretendas, vi. Sed honto al mi se vi estas. Ĉu ne ankaŭ al vi tiel aspektas, onklino?

FRAŬLINO TESMAN

(kunplektas la manojn kaj rigardas ŝin) Rava, — rava, — rava estas Hedda. (iras al ŝi, per ambaŭ manoj klinigas ŝian kapon, kaj kisas ŝian hararon) Dio benu kaj gardu Hedda Tesman. Pro Jørgen.

HEDDA

(sin zorgeme deŝirante) Ho —! Lasu min nun.

FRAŬLINO TESMAN

(en kvieta kortuŝo) Ĉiun opan tagon mi enrigardos ĉe vi du.

TESMAN

Jes, tion faru, onklino. Ĉu?

FRAŬLINO TESMAN

Adiaŭ, adiaŭ!

(Ŝi eliras tra la pordo de la antaŭĉambro. **Tesman** akompanas ŝin elen. La pordo restas malferma. Oni aŭdas **Tesman** ripeti siajn salutojn al onklino **Rina**, kaj danki pro la matenŝuoj)

(Samtempe **Hedda** iras tien kaj reen sur la planko, suprenlevas la brakojn, pugnigas la manojn kvazaŭ en kolero. Ŝi tiras la kurtenojn for de la vitra pordo, restas tie staranta, kaj elrigardas.)

(Iom poste **Tesman** ree envenas kaj fermas la pordon post si.)

TESMAN

(prenas la pantoflojn de la planko) Al kio estas vi rigardanta, Hedda?

HEDDA

(denove trankvila kaj sinrega) Mi simple staras rigardante la foliaron. Ĝi estas tre flava. Kaj kiom velka!

TESMAN

(enpakas la ŝuojn kaj metas ilin sur la tablon) Jam estas ja Septembro.

HEDDA

(denove maltrankvila) Jes, pensu, — jam estas — estas Septembro.

TESMAN

Ĉu vi ne trovas, ke onklino Julle aspektis tre strange? Preskaŭ solene? Ĉu vi povas kompreni ŝian konduton? Ĉu?

HEDDA

Mi apenaŭ konas ŝin. Ĉu ŝi ne ofte estas tia?

TESMAN

Ne, ne kia hodiaŭ.

HEDDA

(iras for de la vitra pordo) Ĉu vi kredas, ke ŝi sentas sin afliktita pro tio pri la ĉapelo?

TESMAN

Eh, ne multe. Eble iom en la momento —

HEDDA

Sed kia maniero estas do tio, deĵeti la ĉapelon ĉi tie en la salono. Tio ne estas kutimo.

TESMAN

Nu, vi povas esti certa, ke onklino Julle tion neniam plu faros.

HEDDA

Cetere mi certe trankviligos ŝin.

TESMAN

Jes, kara, kara Hedda, se vi tion volus!

HEDDA

Kiam vi iros al ili poste hodiaŭ, vi povos ja inviti ŝin ĉe ni por la vespero.

TESMAN

Jes, tion mi efektive faros. Kaj estas ankaŭ alia afero, per kiu vi povus ege ĝojigi ŝin.

HEDDA

Nu?

TESMAN

Se vi nur povus decidigi vin familiane alparoli ŝin. Pro mi, Hedda? Ĉu?

HEDDA

Ne, ne, Tesman — je Dio, ne petu min pri tio. Mi tion al vi diris iam antaŭe. Mi provos nomi ŝin onklino. Kaj tio sufiĉu.

TESMAN

Nu do tiel. Sed mi opinias, ke nun, kiam vi apartenas al la familio, nun —

HEDDA

Hm, — mi ne ĝuste scias ĉu —

(Ŝi iras trans la plankon al la porda aperturo.)

TESMAN

(iom poste) Ĉu io estas al vi, Hedda? Ĉu?

HEDDA

Mi ja rigardas mian malnovan pianon. Ĝi ne bone harmonias kun la aliaj mebloj.

TESMAN

La unuan fojon kiam mi ricevos salajron, mi aranĝu por ĝin ŝanĝi.

HEDDA

Ne, ne, — ne ŝanĝi. Mi ne volas malhavi ĝin. Prefere ni metu ĝin tien en la malantaŭan ĉambron. Kaj anstataŭe ni povos havi alian ĉi tie. Laŭokaze, mi opinias.

TESMAN

(iom embarasita) Jes, — tion ni ja povos fari.

HEDDA

(prenas la bukedon de sur la piano) Tiuj floroj ne estis ĉi tie ĉinokte, kiam ni venis.

TESMAN

Eble onklino Julle kunportis ilin por vi.

HEDDA

(rigardas en la bukedon) Vizitkarton. (elprenas ĝin kaj legas) “Revenos iom poste”. Ĉu vi povas diveni de kiu?

TESMAN

Ne. De kiu do? Ĉu?

HEDDA

Estas subskribite “Sinjorino notario Elvsted”.

TESMAN

Ĉu vere? Sinjorino Elvsted! Fraŭlino Rysing, kiel ŝi nomiĝis antaŭe.

HEDDA

Jes, ĝuste. Tiu kun la iritanta hararo, per kiu ŝi parade sensaciis. Via antaŭa flamo, laŭdire.

TESMAN

(ridas) Nu, ne daŭris longe. Kaj estis ja antaŭ ol mi konatiĝis kun vi, Hedda. Sed imagu, — ke ŝi estas en la urbo.

HEDDA

Strange ke ŝi vizitas nin. Mi konas ŝin ja nur de la instituto.

TESMAN

Jes, mi vere ne vidis ŝin de post — Dio scias, kiom da tempo. Strange ke ŝi eltenas tie norde en tia izolejo. Ĉu?

HEDDA

(iom pripensas kaj subite diras) Aŭdu, Tesman, — ĉu ne estas tie norde, ke li loĝas, — tiu, — Ejler Løvborg?

TESMAN

Jes, estas ĝuste norde en tiu regiono.

(**Berte** venas ĉe la pordo de la antaŭĉambro)

BERTE

Sinjinino, nun ŝi revenis, tiu sinjinino, kiu antaŭ iom da tempo enigardis kaj donis florojn. (montras) Tiujn, kiujn Sinjinino tenas.

HEDDA

Aha, ŝi venis? Jes, envenigu ŝin.

(**Berte** malfermas la pordon por **sinjinino Elvsted**, kaj mem eliras. — **Sinjinino Elvsted** estas stature svelta kun belaj, molaj vizaĝtraĵoj. Helbluaj okuloj, grandaj, rondaj kaj iom elstarantaj, kun timema, demanda esprimo. La hararo estas frapante hela, preskaŭ blankeflava, kaj neordinare riĉa kaj ondanta. Ŝi estas nur paron da jaroj pli juna ol **Hedda**. La vestaĵo estas malhela vizitkostumo, eleganta, sed ne tute laŭ la plej nova modo.)

HEDDA

(proksimiĝas amike) Bonan tagon, kara sinjinino Elvsted. Ŝatinde foje revidi vin.

ELVSTED

(nervoza, provas regi sin) Jes, estas longa tempo post kiam ni laste renkontiĝis.

TESMAN

(donas al ŝi la manon) Kaj same ni du. Ĉu?

HEDDA

Dankon pro viaj ravaj floroj —

ELVSTED

Ho, mi petas —. Mi volis viziti vin jam hieraŭ posttagmeze. Sed mi sciiĝis, ke vi estas for, vojaĝante —

TESMAN

Vi ĵus venis urben? Ĉu?

ELVSTED

Mi venis ĉi tien hieraŭ tagmeze. Ho, mi vere malesperis, kiam mi aŭdis, ke vi ne estas hejme.

HEDDA

Malesperis! Kial do?

TESMAN

Sed bona, kara sinjorino Rysing — sinjorino Elvsted mi volus diri —

HEDDA

Espereble ne estas malbono okazonta?

ELVSTED

Vere estas. Kaj mi konas eĉ ne unu homon ĉi tie, al kiu mi povus min turni.

HEDDA

(metas la florbukedon sur la tablon) Venu, — kaj ni eksidu ĉi tien sur la sofon —

ELVSTED

Ho, mi havas eĉ ne momentan kvieton sidi!

HEDDA

Certe vi havas. Nu, venu.

(Ŝi tiras **sinjorinon Elvsted** malsupren sur la sofon, kaj eksidas apud ŝi.)

TESMAN

Nu? Kaj kio, Sinjorino —?

HEDDA

Ĉu io eksterordinara okazis tie norde ĉe vi?

ELVSTED

Jes, — okazis kaj ne okazis. Ho, — mi ege dezirus, ke vi ne min miskomprenu —

HEDDA

Sekve vi vere plej saĝe faros malkaŝe rakonti, sinjorino Elvsted.

TESMAN

Ĉar estas ja pro tio, ke vi venas. Ĉu?

ELVSTED

Jes, ja, estas ja pro tio. Kaj jenon mi devas diri al vi, sinjorino, — se vi tion ne jam scias, — ke ankaŭ Ejler Lønborg estas en la urbo.

HEDDA

Løvborg estas —!

TESMAN

Ĉu vere! Ejler Løvborg revenis! Jen imagu, Hedda!

HEDDA

Ho Dio, mi ja aŭdas.

ELVSTED

Li jam estas ĉi tie dum semajno. Imagu tion — tutan semajnon! En ĉi danĝera urbo. Sola! Kun aro de malbona societo troviĝanta ĉi tie.

HEDDA

Sed kara sinjorino Elvsted, — kiel *li* vere koncernas vin?

ELVSTED

(rigardas ŝin timeme kaj diras rapide) Li estis instruisto por la infanoj.

HEDDA

Por viaj infanoj?

ELVSTED

Por tiuj de mia edzo. Mi neniujn havas.

HEDDA

Do, por la edzinfanoj.

ELVSTED

Jes.

TESMAN

(iom hezitante) Ĉu li estis tiom, — mi ne scias kiel min esprimi, — tiom — regula en vivo kaj konduto, ke oni povis dungi lin al tio? Ĉu?

ELVSTED

Dum la lastaj kelkaj jaroj li nenion mallaŭdindan faris.

TESMAN

Vere ne? Jen imagu, Hedda!

HEDDA

Mi aŭdas.

ELVSTED

Eĉ ne ereton, mi asertas al vi, sinjoro! En neniŭ rilato. Sed tamen —. Nun, kiam mi scias, ke li estas ĉi tie — en la granda urbo —. Kaj kun tiom da mono en la manoj. Nun mi morte timas pro li.

TESMAN

Sed kial li ne prefere restis tie norde, kie li estis? Ĉe vi kaj via edzo? Ĉu?

ELVSTED

Kiam la libro estis eldonita, li ne plu kontentiĝis en kvieto tie fore ĉe ni.

TESMAN

Jes vere, — onklino Julle diris, ke li eldonis novan libron.

ELVSTED

Jes, grandan, novan libron, kiu temas pri la kultura progreso — tiel iom ĝenerale. Okazis antaŭ dek kvar tagoj. Kaj ĉar la publiko ĝin aĉetis kaj legis tiom avide — kaj ĝi vekis tian grandan atenton —

TESMAN

Nu, jenon ĝi do faris? Do certe estas io, kion li havis kŭsanta ĉe si de la bonaj tagoj.

ELVSTED

De pli frue, vi opinias?

TESMAN

Nu jes.

ELVSTED

Ne, li ĉion skribis norde ĉe ni. Nun — la lastan jaron.

TESMAN

Vere ĝojige aŭdi. Hedda! Jen imagu!

ELVSTED

Ah jes, se nur daŭrus.

HEDDA

Ĉu vi renkontis lin ĉi tie?

ELVSTED

Ankoraŭ ne. Mi tiom klopodis trovi lian adreson. Sed ĉi-matene mi fine sukcesis.

HEDDA

(rigardas ŝin esplore) Vere mi opinias, ke estas strange de via edzo — hm —

ELVSTED

(skuiĝas nervoze) De mia edzo! Kio?

HEDDA

Ke li sendas *vin* al la urbo en tia komisio. Ke li ne mem iras por atenti sian amikon.

ELVSTED

Ho ne, ne, — mia edzo ne havas tempon por tio. Kaj estas ankaŭ — kelkaj aĉetoj, kiujn mi devus fari.

HEDDA

(ridetas supraĵe) Do, tio estas ja alia afero.

ELVSTED

(ekstaras maltrankvila) Kaj nun mi humile petas vin, sinjoro Tesman, amike akceptu Ejlert Lønborg, se li vizitos vin! Kaj tion li certe faros. Bona Dio, — vi du estis ja tiom bonaj amikoj pasinte. Estas ja ĝuste la samaj studoj, kiujn vi ambaŭ faras. La samaj sciencoj, — laŭ mia kompreno.

TESMAN

Nu, tiel estis ja almenaŭ pasinte.

ELVSTED

Jes, kaj tial mi insiste petas vin, ke vi absolute — ankaŭ vi — ke vi zorge atentu lin. Ĉu ne, sinjoro Tesman, — vi promesas tion al mi?

TESMAN

Jes, tre volonte, sinjorino Rysing —

HEDDA

Elvsted.

TESMAN

Mi certe faros por Ejlert ĉion, kio al mi eblas. Pri tio vi fidu.

ELVSTED

Ho kiom benite afabla vi estas! (premas liajn manojn) Dankon, dankon, dankon! (timigita) Ĉar mia edzo ja tiom multe ŝatas lin!

HEDDA

(ekstaras) Vi devus sendi al li leteron, Tesman. Ĉar eble li ne venos al vi tiel el propra instigo.

TESMAN

Jes, estus eble pli ĝuste, tiel, Hedda? Ĉu?

HEDDA

Kaj faru ju pli frue des pli bone. Tuj, mi opinias.

ELVSTED

(pete) Ho jes, se vi tion volus!

TESMAN

Mi skribos tuj ĉi-momente. Ĉu vi havas lian adreson, sinjorino — sinjorino Elvsted?

ELVSTED

Jes. (prenas el la poŝo slipeton, kaj donas al li) Jen ĝi estas.

TESMAN

Bone, bone. Mi eniros — (ĉirkaŭrigardas) Momenton, — la pantoflojn? Nu, jen. (prenas la paketon kaj volas foriri)

HEDDA

Skribu nun vere kore kaj amike. Kaj ankaŭ sufiĉe longe.

TESMAN

Jes certe, tion mi faru.

ELVSTED

Sed nepre neniun vorton, ke mi petis por li!

TESMAN

Ne, tio ja estas memkomprenebla. Ĉu?

(Li trairas la malantaŭan ĉambron dekstren.)

HEDDA

(proksimiĝas al **sinjorino Elvsted**, ridetas kaj diras) Jen! Nun ni batis du muŝojn en unu frapo.

ELVSTED

Kiel tio?

HEDDA

Ĉu vi ne komprenis, ke mi volis forigi lin?

ELVSTED

Jes, por skribi tiun leteron —

HEDDA

Kaj por mi sola paroli kun vi.

ELVSTED

(konfuzita) Pri tio sama!

HEDDA

Jes, ĝuste pri tio.

ELVSTED

(timigita) Tamen ne *estas* pli, sinjorino Tesman! Vere ne pli!

HEDDA

Efektive estas. Estas konsiderinde pli. Tiom mi ja komprenas. Jen venu, — kaj ni eksidu konfideme kune.

(Ŝi devigas **sinjorinon Elvsted** eksidi sur la apogseĝon apud la forno, kaj mem sidigas sin sur unu el la taburetoj.)

ELVSTED

(timema, rigardas sian horloĝon) Sed kara, bona Sinjorino —. Mi vere intencis nun foriri.

HEDDA

Ho, ne tiom urĝas. — Nu? Rakontu al mi iom kiel vi fartas en via hejmo.

ELVSTED

Ho, estas ĝuste *tio*, kion mi plej malvolonte tuŝu.

HEDDA

Sed al mi, kara —? Bona Dio, ni estis ja kune en la instituto.

ELVSTED

Jes, sed vi estis en klaso super mi. Ho, kiom mi tiam vin timis!

HEDDA

Vi min timis?

ELVSTED

Jes, mi estis ege timema. Ĉar kiam ni renkontiĝis en la ŝtuparo, vi kutimis taŭzi miajn harojn.

HEDDA

Ne, ĉu mi *tion* faris?

ELVSTED

Jes, kaj iam vi diris, ke vi volis per fajro senharigi min.

HEDDA

Ho, tio estis ja nur babilaĉo, vi komprenu.

ELVSTED

Jes, sed tiam mi estis ja tiom stulta. — Kaj poste almenaŭ — ni disiĝis — foren disiĝis unu de la alia. Niaj rondoj estis ja ege malsimilaj.

HEDDA

Nu, do ni denove alproksimiĝu. Aŭskultu nun! En la instituto ni intimiĝis kaj antaŭnomis unu la alian —

ELVSTED

Ne, en tio vi certe eraras.

HEDDA

Ho ne, certe ne! Mi memoras tute klare. Kaj tial ni estu koramikinoj, nun kiel antaŭe. (proksimiĝas sur la tabureto) Jen! (kisas ŝin sur la vangon) Nun ni estu amikinoj kaj vi nomas min Hedda.

ELVSTED

(premas kaj frapetas ŝiajn manojn) Ho, tiom da boneco kaj afableco —! Al tio mi tute ne estas kutimiĝinta.

HEDDA

Nu, nu, nu! Kaj mi estas via amikino, kiel antaŭe, kaj nomas vin mia kara Tora.

ELVSTED

Tea mi nomiĝas.

HEDDA

Jes ĝuste. Kompreneble. Tea mi dirus. (rigardas ŝin kompateme) Do vi ne kutimiĝis al boneco kaj afableco, vi, Tea? En via propra hejmo?

ELVSTED

Ho, se mi vere havus hejmon! Sed mi neniun havas. Mi neniam havis.

HEDDA

(iom rigardas ŝin) Mi komprenetis, ke estus io tia.

ELVSTED

(rigardas antaŭen senhelpe) Jes, — jes, — jes.

HEDDA

Mi ne certe memoras nun. Sed ĉu ne estis unue kiel mastrumistino, ke vi venis tien norde al la notario?

ELVSTED

Vere mi estus guvernistino. Sed lia edzino — la tiama, — ŝi estis malsaneca, — kaj plej ofte kuŝis en lito. Jen, mi devis ankaŭ ŝarĝi min pri la mastrumado.

HEDDA

Sed poste, — fine, vi fariĝis dommastrino.

ELVSTED

(peze) Jes, fine mi tio fariĝis.

HEDDA

Mi pripensu —. Kiom longe estas de tiam, — proksimume?

ELVSTED

Post kiam mi edziniĝis?

HEDDA

Jes.

ELVSTED

Estas nun kvin jaroj de tiam.

HEDDA

Jes, ĝuste; tiom devas esti.

ELVSTED

Ho, tiuj kvin jaroj —! Aŭ pli ĝuste la du — tri lastaj. Ho, se vi, Sinjorino, povus imagi al vi —

HEDDA

(frapetas ŝian manon) *Sinjorino?* Hontu, Tea!

ELVSTED

Ne, ne, mi provos. — Ja, — se vi nur povus imagi kaj kompreni —

HEDDA

(preterpase rimarkante) Ejler Lønborg loĝas ja tie norde dum tri jaroj, mi opinias.

ELVSTED

(rigardas ŝin iom necerte) Ejler Lønborg? Jes — li faras.

HEDDA

Ĉu vi konis lin jam ĉi tie en la urbo?

ELVSTED

Apenaŭ. Nu ja, — de nomo, kompreneble.

HEDDA

Sed tie norde, — li do venis en vian domon?

ELVSTED

Jes li vizitis nin ĉiun tagon. Li devis ja legi kun la infanoj. Ĉar laŭtempe mi sola ne kapablis ĉion fari.

HEDDA

Ne, kompreneble. — Kaj via edzo —? Li verŝajne ofte vojaĝas?

ELVSTED

Jes. Sinjorino, — ne Hedda, — vi komprenas, ke kiel notario li devas ofte vojaĝi ĉirkaŭe en la distrikto.

HEDDA

(apogante sin al la seĝbrako) Tea, — kompatinda, dolĉa Tea, — nun vi ĉion rakontu al mi, — tiel kiel estas.

ELVSTED

Jes, kaj jen vi demandu.

HEDDA

Kia vere estas via edzo, Tea? Mi pensas, — kia en — ĉiutagaj rilatoj. Ĉu li traktas vin bone?

ELVSTED

(eviteme) Li certe mem kredas, ke li ĉion plej eble bone faras.

HEDDA

Ŝajnas al mi, ke li estas tro maljuna por vi. Certe pli ol dudek jarojn pli maljuna?

ELVSTED

(incitita) Ankaŭ tio. Unu rilato aldone al alia. Ĉio pri li estas por mi malsimpatia! Ni havas eĉ ne unu penson kune. Nenion en la mondo, — li kaj mi.

HEDDA

Sed ĉu li tamen ne iel amas vin? Tiel siamaniere?

ELVSTED

Ho, mi ne scias kion li sentas. Mi vere nur estas utila por li. Kaj ne kostas multe dungi min. Mi estas malmultekosta.

HEDDA

Estas malsaĝe de vi.

ELVSTED

(agitas la kapon) Ne povas esti alimaniere. Ne kun li. Ŝajne li vere ŝatas nenium alian krom si mem. Eble iomete la infanojn.

HEDDA

Kaj ankaŭ Ejler Lønborg, Tea.

ELVSTED

(rigardas ŝin) Ŝatas Ejler Lønborg! Kiel vi havas tiun ideon?

HEDDA

Sed, kara, — ŝajnas al mi, ke ĉar li sendas vin eĉ ĉi tien al la urbo post lin — (ridetas preskaŭ nerimarkeble) Kaj krome vi ja mem tion diris al Tesman.

ELVSTED

(kun nervoza spasmeto) Nu do? Jes, eble mi tion faris. (eldiras kviete) Nu. — Pli bone ke mi diru al vi ĉion. Ĉar tamen malkaŝiĝos.

HEDDA

Sed, mia kara Tea —?

ELVSTED

Do, mallonge kaj rekte! Mia edzo tute ne sciis, ke mi forvojaĝis.

HEDDA

Ĉu vere! Via edzo nenion sciis?

ELVSTED

Kompreneble ne. Krome li ne estis hejme. Faris vojaĝon, ankaŭ li. Ho, mi ne plu eltenis, Hedda! Tute neeble! Tiel sola kia mi de nun estus tie norde.

HEDDA

Nu? Kaj poste?

ELVSTED

Jen, mi pakis kelkajn el miaj aĵoj. La plej necesajn. Tiel kaŝe. Kaj jen mi forlasis la domon.

HEDDA

Senpere?

ELVSTED

Jes. Kaj vojaĝis per fervojo rekte ĉi tien al la urbo.

HEDDA

Sed, mia kara, bona Tea, — ke vi tion kuraĝis!

ELVSTED

(ekstaras kaj paŝas sur la planko) Nu ja, kion en la tuta mondo mi alie farus!

HEDDA

Sed kion via edzo diros, kiam vi revenos hejmen?

ELVSTED

(ĉe la tablo, rigardas ŝin) Tien norden al *li*?

HEDDA

Nu jes, nu jes?

ELVSTED

Tien norden al li mi neniam plu revenos.

HEDDA

(ekstaras kaj proksimiĝas) Vi do — tute serioze, — forvojaĝis de ĉio?

ELVSTED

Jes. Mi ne opiniis, ke por mi estas io alia farebla.

HEDDA

Kaj — ke vi foriris tiel tute malsekrete.

ELVSTED

Ho, tiaĵon oni tamen ne povas teni sekreta.

HEDDA

Sed kion vi pensas, ke homoj diros pri vi, Tea?

ELVSTED

Kara Dio, ili diru, kion ili volas. (sidigas sin inerte kaj peze sur la sofon) Ĉar mi faris nenion alian ol kion mi *devis* fari.

HEDDA

(post mallonga paŭzo) Kion vi nun intencas fari? Kiun okupon vi volas komenci?

ELVSTED

Tion mi ankoraŭ ne scias. Mi nur scias ke mi devas vivi tie, kie Ejler Løvborg vivas. — Se mi do *pluvivu*.

HEDDA

(prenas seĝon de ĉe la tablo, eksidas ĉe ŝi kaj frotetas ŝiajn manojn) Vi Tea, — kiel estiĝis tiu — tiu amikeco — inter vi kaj Ejler Løvborg?

ELVSTED

Nu, evoluis tiel iom post iom. Mi ekhavis kvazaŭ ian influon sur lin.

HEDDA

Nu?

ELVSTED

Li formetis siajn antaŭajn kutimojn. Ne ĉar mi petis lin pri tio. Ĉar tion mi neniam kuraĝis fari. Sed li certe notis, ke tiaĵojn mi ne emis. Kaj tial li ilin forlasis.

HEDDA

(kaŝas spontanen mokridon) Vi do restarigis lin — kiel oni diras, — vi, eta Tea.

ELVSTED

Jes, tion li almenaŭ mem diras. Kaj li — siavice, — li faris ian veran homon el mi.
Lernigis min pensi — kaj kompreni ion kaj tion.

HEDDA

Ĉu li legis ankaŭ kun vi?

ELVSTED

Ne precize legis. Sed li parolis kun mi. Parolis pri senfine profundaj pensoj. Kaj poste venis tiu rava, feliĉa tempo, kiam mi partoprenis lian laboron! Kiam mi permesigis helpi lin!

HEDDA

Do, tion vi povis?

ELVSTED

Jes. Kiam li ion skribis, ni devis ĉiam labori kune.

HEDDA

Do, kiel du bonaj kamaradoj.

ELVSTED

(viglece) Kamaradoj! Jes, imagu, Hedda — tiel ankaŭ li nomis nin! — Ho, mi devus ja senti min korege ĝoja. Sed eĉ tion mi ne povas. Ĉar mi ja ne scias, ĉu tio daŭros kun la tempo.

HEDDA

Ĉu via fido al li ne estas pli forta ol tio?

ELVSTED

(peze) Virina ombro staras inter Ejler Lønborg kaj mi.

HEDDA

(rigardas ŝin intense) Kiu *tiu* estus?

ELVSTED

Mi ne scias. Iu aŭ alia de — de lia pasinteco. Iu kiun li verŝajne neniam forgesas.

HEDDA

Kion li diris — pri tio?

ELVSTED

Nur unu fojon — preterpase — li aludis.

HEDDA

Do! Kaj kion li jen diris?

ELVSTED

Li diris, ke kiam ili disiĝis, tiam ŝi volus pafi lin per pistolo.

HEDDA

(malvarme, sinrege) Ho ĉu! Tiaĵon oni ne kutimas fari ĉi tie.

ELVSTED

Ne. Kaj tial mi kredas, ke estas la ruĝhara kantistino, kun kiu li dum tempo —

HEDDA

Jes, povas esti.

ELVSTED

Ĉar mi memoras, ke oni diris pri ŝi, ke ŝi kunportis ŝargitajn armilojn.

HEDDA

Nu, — do kompreneble estas ŝi.

ELVSTED

(tordas la manojn) Jes, sed pensu, Hedda, — nun mi aŭdas, ke tiu kantistino, — ŝi estas denove en la urbo! Ho, — mi estas tute malespera —

HEDDA

(ekrigardas al la malantaŭa ĉambro) Ts! Tesman venas. (ekstaras kaj flustras) Tea, — ĉio devas resti inter vi kaj mi.

ELVSTED

(eksaltas) Ho jes, — jes! Pro Dio —!

(**Jørgen Tesman**, kun letero en la mano, venas de dekstre tra la malantaŭa ĉambro.)

TESMAN

Jen, — nun la epistolo estas prete verkita.

HEDDA

Estas ja bone. Sed sinjorino Elvsted jam volas foriri, mi kredas. Atendu iomete. Mi akompanos al la ĝardenpordego.

TESMAN

Jen, Hedda, — eble Berte povas ekspedi tiun ĉi?

HEDDA

(prenas la leteron) Mi diros al ŝi.

(**Berte** venas de la antaŭĉambro.)

BERTE

Asesoro Brack venis, kaj diras, ke li deziras viziti la gesinjorojn.

HEDDA

Jes, petu la asessoron bonvole enveni. Kaj, jen — metu tiun ĉi leteron en la poŝtkeston.

BERTE

(prenas la leteron) Jes, Sinjorino.

(Ŝi malfermas la pordon por **asesoro Brack** kaj mem eliras. La asesoro estas 45 jara sinjoro. Diktrunka, sed de bona staturo kaj kun elastaj movoj. La vizaĝo estas ronda, sed kun nobla profilo. La haroj estas tonditaj mallongaj kaj estas preskaŭ ankoraŭ nigraj kaj zorge frizitaj. Okuloj vivece ludantaj. Brovoj dikaj. Same la lipharoj, kun tonditaj pintoj. Li portas elegantan promenon kostumon, tamen iom tro juneca por lia aĝo. Li uzas nazpinĉilon, kiun li foje kaj refoje lasas pendi.)

ASESORO BRACK

(kun la ĉapelo en la mano; salutas) Ĉu oni kuraĝas fari viziton tiom frue en la tago?

HEDDA

Kompreneble oni kuraĝas.

TESMAN

(premas lian manon) Ĉiam bonvena vi estu. (prezentas) Asesoro Brack — sinjorino Rysing —

HEDDA

Oho —!

BRACK

(reverence) Ah, — treege ĝojigas min —

HEDDA

(rigardas lin kaj ridas) Estas vere amuze rigardadi vin dum hela tago, asesoro!

BRACK

Ŝanĝigita — vi eble trovas?

HEDDA

Jes, iomete pli juna, ŝajnas al mi.

BRACK

Dankas kompleze.

TESMAN

Sed kion vi diras pri Hedda! Ĉu? Ĉu ŝi ne aspektas florante? Ŝi rekte —

HEDDA

Ho, lasu nun min netuŝita. Prefere danku la asessoron pro la peno, kiun li havis —

BRACK

Nu, nu, — estis por mi nura plezuro —

HEDDA

Jes vi estas fidela estaĵo. Sed por mia amikino urĝas foriri. Ĝis revido, asessoro. Mi baldaŭ revenos.

(Reciprokaj salutoj. **SinJORINO Elvsted** kaj **Hedda** eliras tra la antaŭĉambra pordo.)

BRACK

Nu, — ĉu via edzino estas sufiĉe kontenta —?

TESMAN

Jes, ni ne povas sufiĉe danki vin. Konsentite ke — ioma ŝanĝo estos necesa, mi aŭdas. Kaj io kaj io mankas. Fariĝos necese havigi aldone kelkajn aĵojn.

BRACK

Nu do? Vere?

TESMAN

Sed pri tio vi ne estu ĝenata. Hedda diris, ke ŝi mem volas aranĝi pri tio kio mankas. — Sed ĉu ni ne sidiĝu? Ĉu?

BRACK

Dankon, momenton. (eksidas ĉe la tablo) Estas io, pri kio mi volus paroli kun vi, kara Tesman.

TESMAN

Nu? Aha, mi komprenas! (eksidas) Estas verŝajne la serioza parto de la festeno, kiu nun komencas. Ĉu ?

BRACK

Nu, tiuj monaferoj ankoraŭ ne tiom urĝas. Krome mi dezirus, ke ni estus nin aranĝintaj iom pli simple.

TESMAN

Sed tio ja tute ne decus! Pensu do pri Hedda, kara! Vi kiu konas ŝin tiel bone —. Ne eblis ja proponi al ŝi tute etburgajn ĉirkaŭaĵojn!

BRACK

Ne, ne, — estas ja tio la dilemo.

TESMAN

Kaj — feliĉe — ne povas longe daŭri, ĝis mi estos nomita profesoro.

BRACK

Nu, jen vidu, — tiaj aferoj ofte estas longedaŭraj.

TESMAN

Ĉu vi eble aŭdis ion pli detale? Ĉu?

BRACK

Nenion deciditan —. (interrompante) Sed, jen mi memoras, — novaĵon, kiun mi povas rakonti.

TESMAN

Nu?

BRACK

Via iama amiko, Ejler Lønborg, revenis urben.

TESMAN

Tion mi jam scias.

BRACK

Nu? Kie vi kaptis tiun sciigon?

TESMAN

Ŝi tion rakontis, la sinjorino, kiu eliris kun Hedda.

BRACK

Nu tiel. Kiel ŝi nomiĝas? Mi ne bone aŭdis —

TESMAN

Sinjorino Elvsted.

BRACK

Aha, — do la edzino de la notario. Jes, — estas ja ĉe ili, ke li restadis.

TESMAN

Kaj pensu, — kun ĝojo mi aŭdas, ke li refariĝis tute bonkondata homo!

BRACK

Jes, oni ja tion pretendas.

TESMAN

Kaj laŭdire li ankaŭ estas eldoninta novan libron. Ĉu?

BRACK

Jes ja, vere!

TESMAN

Kaj ĝi ankaŭ vekis atenton!

BRACK

Eĉ ege neordinaran atenton ĝi vekis!

TESMAN

Imagu, — ĉu tio ne estas ĝojige aŭdi? Li, kun siaj mirindaj talentoj —. Mi estis senespere konvinkita, ke li komplete perdiĝis por ĉiam.

BRACK

Tio estis ja la ĝenerala opinio pri li.

TESMAN

Sed mi ne povas imagi, kion li nun volas komenci! De kio li do nun poste vivu? Ĉu?

(**Hedda** dum la lastaj vortoj envenis tra la pordo de la antaŭĉambro.)

HEDDA

(al **Brack**, ridas moke) Tesman ĉiam kunportas zorgojn pri la enspezoj por vivi.

TESMAN

Nu Dio, — ni sidas ĉi tie parolante pri tiu kompatinda Ejler Lønborg.

HEDDA

(rapide rigardas lin) Nu tiel? (eksidas sur la apogseĝon apud la forno, kaj demandas indifere) Kio estas al *li*?

TESMAN

Ja, — la heredon li certe jam foruzis antaŭ longe. Kaj novan libron li apenaŭ povas skribi ĉiun jaron. Ĉu? Nu, — kaj jen mi vere demandas, kio fariĝos el li?

BRACK

Pri tio mi povus eble iom informi vin.

TESMAN

Do?

BRACK

Vi devas memori, ke li havas parencojn kun ne malgranda influo.

TESMAN

Ho, bedaŭrinde, — la parencoj, ili al li ja turnis la dorson.

BRACK

Iam ili nomis lin la espero de la familio.

TESMAN

Jes ja, iam! Sed tiun esperon li ja mem perdigis.

HEDDA

Kiu scias? (ridetas) Norde ĉe la notario Elvsted ili ja restarigis lin —

BRACK

Kaj aldone tiu libro, kiu eldoniĝis —

TESMAN

Bone, bone, Dio permesu, ke ili vere lin helpu al io aŭ alia. Mi ĵus skribis al li leteron. Hedda, mi invitis lin ĉe ni hodiaŭ vespere.

BRACK

Tamen kara, vi partoprenos ja mian fraŭlofestenon ĉivespere. Tion vi ja promesis sur la kajo ĉinokte.

HEDDA

Ĉu vi tion forgesis, Tesman?

TESMAN

Jes vere, tion mi forgesis.

BRACK

Cetere vi povas esti trankvila, kaj fidi ke li ne venos.

TESMAN

Kial vi tion supozas? Ĉu?

BRACK

(iom hezitante, ekstaras kaj apogas la manojn sur la seĝdorso) Kara Tesman —. Kaj ankaŭ vi, Sinjorino —. Mi ne povas lasi vin en nescio pri io, kio — kio —

TESMAN

Kio koncernas Ejler —?

BRACK

Ambaŭ vin; vin kaj lin.

TESMAN

Sed, kara asesoro, diru do!

BRACK

Vi devas antaŭvidi, ke via enoficiĝo eble ne okazos tiom frue, kiom vi deziras kaj atendas.

TESMAN

(eksaltas maltrankvile) Ĉu io intervenis? Ĉu?

BRACK

La enoficiĝo por la posteno estos eble submetata al konkuro —

TESMAN

Konkuro! Jen imagu, Hedda!

HEDDA

(duonkuŝigas sin pli malantaŭen en la seĝo) Aha, jen, jen!

TESMAN

Sed kun kiu do! Vere ne kun —?

BRACK

Jes, ĝuste. Kun Ejler Løvborg.

TESMAN

(kunfrapas la manojn) Ne, ne, — tio ĉi estas ja tute nepensebla! Tute neebbla! Ĉu?

BRACK

Hm, — tamen ni tion do eble spertos.

TESMAN

Sed, sed asesoro Brack, — estus nekredebla senkonsidero kontraŭ mi! (agitas per la brakoj) Jes, ĉar — konsideru, — mi estas edziĝinta homo! Ni ja geedziĝis sub tiuj perspektivoj, Hedda kaj mi. Akiris pezan ŝuldon. Prunteprenis monon eĉ de onklino Julle. Ĉar, Dio mia, — mi ja preskaŭ ricevis promeson pri la posteno. Ĉu?

BRACK

Nu, nu, nu, — la postenon vi probable ricevos. Sed nur post konkuro.

HEDDA

(senmova en la apogseĝo) Imagu, Tesman, — estos kvazaŭ ia sporto.

TESMAN

Sed, plej kara Hedda, kiel vi povas trakti tion ĉi tiel senzorge!

HEDDA

(kiel antaŭe) Tion mi tute ne faras. Mi vere estas streĉe interesita pri la rezulto.

BRACK

Ĉiukaze, sinjorino Tesman, estas bone, ke vi nun sciu, kiel statas la aferoj, — jam antaŭ ol vi komencos aĉetadi, pri kio vi minacas, kiel mi aŭdis.

HEDDA

Tio ĉi povas neniun ŝanĝon fari.

BRACK

Nu tiel? Tio estas alia afero. Adiaŭ! (al Tesman) Kiam mi faros mian posttagmezan promenadon, mi enrigardos por vin serĉi.

TESMAN

Ho, jes ja, — el tio ĉi mi ne vidas vojon, nek elen nek enen.

HEDDA

(kuŝanta, antaŭenstreĉas la manon) Adiaŭ, Asesoro. Kaj bonvenon reen.

BRACK

Koran dankon. Adiaŭ, adiaŭ.

TESMAN

(akompanas lin al la pordo) Adiaŭ, kara Asesoro! Mi vere petas vin pardonon — (**Asesoro Brack** eliras tra la pordo de la antaŭĉambro)

TESMAN

(paŝas tien reen sur la planko) Ho, Hedda, — oni neniam devus riski enpenetri la fabelolandon. Ĉu?

HEDDA

(rigardas lin ridetante) Ĉu *vi* tion faras?

TESMAN

Ho jes, — ne eblas nei, — *estis* fabelriske edziĝi kaj aĉeti domon kun nuraj necertaj perspektivoj.

HEDDA

Vi eble pravas.

TESMAN

Nu, — nian ŝatindan hejmon ni tamen havas, Hedda! Imagu, — la hejmon, pri kiu ni kune revadis. Reve fantaziadis mi dirus. Ĉu?

HEDDA

(ekstaras malrapide kaj lace) La interkonsento estis, ke ni vivu festene. Grandsinjore.

TESMAN

Jes, bona Dio, — kiom mi antaŭĝojis al tio! Imagu, — vidi vin kiel mastrinon, — en elektita rondo! Ĉu? — Jes ja, — intertempe ni du devas elteni kune en soleco, Hedda. Nur foje vidi onklinon Julle ĉe ni. — Ho vi, kiu devus sperti ion alian — ion tute alian —!

HEDDA

Livre-vestitan serviston mi kompreneble unue ne ricevos.

TESMAN

Ho ne, — bedaŭrinde. Dungi serviston, — vidu, pri tio ne eblas pensi.

HEDDA

Kaj la rajdĉevalon, kiun mi havas —

TESMAN

(timigita) La rajdĉevalon!

HEDDA

— pri ĝi mi certe nun eĉ ne plu kuraĝas pensi.

TESMAN

Ne, Dio gardu min, — estas ja memkompreneble!

HEDDA

(paŝas sur la planko) Nu — per unu afero mi almenaŭ povas min ĝojigi dume.

TESMAN

(ĝoje) Ho, Dio benata, dankon! Kaj kio estas do tio, Hedda? Ĉu?

HEDDA

(ĉe la pordo, rigardas lin kun kaŝata moko) Miaj pistoloj, — Jørgen.

TESMAN

(timigate) La pistoloj!

HEDDA

(kun glaciaj okuloj) La pistoloj de generalo Gabler.

(Ŝi eliras tra la malantaŭa ĉambro maldekstren.)

TESMAN

(kuras al la pordaperturo kaj vokas post ŝi) Ne, Dio benu vin, plej kara Hedda, — ne tuŝu tiujn danĝerajn objektojn! Pro mi, Hedda! Ĉu?

DUA AKTO

(La sama ĉambro de **gesinjoroj Tesman**, sed la piano estas elmetita; kaj eleganta, eta skribotablo estas tie lokigita anstataŭe. Ĉe la sofo maldekstre estas metita malgranda tablo. La plejmultaj florbukedoj estas forportitaj. La bukedo de **sinjorino Elvsted** staras sur pli granda tablo iom antaŭe sur la planko. — Estas posttagmezo.)

(**Hedda**, vestita por akceptado, estas sola en la ĉambro. Ŝi staras ĉe la malferma vitra pordo ŝargante revolverpistolon. Alia egala kuŝas en malfermita pistolskatolo sur la skribotablo.)

HEDDA

(rigardas malsupren en la ĝardenon kaj krias) Bonan tagon, sinjoro Asesoro!

BRACK

(aŭdata de malsupre iom fore) Dankon, same, sinjorino Tesman!

HEDDA

(suprenlevas la pistolon kaj celumas) Nun mi pafas vin, sinjoro Brack!

BRACK

(krias de tie) Ne — ne — ne! Ne staru tiel celumante ĝuste al mi!

HEDDA

Tio rezultas el ŝteliro laŭ sekreta vojo! (ŝi pafas)

BRACK

(pli proksime) Ĉu vi estas tute freneza —!

HEDDA

Ho, Dio, — ĉu eble mi trafis vin?

BRACK

(ankoraŭ ekstere) Ĉesu pri tiuj stultaĵoj!

HEDDA

Do, envenu, Asesoro.

(**Asesoro Brack**, vestita por sinjora festeno, envenas tra la vitra pordo. Li portas malpezan mantelon sur la brako.)

BRACK

Pro diablo, — ĉu vi ankoraŭ faras tiun sporton? Al kio vi pafas?

HEDDA

Ho, mi nur staras tiel pafante en la bluan aeron.

BRACK

(zorge prenas la pistolon el ŝia mano) Pardonu, Sinjorino. (rigardas ĝin) Aha, tiun ĉi, — tiun mi bone konas. (ĉirkaŭrigardas) Kie ni havas la skatolon? Nu, jen. (metas la pistolon enen kaj fermas) Ĉar nun ni sufiĉe ŝercis hodiaŭ.

HEDDA

Sed kara Dio, pri kio vi volas ke mi okupiĝu?

BRACK

Ĉu vi ne akceptis vizitantojn?

HEDDA

(fermas la vitran pordon) Eĉ ne unu. Ĉiuj la intimaj verŝajne ankoraŭ estas en la kamparo.

BRACK

Kaj eble ankaŭ Tesman ne estas hejme?

HEDDA

(ĉe la skribotablo, metas la pistolskatolon en la tirkeston) Ne. Tuj post kiam li manĝis, li kuris al la onkloj. Ĉar li ne atendis vin tiel frue.

BRACK

Hm, — domaĝe ke mi ne tion suspektis. Estis stulte de mi.

HEDDA

(turnas la kapon kaj rigardas lin) Kial stulte?

BRACK

Nu, ĉar tial mi estus veninta ĉi tien ankoraŭ iom — pli frue.

HEDDA

(paŝas trans la plankon) Nu ja, sed tiam vi tute ne estus iun renkontanta. Ĉar mi estis en mia ĉambro ŝanĝante vestojn post la tagmanĝo.

BRACK

Kaj ne troviĝas eta pordofendo, tra kiu oni povus intertrakti?

HEDDA

Vi ja forgesis tian aranĝi.

BRACK

Jen, ankaŭ *tio* estis stulta de mi.

HEDDA

Nu, do ni sidiĝu ĉi tie. Kaj atendu. Ĉar Tesman verŝajne ne revenos hejmen tiom frue.

BRACK

Nu do, kara Dio, mi estu pacienca.

(**Hedda** sidigas sin en la sofoangulon. **Brack** metas sian mantelon super la dorson de la plej proksima seĝo kaj eksidas, sed daŭre tenas la ĉapelon en la mano. Mallonga paŭzo. Ili rigardas unu la alian.)

HEDDA

Nu?

BRACK

(per la sama voĉo) Nu?

HEDDA

Estas mi, kiu demandis unue.

BRACK

(klinas sin iom antaŭen) Do, ni permesu al ni etan, agrablan babiladon, sinjorino Hedda.

HEDDA

(kuŝigas sin iom pli malantaŭen en la sofo) Ĉu ne ŝajnas al vi, ke estas kvazaŭ eterneco post kiam ni laste kunparolis? — Nu, la rimarkoj preterpasante hieraŭ vespere kaj hodiaŭ matene — mi ne grave konsideras.

BRACK

Sed tiel inter ni du? — Du solaj vi aludas?

HEDDA

Nu jes. Proksimume.

BRACK

Ĉiun opan tagon mi iris sopirante, ke vi baldaŭ bone revenus hejmen.

HEDDA

Kaj eĉ mi la tutan tempon sopiris pri la sama.

BRACK

Vi? Vere, sinjorino Hedda? Kaj mi, kiu kredis, ke vi tiom bone amuziĝis dum la vojaĝo!

HEDDA

Ho, jen kredu!

BRACK

Sed tion Tesman ĉiam skribis.

HEDDA

Jes *li*! Ĉar li ja trovas, ke estas por li plej ŝatinde ĉirkaŭflari en la librejoj. Kaj havi ŝancon sidi kopiante malnovajn pergamenfoliojn, — aŭ ion tian.

BRACK

(iom malice) Nu, tio estas ja lia tasko en la vivo. Almenaŭ parte.

HEDDA

Jes, tio ja estas. Kaj tiam oni kompreneble —. Sed por mi! Ho ne, kara Asesoro, — por mi estis terure tede.

BRACK

(simpatiente) Ĉu vere vi tion diras? Tute serioze?

HEDDA

Jes, vi povas ja mem imagi —! Tiel tute duonan jaron neniam renkonti homon, kiu iom konas nian rondon. Kaj kun kiu oni povas paroli pri niaj propraj aferoj.

BRACK

Ne, ne, — ankaŭ mi sentus tion manko.

HEDDA

Kaj aldone tio, kio estas la plej netolerebla —

BRACK

Nu?

HEDDA

— ĉiam kaj eterne esti devigata pasi la tagojn kune kun — kun unu sola kaj la sama —

BRACK

(kapklinas samopiniante) Kaj frue kaj malfrue, — jes. Imagu, — je ĉiuj okazoj.

HEDDA

Mi diris: ĉiam kaj eterne.

BRACK

Jen komprenite. Sed kun nia deca Tesman mi opinias, ke oni devus kapabli —

HEDDA

Tesman estas — fakulo, kara.

BRACK

Sendiskute.

HEDDA

Kaj kun fakuloj ne estas amuze vojaĝi. Almenaŭ ne dumlonge.

BRACK

Eĉ ne — kun la fakulo, kiun oni *amas*?

HEDDA

Hu, — ne uzu tiun sukergluan vorton!

BRACK

(ekmiras) Jen kio, sinjorino Hedda?

HEDDA

(duone ridante, duone ĉagrenita) Jes, vi provu tion, vi! Aŭdi pri kulturhistorio frue kaj malfrue —

BRACK

Ĉiam kaj eterne —

HEDDA

Jes — jes — jes! Kaj pri tiu hejma industrio en la mezepoko —! Tio estas ja la plej monstra!

BRACK

(rigardas ŝin esplorante) Sed diru al mi, — kiel devas mi kompreni ke —? Hm —

HEDDA

Ke fariĝis paro de mi kaj Jørgen Tesman, vi aludas?

BRACK

Nu ja, esprimu nin tiel.

HEDDA

Bona Dio, ĉu vi do trovas tion stranga?

BRACK

Kaj jes, kaj ne, — sinjorino Hedda.

HEDDA

Mi vere estis dancinta ĝis laciĝo, kara Asesoro. Mia tempo estis pasinta — (skuiĝas) Hu ne, — tion mi tamen ne dirus. Eĉ ne tion pensi!

BRACK

Al tio vi verdire havas neniun kialon.

HEDDA

Ho, — kialon —, (rigardas lin kvazaŭ kaŝobservante) Kaj Jørgen Tesman, — oni devas ja rigardi lin kiel bonkondutan homon en ĉiuj rilatoj.

BRACK

Bonkondutan kaj fidindan. Bona Dio.

HEDDA

Kaj ion rekte ridindan ĉe li mi ne povas trovi. Ĉu vi ion tian trovas?

BRACK

Ridindan? Ne-e, — ĝuste tion mi ne volas diri —

HEDDA

Do, kaj cetere li ja estas tre diligenta kolektanto? — Certe eblas, ke fine li tamen atingos alten.

BRACK

(rigardas ŝin iom necerte) Mi kredis, ke vi opinias, same kiel ĉiuj aliaj, ke li fariĝus aparte elstara viro.

HEDDA

(kun esprimo de laceco) Jes, mi opiniis. — Kaj kiam li nepre kaj absolute volis havi la permeson prizorgi min —. Mi ne scias, kial mi ne tion akceptus.

BRACK

Ne — ne. De tiu flanko rigardate —

HEDDA

Estis efektive pli ol kion miaj aliaj amikoj volis fari, kara Asesoro, tiuj kiuj provis altiri mian favoron.

BRACK

(ridas) Nu vere, mi ne povas respondi por ĉiuj aliaj. Sed koncerne min, vi ja scias, ke mi ĉiam subtenis iun — iun respekton por la geedza ligo. Ja tiel ĝenerale, sinjorino Hedda.

HEDDA

(ŝercante) Ho, mi vere neniam nutris min per esperoj koncerne *vin*.

BRACK

Ĉio, kion mi deziras, estas bona, intima rondo, en kiu mi povas servi per konsilo kaj helpo, kaj havas la permeson enveni aŭ eliri kiel — kiel elprovita amiko —

HEDDA

Amiko de la edzo en la domo vi sugestas?

BRACK

(klinas sin) Por diri la veron, — prefere de la sinjorino. Sed krome ankaŭ de la edzo, kompreneble. Sciu, — tia — diru triangula rilato, — ĝi estas funde granda komforto por ĉiuj partoj.

HEDDA

Jes, mi ofte sopiris havi trian ulon dum la vojaĝo. Hu, — sidi nur du solaj en la kupeo —!

BRACK

Feliĉe la nuptovojaĝo estas nun finita —

HEDDA

(skuas la kapon) Evidente la vojaĝo estos longa, — longa ankoraŭ. Mi nur atingis haltejon dumvojaĝe.

BRACK

Nu, do oni elsaltas. Kaj iom sin distras, sinjorino Hedda.

HEDDA

Mi neniam elsaltos.

BRACK

Vere ne?

HEDDA

Ne. Ĉar ĉiam ĉeestas iu, kiu —

BRACK

(ridante) — kiu rigardas ies krurojn, vi aludas?

HEDDA

Jes ĝuste.

BRACK

Nu, sed, bona Dio —

HEDDA

(kun deturnanta mansvingo) Mi ne ŝatas tion. — En tia okazo mi prefere restas sidanta, — kie mi fine troviĝas. En sola duopo.

BRACK

Nu, sed jen envenas tria persono al la paro.

HEDDA

Nu jes, — *tio* estas io tute alia!

BRACK

Elprovita, komprenema amiko —

HEDDA

— plezuriga en ĉiuj vivecaj sferoj —

BRACK

— kaj tute ne estante fakulo!

HEDDA

(kun aŭdebla ĝemspiro) Jes, tio estus ja efektive malŝarĝo.

BRACK

(aŭdas ke iu malfermas la enirejporton, kaj rigardas tien) La triangulo formata.

HEDDA

(mallaŭte) Kaj jen la trajno pluen veturas.

(**Jørgen Tesman**, en griza promenadkostumo kaj kun mola felta ĉapelo, envenas tra la antaŭĉambro. Li havas plurajn nebinditajn librojn sub la brako kaj en la poŝoj.)

TESMAN

(iras al la tablo apud la sofo en la angulo) Puf, — vere estis varme kuntiri, — ĉion ĉi. (demetas la librojn) Mi eĉ ŝvitas, Hedda. Jen, jen, — vi jam alvenis, kara Asesoro? Ĉu? Tion Berte ne menciis.

BRACK

(ekstaras) Mi iris tra la ĝardeno.

HEDDA

Kiajn librojn vi kunportas?

TESMAN

(staras foliumante) Estas novaj sciencfakaj verkoj, kiujn mi nepre devas havi.

HEDDA

Fakaj verkoj?

BRACK

Aha, estas fakaj verkoj, sinjorino Tesman.

(**Brack** kaj **Hedda** interŝanĝas kompreneman rideton.)

HEDDA

Ĉu vi bezonas ankoraŭ pli da fakaj verkoj?

TESMAN

Jes, kara Hedda, el tiuj oni neniam ekhavas tro. Oni devas ja orientiĝi pri kio estas verkita kaj presita.

HEDDA

Nu ja, verŝajne oni tion devas.

TESMAN

(serĉas inter la libroj) Kaj, rigardu, — jen mi kaptis ankaŭ la novan libron de Ejler Lønborg. (ĝin etendante) Ĉu vi eble emus ĝin rigardi, Hedda? Ĉu?

HEDDA

Ne, multan dankon. Aŭ — jes, eble poste.

TESMAN

Mi ĝin iom foliumis dumvoje.

BRACK

Nu, kion do vi opinias — kiel fakulo?

TESMAN

Mi trovas, ke estas strange kiom atenteme li sin esprimas. Tiel li neniam skribis antaŭe. (kolektas la librojn) Sed nun mi volas enporti ĉion ĉi. Estos plezuro foliume tranĉi —! Kaj jen mi ankaŭ devas ŝanĝi vestaĵojn. (al **Brack**) Ĉar ni ja ne bezonas tuj foriri? Ĉu?

BRACK

Kompreneble ne, — ne urĝas ankoraŭ dum longe.

TESMAN

Do mi permesas al mi iom da tempo. (eliras kun la libroj, sed haltas en la pordaperturo kaj turnas sin) Jen, mi memoras, Hedda, — onklino Julle ne vizitos vin ĉivespere.

HEDDA

Ĉu ne? Ĉu estas la epizodo kun la ĉapelo, kiu malhelpas?

TESMAN

Ho, tute ne. Kial vi pensas tiel pri onklino Julle? Imagu —! Sed onklino Rina estas tiom malsana, sciu.

HEDDA

Tia ŝi ja ĉiam estas.

TESMAN

Jes, sed hodiaŭ ŝia malsano multe malboniĝis, la kompatindulino.

HEDDA

Do ja, estas konvene, ke la alia restas ĉe ŝi. Mi devas rezigni.

TESMAN

Kaj vi ne povas imagi, vi, kiom ĝoja onklino Julle tamen estis, — ĉar vi tiom prosperis dum la vojaĝo!

HEDDA

(duonlaŭte, ekstaras) Ho, — tiuj eternaj onklinoj!

TESMAN

Kion?

HEDDA

(iras al la vitra pordo) Nenion.

TESMAN

Nu do. (li eliras tra la malantaŭa ĉambro kaj dekstren)

BRACK

Pri kiu ĉapelo vi parolis?

HEDDA

Ho, estis epizodo kun fraŭlino Tesman ĉimatene. Ŝi estis metinta sian ĉapelon tien sur la seĝon. (rigardas lin kaj ridetas) Kaj mi pretende kredis, ke estas la ĉapelo de la servistino.

BRACK

(skuas la kapon) Sed kara, bona sinjorino Hedda, kiel vi igis vin mem tion fari! Kontraŭ tiu honesta, maljuna sinjorino!

HEDDA

(nervoza, paŝas trans la plankon) Nu, komprenu, — tento al tia konduto foje ĵetiĝas sur min. Kaj tiam mi *ne povas* rezisti. (ĵetas sin sur la apogseĝon ĉe la forno) Ho, mi ne mem scias, kiel tion ekspliki.

BRACK

(malantaŭ la apogseĝo) Vi ne estas vere feliĉa, — tio estas la kialo.

HEDDA

(rigardas antaŭen) Krome mi ne scias, kial mi estu — feliĉa. Aŭ eble vi povas al mi tion diri?

BRACK

Jes — interalie ĉar vi ricevis ĝuste tiun hejmon, kiun vi deziris.

HEDDA

(rigardas lin kaj ridas) Ĉu ankaŭ vi kredas pri tiu dezirhistorio?

BRACK

Ĉu do estas nenio en ĝi?

HEDDA

Kompreneble, — io estas en ĝi.

BRACK

Kaj?

HEDDA

Estas *tio* en ĝi, ke mi uzis Tesman por akompani min hejmen de la vesperaj festenoj pasintan someron —

BRACK

Bedaŭrinde, — ke mi ja havis alian vojon.

HEDDA

Vero. Vi ja sekvis aliajn vojojn pasintan someron.

BRACK

(ridas) Honto al vi, sinjorino Hedda! Nu, — sed vi kaj Tesman do?

HEDDA

Jen, hazarde iun vesperon ni preterpasis ĉi tie. Kaj Tesman, kompatindulo, li ade turnis — turnadis. Ĉar li ne sciis pri kio paroli. Kaj mi kompatis tiun multesciantan homon —

BRACK

(ridetas dubante) *Vi* kompatis? Hm —

HEDDA

Jes vere, mi faris. Kaj jen — por lin helpi el la embaraso — mi hazarde, senpripense diris ke en tiu vilao mi ŝatus loĝi.

BRACK

Ne pli ol tio?

HEDDA

Ne *tiun* vesperon.

BRACK

Sed poste do?

HEDDA

Jes. Mia facilanimeco kuntiris sekvojn, kara Asesoro.

BRACK

Bedaŭrinde, — tion faras niaj facilanimecoj tro ofte, sinjorino Hedda.

HEDDA

Dankon! Sed estis en tiu fantaziado pri la vilao de ministrino Falk, ke Jørgen Tesman kaj mi renkontiĝis en kompreno! *Tio* tiris post si fianĉiniĝon kaj edziniĝon kaj nuptovojaĝon kaj ĉion. Nu ja, Asesoro, — kiel oni sternas, tiel oni kuŝas, — mi dirus.

BRACK

Komike! Kaj funde vi neniel interesiĝis pri la tuta afero.

HEDDA

Ne, Dio scias ke ne.

BRACK

Sed nun do? Nun, kiam ni fine aranĝis por vi hejmecon lokon?

HEDDA

Hu, — ŝajnas al mi, ke odoras lavendo kaj peklitaj rozoj en ĉiuj ĉambroj. — Sed tiun odoron eble onklino Julle kunportis.

BRACK

(ridas) Ho ne, mi prefere pensas, ke estas postresto de la karmemora ministrino.

HEDDA

Do, io formortinta algluiĝas. Memorigas al mi balflorojn — posttagajn. (interplektante la manojn malantaŭ la nukon, duonkuŝante malantaŭen sur la seĝo, kaj lin rigardante) Ho, kara Asesoro, — vi ne povas imagi, kiel terure mi enuos ĉi tie.

BRACK

Ĉu la vivo ne havus iun taskon por oferti ankaŭ al vi, sinjorino Hedda?

HEDDA

Taskon, — iun, kiu estus iom alloga?

BRACK

Prefere tian, kompreneble.

HEDDA

Dio scias, kia tasko tiu estus. Multfoje mi pripensas — (interrompante) Sed ankaŭ tio certe ne eblas.

BRACK

Kiu scias? Nur diru.

HEDDA

Se mi povus igi Tesman fariĝi politikisto, jen sugesto.

BRACK

(ridas) Tesman! Ne, sed pensu do, — por tiaĵoj kiel politiko li ja tute ne taŭgas — tute ne.

HEDDA

Ne, tion mi vere kredas. — Sed se mi nun tamen kapablus puŝi lin al tio?

BRACK

Pa, — kia kontentigo estus por vi en tio? Ĉar li ja ne taŭgas. Kial vi tamen volas lin al tio puŝi?

HEDDA

Ĉar mi enuas, aŭdu! (iom poste) Ĉu vi do opinias, ke estus tute neeble, ke Tesman fariĝu ĉefministro?

BRACK

Hm, — jen, kara sinjorino Hedda, — por *tio* fariĝi, li devus unue esti sufiĉe riĉa viro.

HEDDA

(ekstaras senpacienca) Jen, tio estas! Estas tiuj mizeraj kondiĉoj, en kiujn mi falis — (paŝas sur la planko) Estas tiuj, kiuj igas la vivon tiel bedaŭrinda! Rekte ridinda! — Ĉar *tiel* ja estas.

BRACK

Mi fakte opinias, ke la kulpo troviĝas aliloke.

HEDDA

Kie do?

BRACK

Vi neniam travivis iun skuan vekiĝon.

HEDDA

Ion seriozan, vi aludas?

BRACK

Jes, tiel oni povas ja ankaŭ sin esprimi. Sed nun ĝi eble okazos.

HEDDA

(rektigas la nukon) Ho, vi pensas pri la kontraŭaĵoj rilate tiun bagatelan postenon de profesoro! Sed tiu estu la propra afero de Tesman. Pri ĝi mi vere ne malŝparas penson.

BRACK

Nu — pri tiu ne. Sed kiam nun prezentiĝos al vi, — kion oni — kiel en pompa stilo — nomas seriozajn kaj — gravajn postulojn pri respondeco? (ridetas) Novajn postulojn, eta sinjorino Hedda.

HEDDA

(kolere) Silentu! Neniam vi spertos iun tiaĵon!

BRACK

(atenteme) Ni interparolos proksimume post jaro — maksimume.

HEDDA

(interrompante) Mi ne havas talenton por tiaĵo, sinjoro Asesoro. Por nenio kun postuloj al mi!

BRACK

Ĉu vi ne, kiel la plimulto de virinoj, havus talenton por rolo, kiel —?

HEDDA

(ĉe la vitra pordo) Ho, silentu, mi diras! — Multfoje ŝajnas al mi, ke mi havas talenton por nur unu rolo en la mondo.

BRACK

(proksimiĝas) Kaj kiu estas do tiu, se mi kuraĝas demandi?

HEDDA

(staras rigardante eksteren) Por el mi enuigi la vivon. Nun vi scias. (turnas sin, rigardas al la malantaŭa ĉambro, kaj ridas) Jes, tute ĝuste! Jen ni havas la profesoron.

BRACK

(mallaŭte, avertante) Nu, nu, nu, sinjorino Hedda!

(**Jørgen Tesman**, festene vestita, kun gantoj kaj ĉapelo enmane, venas de dekstre tra la malantaŭa ĉambro.)

TESMAN

Hedda, — ĉu ne venis malinvito de Ejler Løvborg? Ĉu?

HEDDA

Ne.

TESMAN

Nu, do jen vidu, ni certe havos lin post iom da tempo.

BRACK

Ĉu vi vere kredas, ke li venos?

TESMAN

Jes, pri tio mi preskaŭ certas. Ĉar verŝajne estas nur senfunda onidiro, tio kion vi rakontis antaŭtagmeze.

BRACK

Vere?

TESMAN

Jes, almenaŭ onklino Julle diris, ke ŝi kredas, ke neniel estonte li volus bari al mi la vojon. Jen imagu!

BRACK

Nu, do ĉio estas ja en bona ordo.

TESMAN

(metas la ĉapelon kun la gantoj en ĝi sur seĝon dekstre) Jes, sed vi devas permesi al mi atendi lin kiom eble plej longe.

BRACK

Por tio ni havas abundan tempon. Neniu venos al mi antaŭ la sepa — la sepa kaj duono.

TESMAN

Nu, do ni povas ja dume plezurigi Hedda. Kaj tiel pasigi la tempon. Ĉu?

HEDDA

(portas la surtuton kaj ĉapelon de Brack al la sofo en la angulo) Kaj se tro malfaciliĝas, sinjoro Lønborg povas ja restadi ĉi tie ĉe mi.

BRACK

(volas mem preni la vestaĵojn) Ho, pardonu, Sinjorino! — Al kio vi aludas per “tro malfaciliĝas”?

HEDDA

Se li ne volas iri kun vi kaj Tesman.

TESMAN

(rigardas ŝin sendecide) Sed, kara Hedda, — ĉu vi kredas ke tio decas, ke li restos ĉi tie ĉe vi? Ĉu? Memoru ke onklino Julle ne povas veni.

HEDDA

Ne, sed sinjorino Elvsted venos. Kaj tiam ni tri kune trinkos tason da teo.

TESMAN

Jes, *jen* kio konvenas.

BRACK

(ridetas) Kaj estus eble la plej saniga por li.

HEDDA

Kial do?

BRACK

Bona Dio, Sinjorino, vi ja sufiĉe ofte mokaludis miajn etajn fraŭlofestenojn. Ili konvenus sole por vere principfidelaj viroj, vi opiniis.

HEDDA

Sed certe sinjoro Løvborg nun estas sufiĉe principfida. Konvertita pekulo —

(**Berte** envenas tra la pordo de la antaŭĉambro.)

BERTE

Sinjorino, venas sinjoro, kiu deziras viziti —

HEDDA

Jes, envenigu lin.

TESMAN

(mallaŭte) Mi certas, ke estas li! Jen, imagu!

(**Ejlert Løvborg** envenas de la antaŭĉambro. Li estas svelta kaj malgrasa; samaĝa kun Tesman, sed aspektas iom pli aĝa kaj kaduka. Haroj kaj barbo estas nigrebrunaj, la vizaĝo iom longa, pala, kun nur paro de du ruĝetaj makuloj sur la vangoostoj. Li estas vestita en eleganta, nigra, tute nova vizitkostumo. Malhelaj gantoj kaj cilindra ĉapelo en la mano. Li restas starante ĉe la pordo kaj rapide kline salutas. Aspektas iom ĝenata.)

TESMAN

(al li kaj mansalutas) Jen, kara Ejlert, — ni do fine ankoraŭfoje renkontiĝas!

LØVBORG

(parolas per kvieta voĉo) Dankon al vi pro la letero. (proksimiĝas al **Hedda**) Ĉu mi kuraĝu ankaŭ al vi doni mian manon, sinjorino Tesman?

HEDDA

(prenas lian manon) Bonvenon, sinjoro Løvborg. (kun mangesto) Mi ne scias ĉu tiuj du sinjoroj —?

LØVBORG

(ete klinas sin) Asesoro Brack, mi opinias.

BRACK

(same) Evidente. Antaŭ kelkaj jaroj —

TESMAN

(al **Løvborg**, kun la manoj sur liaj ŝultroj) Kaj nun vi konduku kvazaŭ hejme, Ejler! Ĉu ne, Hedda? — Ĉar vi volas ja denove loĝi ĉi tie en la urbo, mi aŭdas? Ĉu ne?

LØVBORG

Jes, mi faros.

TESMAN

Nu, estas ja kompreneble. Aŭdu, — mi akiris vian novan libron. Sed mi vere ankoraŭ ne havis tempon legi ĝin.

LØVBORG

Tion vi vere povas ŝpari al vi.

TESMAN

Kial do, vi opinias?

LØVBORG

Ĉar ne estas io atentinda en ĝi.

TESMAN

Ho, imagu, ke vi tion diras!

BRACK

Tamen ĝi estas ja ege laŭdata, mi aŭdas.

LØVBORG

Estas ĝuste tio, kion mi celis. Kaj tial mi verkis la libron tia, ke ĉiuj povus ĝin pense sekvi.

BRACK

Tre saĝe.

TESMAN

Sed kara Ejler, —!

LØVBORG

Ĉar nun mi volas provi restarigi min. Komenci denove.

TESMAN

(iom ĝenata) Jes, tion vi do volas? Ĉu?

LØVBORG

(ridetas, formetas la ĉapelon kaj tiras paketon en paperkovraĵo el la poŝo de la mantelo) Sed kiam tio ĉi eldoniĝos, Jørgen Tesman — tiam vi nepre legu. Ĉar *jen* definitive la ĝusta. Tio en kio mi mem estas.

TESMAN

Nu? Kaj kio do tio estas?

LØVBORG

Estas la daŭrigo.

TESMAN

La daŭrigo? De kio?

LØVBORG

De la libro.

TESMAN

De la nova?

LØVBORG

Kompreneble.

TESMAN

Jes, sed kara Ejler, — ĝi enhavas ja la temon ĝis niaj tagoj!

LØVBORG

Ĝi enhavas. Kaj tiu ĉi temas pri la estonteco.

TESMAN

Pri la estonteco! Sed bona Dio, pri ĝi ni ja nenion scias!

LØVBORG

Ne. Sed tamen estas io kaj tio pri ĝi direnda. (malfermas la paketon) Jen, rigardu —

TESMAN

Sed ne estas via manskribo.

LØVBORG

Mi diktis. (foliumas la paperojn) Ĝi estas dividita en du sekciojn. La unua temas pri la kultur-potencoj de la estonteco. Kaj tiu dua — (foliumas iom pli antaŭen) — tiu temas pri la estonta kultur-evoluo.

TESMAN

Mirinde! Pri tiaj temoj mi neniam ekpensus skribi.

HEDDA

(ĉe la vitra pordo, frapetadas la vitron) Hm — Ho — ne.

LØVBORG

(metas la paperojn en la kovraĵon kaj metas la paketon sur la tablon) Mi ĝin kunprenis, ĉar mi intencis iom legi por vi ĉivespere.

TESMAN

Jes, estas tre afable de vi. Sed ĉivespere —? (rigardas al **Brack**) Mi vere ne scias, kiel tio ordiĝus —

LØVBORG

Nu, do alian fojon. Ne urĝas.

BRACK

Mi devas klarigi al vi, sinjoro Løvborg, — okazos eta aranĝo ĉe mi ĉivespere. Precipe por Tesman, komprenu —

LØVBORG

(serĉas la ĉapelon) Nu, — do mi ne pli longe —

BRACK

Ne, aŭskultu nun. Ĉu vi ne povus fari al mi la plezuron kunveni?

LØVBORG

(abrupte kaj decide) Ne, tion mi ne povas. Mi sincere dankas vin.

BRACK

Jen kio? Kunvenu. Ni estos eta elektita rondo. Kaj kredu, ke estos vivece, kiel sinjorino Hed —, kiel sinjorino Tesman diras.

LØVBORG

Pri tio mi ne dubas. Sed tamen —

BRACK

Kaj vi povus kunpreni vian manuskripton, kaj legi por Tesman *tie* ĉe mi. Ĉar mi havas sufiĉe da ĉambroj.

TESMAN

Jes pensu, Ejler, — tion vi povus fari! Ĉu?

HEDDA

(intervenas) Sed kara, ĉar sinjoro Løvborg tute ne *volas*! Mi estas certa, ke sinjoro Løvborg multe pli ŝatas resti ĉi tie kaj havi vespermanĝon kun mi.

LØVBORG

(ekrigardas ŝin) Kun vi, sinjorino!

HEDDA

Kaj kun sinjorino Elvsted.

LØVBORG

Ĉu? — (pasante) Ŝin mi preterpase renkontis tagmeze.

HEDDA

Ĉu vere? Jes, ŝi venos ĉi tien. Kaj tial estas preskaŭ necese, ke vi restos, sinjoro Løvborg. Ĉar alie ŝi ne havos iun por akompani sin hejmen.

LØVBORG

Jen vero. Jes, multan dankon, Sinjorino, — do mi restos ĉi tie.

HEDDA

Kaj mi nur donu al la servistino etan informon —

(Ŝi iras al la pordo de la antaŭĉambro kaj sonorigas. **Berte** envenas. **Hedda** parolas mallaŭte kun ŝi kaj montras al la malantaŭa ĉambro. **Berte** kapjesas kaj ree eliras.)

TESMAN

(samtempe al **Ejlert Løvborg**) Aŭdu, Ejler, — ĉu estas tiu ĉi nova temo, — tiu pri la estonteco, — pri kiu vi intencas fari prelegojn?

LØVBORG

Jes.

TESMAN

Ĉar mi aŭdis ĉe la librovendisto, ke vi eble donos serion da prelegoj ĉi tie dum la aŭtuno.

LØVBORG

Jes, mi faros. Vi ne devas riproĉi min pro tio, Tesman.

TESMAN

Ne, pro Dio, kompreneble ne! Sed —?

LØVBORG

Mi bone komprenas, ke por vi iom kontraŭas.

TESMAN

(malgaja) Ho, mi ne povas ja postuli, ke pro mi vi —

LØVBORG

Sed mi atendas ĝis kiam vi ekhavos vian oficon.

TESMAN

Vi atendas! Jes sed, — jes sed, — ĉu vi ne volas konkuri? Ĉu?

LØVBORG

Ne. Mi nur volas venki vin. En la opinio de la publiko.

TESMAN

Sed, bona Dio, — do onklino Julle tamen praviĝis! Ho jes, — mi *tion* ja sciis! Hedda! Jen imagu, — Ejler Løvborg tute ne volas kontraŭi nin!

HEDDA

(abrupte) Nin? Tenu min ekster tio.

(Ŝi iras al la malantaŭa ĉambro, kie **Berte** staras metante sur la tablon pleton kun karafoj kaj glasoj. **Hedda** kapsignas aprobe, kaj ree venas antaŭen. **Berte** eliras.)

TESMAN

(samtempe) Sed vi, asesoro Brack, — Kion vi diras al tio ĉi? Ĉu?

BRACK

Nu, mi diras, ke gloro kaj venko — hm, — povas ja esti treege belaj aferoj —

TESMAN

Jes certe povas esti. Sed tamen —

HEDDA

(rigardas Tesman kun malvarma rideto) Ŝajnas al mi, ke vi staras kvazaŭ fulmofrapita.

TESMAN

Jes, — proksimume tia, — mi opinias —

BRACK

Estis ja vere fulmotondro, kiu pasis super ni, Sinjorino.

HEDDA

(montras al la malantaŭa ĉambro) Ĉu la sinjoroj bonvolas eniri por preni glason da frida punĉo?

BRACK

(rigardas sian horloĝon) Forirsalute? Jes, eble ne estus rifuzinde.

TESMAN

Bonege, Hedda! Vere bonege! En tia sangvina animstato, en kia mi nun troviĝas —

HEDDA

Bonvolu, ankaŭ vi, sinjoro Løvborg.

LØVBORG

(rifuzante) Ne, multan dankon. Ne por mi.

BRACK

Sed, bona Dio, — frida punĉo vere ne estas veneno, mi scias.

LØVBORG

Eble ne por ĉiuj.

HEDDA

Jen, mi distru sinjoron Løvborg dume.

TESMAN

Nu ja, kara Hedda, tion faru do.

(Li kaj **Brack** iras en la malantaŭan ĉambron, eksidas, trinkas punĉon, fumas cigaredojn kaj parolas gajhumore dum la sekvanta sceno. **Ejlert Løvborg** restas staranta ĉe la forno. **Hedda** iras al la skribotablo.)

HEDDA

(per iom laŭtigita voĉo) Nun mi montros al vi kelkajn fotojn, se vi emas. Ĉar Tesman kaj mi — ni faris ekskurson tra Tirolo dum la hejmenvojaĝo.

(Ŝi venas kun albumo, kiun ŝi metas sur la tablon apud la sofo, kaj eksidas en ties superan angulon. **Ejlert Løvborg** proksimiĝas, haltas kaj rigardas ŝin. Poste li prenas seĝon kaj eksidas ĉe ŝia maldekstra flanko kun la dorso al la malantaŭa ĉambro.)

HEDDA

(malfermas la albumon) Jen rigardu tiun montodorson, sinjoro Løvborg! Estas la Ortlermontaro. Tesman skribis sube. Jen estas: Ortlermontaro ĉe Meran.

LØVBORG

(kiu konstante ŝin rigardas, diras mallaŭte kaj malrapide) Hedda — Gabler —

HEDDA

(ekrigardas lin rapide) Nu! Ts!

LØVBORG

(ripetas malrapide) Hedda Gabler!

HEDDA

(rigardas en la albumon) Jes, tiel mi nomiĝis en pli frua tempo. Tiam, — kiam ni du konis unu la alian.

LØVBORG

Kaj de nun, — kaj dum la tuta vivo, — mi do devas kutimigi min ne plu diri Hedda Gabler.

HEDDA

(daŭre foliumante) Jes, vi devas. Kaj mi opinias, ke vi devas praktiki sufiĉe frutempe. Ŝajnas al mi, ke ju pli frue, des pli bone.

LØVBORG

(kun indignoplena voĉo) Hedda Gabler edziniĝita? Kaj tia kun — Jørgen Tesman!

HEDDA

Jes, — tiel okazas.

LØVBORG

Ho, Hedda, Hedda, — kiel povis vi do forĵeti vin mem!

HEDDA

(rigardas lin akre) Nu? Ne tiele nun.

LØVBORG

Kiel do? (**Tesman** envenas kaj iras al la sofo)

HEDDA

(aŭdas lin veni kaj diras indifere) Kaj tio ĉi, sinjoro Løvborg, tio estas vido de malsupre en la Ampezzovalo. Jen rigardu tiujn montopintojn. (afable rigardas **Tesman**) Kio do nomiĝas tiuj strangaj montopintoj?

TESMAN

Lasu min rigardi. Ho, estas la Dolomitoj, tiuj.

HEDDA

Ĝuste ja! — estas la Dolomitoj, sinjoro Løvborg.

TESMAN

Hedda, — mi nur volis demandi, ĉu ni ne tamen enmetu iom da punĉo? Almenaŭ al vi, Hedda. Ĉu?

HEDDA

Jes, dankon. Kaj eble kelkajn kukojn.

TESMAN

Ne cigaredojn?

HEDDA

Ne.

TESMAN

Bone.

(Li iras en la malantaŭan ĉambron kaj dekstren. **Brack** sidas tie kaj observadas **Hedda** kaj **Løvborg**.)

LØVBORG

(mallaŭte kiel antaŭe) Nu, respondu al mi, Hedda, — kiel vi povis tion ĉi fari?

HEDDA

(aspekte profunde studante la albumon) Se vi daŭre kondutos intime, mi ne volas kun vi paroli.

LØVBORG

Ĉu mi ne rajtas eĉ kiam ni estas solaj?

HEDDA

Ne. Vi povas tiel pensi. Sed vi ne rajtas tiel paroli.

LØVBORG

Aha, mi komprenas. Tio ofendas vian amon — al Jørgen Tesman.

HEDDA

(ekrigardas lin kaj ridetas) Amon? Ne, nun vi estas sprita!

LØVBORG

Do ne amon!

HEDDA

Tamen nenian malfidelecon! Tiaĵon mi ne volas akcepti.

LØVBORG

Hedda, — respondu al mi nur tion solan —

HEDDA

Ts!

(**Tesman** kun pleto venas de la malantaŭa ĉambro.)

TESMAN

Jen! Jen la bonaĵoj. (li metas la pleton sur la tablon)

HEDDA

Kial vi mem servas?

TESMAN

(verŝas en la glasojn) Jes, ĉar mi trovas, ke estas tiom amuze servi vin, Hedda.

HEDDA

Sed vi ja verŝis en ambaŭ glasojn. Kaj sinjoro Løvborg ja ne deziras —

TESMAN

Ne, sed sinjorino Elvsted ja baldaŭ venos.

HEDDA

Jes, vere, — sinjorino Elvsted —

TESMAN

Ĉu vi ŝin forgesis? Ĉu?

HEDDA

Ni tiom profundigis en tion ĉi. (montras al li bildon) Ĉu vi memoras tiun etan vilaĝon?

TESMAN

Ho, estas *tiu* malsupre de Brennerpasejo! Estas tie, kie ni devis restadi la tutan nokton —

HEDDA

— kaj renkontis tiun aron da vivecaj somergastoj.

TESMAN

Jes, vere estis *tie*. Imagu — se ni tiam povus havi *vin* kun ni, Ej!ert! Nu! (li iras kaj sidigas sin ĉe **Brack**)

LØVBORG

Respondu al mi sole tion, Hedda —

HEDDA

Nu?

LØVBORG

Ĉu ne estis amo, eĉ ne en la rilato kun *mi*? Ne guto, — ne simileco de amo, eĉ ne en tio?

HEDDA

Nu, ĉu vere estis? Por mi aspektis, kvazaŭ ni estas du bonaj kamaradoj. Du vere intimaj amikoj. (ridetas) Precipe vi estis tre nekaŝema.

LØVBORG

Estis vi, kiu tion deziris.

HEDDA

Kiam mi retropensas, ŝajnas al mi, ke estis io bela, io alloga, — io kuraĝa en — en tiu kaŝema intimeco — tiu kamaradeco, pri kiu neniuj vivanta homo ion flaris.

LØVBORG

Jes, ĉu ne, Hedda! Ĉu ne tiel estis? — Kiam mi vizitis vian patron tiel dum la posttagmezoj —. Kaj la generalo sidis ĉe la fenestro legante la gazetojn, — kun la dorso al ni turnita —

HEDDA

Kaj ni du en la sofo en la angulo —

LØVBORG

Ĉiam kun la sama ilustrita revuo antaŭ ni —

HEDDA

Pro manko de albumo, jes.

LØVBORG

Jes, Hedda, — kaj kiam mi konfesis por vi —! Rakontis al vi pri mi mem tion, kion neniuj aliaj tiam sciis. Sidis tie kaj konfesis, ke mi eliris diboĉante tagojn kaj noktojn. Diboĉis tagnokton post tagnokto. Ho, Hedda, kia estis tiu potenco en vi, kiu devigis min konfesi tiaĵojn?

HEDDA

Ĉu vi imagas, ke estis iu potenco en mi?

LØVBORG

Jes, kiel mi alie tion klarigu al mi? Kaj ĉiuj tiuj — en pudoro volvitaj demandoj, kiujn vi al mi faris —

HEDDA

Kaj kiujn vi ege bone komprenis —

LØVBORG

Jen, ke vi povis sidi kaj tiel fari demandojn! Tute senhonte!

HEDDA

En pudoro volvitaj do estis.

LØVBORG

Jes, tamen senhonte. Elĉerpige demandi min pri — pri ĉiuj tiaĵoj!

HEDDA

Kaj ke vi igis vin respondi, sinjoro Løvborg.

LØVBORG

Jes, estas ja ĝuste tio, kion mi ne komprenas — nun poste. Sed diru do al mi, Hedda, — ĉu ne estis amo funde en nia rilato? Ĉu ne estis de via flanko, kvazaŭ vi dezirus lavi min pura, — kiam mi rifuĝis al vi por konfesi? Ĉu ne estis tiel?

HEDDA

Ne, ne ekzakte.

LØVBORG

Kio vin do instigis?

HEDDA

Ĉu aspektas por vi tiom nekompreneble, se junulino — kiam povas okazi tiel — sekrete —

LØVBORG

Nu?

HEDDA

Ke ŝi dezire volas rigardi en mondon, pri kiu —

LØVBORG

Pri kiu —?

HEDDA

— pri kiu oni ne rajtas ion scii?

LØVBORG

Jen, tio do estis?

HEDDA

Ankaŭ tio. Ankaŭ tio, — mi imagas.

LØVBORG

Kamaradeco en avido de la vivoĝuo. Sed kial *tio* do ne povus daŭri?

HEDDA

Pro tio vi mem kulpas.

LØVBORG

Estas vi, kiu rompis.

HEDDA

Jes, kiam danĝero minacis, ke realiĝo venus en la rilato. Honto al vi, Ejler Løvborg, kiel povis vi atenci vian — vian fideman kamaradon!

LØVBORG

(premegas la manojn) Ho, kial vi ne realigis la minacon? Kial vi ne mortpafis min, kiel vi minacis!

HEDDA

Tiom mi timas la skandalon.

LØVBORG

Jes, Hedda. Funde vi estas malkuraĝa.

HEDDA

Terure malkuraĝa. (ŝanĝas sintenon) Sed estis ja feliĉe por vi. Kaj poste vi ja konsolis vin tiom rave ĉe la familio Elvsted.

LØVBORG

Mi scias, kion Tea konfidis al vi.

HEDDA

Kaj eble vi konfidis ion pri ni du?

LØVBORG

Eĉ ne vorton. Tiaĵojn ŝi estas tro stulta por kompreni.

HEDDA

Stulta?

LØVBORG

En tiaj aferoj ŝi estas stulta.

HEDDA

Kaj mi estas malkuraĝa. (klinas sin pli proksimen al li, sen lin rigardi en la okulojn, kaj diras pli mallaŭte) Sed nun *mi* volas ion konfidi al *vi*.

LØVBORG

(atente) Nu?

HEDDA

Tio ke mi ne kuraĝis mortpafi vin —

LØVBORG

Jes?!

HEDDA

— *tio* ne estis mia plej fia malkuraĝo — tiun vesperon.

LØVBORG

(rigardas ŝin momenton, komprenas, kaj flustras pasie) Ho, Hedda! Hedda Gabler! Nun mi ekvidas kaŝitan fundon sub nia kamaradeco! Vi kaj mi —! *Tamen* estis la deziro pri vivo en vi —

HEDDA

(mallaŭte, sed kun akra ekrigardo) Gardu vin! Ne imagu ion tian!

(Mallumiĝadas. La pordo de la antaŭĉambro estas de ekstere malfermata de **Berte**.)

HEDDA

(klake fermas la albumon kaj vokas ridetante) Nu, fine! Kara Tea, — jen do, envenu!

(**Sinjorino Elvsted** venas de la antaŭĉambro. Ŝi estas vizite vestita. La pordo fermiĝas malantaŭ ŝi.)

HEDDA

(en la sofo, etendas la brakojn al ŝi) Dolĉa Tea, — vi ne povas imagi, kiom mi atendis vin!

(**Sinjorino Elvsted** preterpase interŝanĝas etan saluton kun la sinjoroj en la malantaŭa ĉambro, iras al la tablo kaj donas al Hedda la manon. **Ejlert Løvborg** ekstaris. Li kaj **sinjorino Elvsted** sin salutas per muta kapklino.)

ELVSTED

Eble mi devus eniri por iom paroli kun via edzo?

HEDDA

Ho, tute ne. Lasu tiujn du sidi. Ili baldaŭ foriros.

ELVSTED

Ili foriros?

HEDDA

Jes, ili eliros drinkfesteni.

ELVSTED

(rapide al Løvborg) Sed certe vi ne?

LØVBORG

Ne.

HEDDA

Sinjoro Løvborg — li restos ĉe ni.

ELVSTED

(prenas seĝon kaj volas eksidi apud li) Ho, kiom agrable ĉi tie estas!

HEDDA

Ne dankon, mia eta Tea. Ne *tie*! Bele venu ĉi tien al mi. Mi volas esti meze inter vi.

ELVSTED

Jes, tute kiel vi volas.

(Ŝi ĉirkaŭiras la tablon kaj eksidas en la sofon dekstre de **Hedda**. **Løvborg** ree eksidas sur la seĝon.)

LØVBORG

(post mallonga paŭzo, al **Hedda**) Ĉu ŝi ne estas ĝue rigardinda?

HEDDA

(glite tuŝetas ŝiajn harojn) Nur rigardinda?

LØVBORG

Jes. Ĉar *ni* du — ŝi kaj mi, — *ni* estas du veraj kamaradoj. Ni absolute fidas unu la alian. Kaj ni povas sidi kune kaj libere interparoli —

HEDDA

Sen pudoraj diskretaĵoj, sinjoro Løvborg? —

LØVBORG

Nu —

ELVSTED

(mallaŭte, sin kroĉante al **Hedda**) Ho, kiom feliĉa mi estas, Hedda! Ĉar, — imagu, — li diras, ke mi ankaŭ inspiris lin.

HEDDA

(rigardas ŝin ridetante) Aj, ĉu li tion diras?

LØVBORG

Kaj tian kuraĝon en agoj, kian ŝi havas, sinjorino Tesman?

ELVSTED

Ho, Dio, — *mi* kuraĝon!

LØVBORG

Treege — kiam temas pri la kamarado.

HEDDA

Jes, *kuraĝon* — ja! Se oni nur *tian* havus.

LØVBORG

Kaj kion do vi pensas?

HEDDA

Tiam oni povus eble ankoraŭ vivi la vivon. (subite ŝanĝiĝas) Sed nun, mia plej kara Tea,
— nun vi trinku glason da frida punĉo.

ELVSTED

Ne dankon, — mi neniam trinkas tiaĵojn.

HEDDA

Nu, do vi, sinjoro Løvborg.

LØVBORG

Dankon, ankaŭ mi ne.

ELVSTED

Ne, ankaŭ li ne!

HEDDA

(rigardas lin firme) Tamen ĉar mi nun tion volas?

LØVBORG

Neniel utilas.

HEDDA

(ridas) Mi do tute ne havas iun povon super vi, mi povrulino?

LØVBORG

Ne en *tiu* rilato.

HEDDA

Serioze dirite, mi tamen opinias ke vi devus tion fari. Pro vi mem.

ELVSTED

Ho ne, Hedda —!

LØVBORG

Kaj kial?

HEDDA

Aŭ pro la homoj, ĝuste dirite.

LØVBORG

Vere?

HEDDA

Alie oni povus ja ekhavi la opinion, ke vi — tiel funde — ne sentas vin sufiĉe hardita — ne sufiĉe certa pri vi mem.

ELVSTED

(mallaŭte) Ho, ne, ne, Hedda —!

LØVBORG

La homoj povas kredi, kion ili volas, — ĝis plue.

ELVSTED

(ĝoje) Jes, ĉu ne vere!

HEDDA

Tion ja montris klare la vizaĝo de asesoro Brack.

LØVBORG

Kiel do?

HEDDA

Li ridetis iom moke, kiam vi ne kuraĝis eniri tien al la tablo.

LØVBORG

Mi ne kuraĝis! Mi prefere volis ja resti ĉi tie kaj paroli kun vi.

ELVSTED

Estis ja tute kompreneble, Hedda.

HEDDA

Sed tion la asesoro ne povis suspekti. Kaj mi ankaŭ vidis, ke li ekridetis kaj ĵetis okulumon al Tesman, kiam vi eĉ ne kuraĝis kunveni al tiu povra, eta festeno.

LØVBORG

Kuraĝis! Vi diras ke mi ne kuraĝis?

HEDDA

Ne mi. Sed tiel asesoro Brack komprenis la staton.

LØVBORG

Lasu nur tion al li.

HEDDA

Vi do ne kuniros?

LØVBORG

Mi restos ĉe vi kaj Tea.

ELVSTED

Jes, Hedda, — tion vi ja povas pensi.

HEDDA

(ridetas kaj kapklinas aprobe al **Løvborg**) Do fundamente solide masonita. Principofirma por ĉiam. Jen kia devas esti viro! (turnas sin al **sinjorino Elvsted** kaj frapetas ŝin) Nu, ĉu mi ne tion diris, kiam vi, tute freneza, venis ĉi tien ĉimatene —

LØVBORG

(mirigita) Freneza!

ELVSTED

(terurigita) Hedda, — Hedda do —!

HEDDA

Jen, rigardu nur mem! Ne estas ja necese iri en tiu morta timo — (interrompante) Do, jen ni tri povas esti gajaj!

LØVBORG

(estas skuita) Aha, — kio do estas tio ĉi, sinjorino Tesman!

ELVSTED

Ho Dio, ho Dio, Hedda! Kion vi diras! Kion vi faras!

HEDDA

Restu nur trankvila! La abomena asesoro sidas vin observante.

LØVBORG

En morta timo, do. Pro mi.

ELVSTED

(mallaŭte, plende) Ho, Hedda, — nun vi igis min tute malfeliĉa!

LØVBORG

(rigardas ŝin dum momento fikse; grimacas) Do *tio* estis de la kamarado la senrezerva fido al mi.

ELVSTED

(petoplene) Ho, kara amiko, — vi devas unue aŭskulti —!

LØVBORG

(prenas unu el la plenaj punĉoglasoj, suprenlevas ĝin, kaj diras malrapide per raŭka voĉo) Via tosto, Tea! (li malplenigas la glason, demetas ĝin kaj prenas la alian)

ELVSTED

(mallaŭte) Ho, Hedda, Hedda, — kial vi tion volus!

HEDDA

Volus! Mi? Ĉu vi estas freneza?

LØVBORG

Kaj ankaŭ toston por vi, sinjorino Tesman. Dankon pro la vero. Ĝi vivu! (li trinkas kaj volas denove plenigi la glason)

HEDDA

(metas la manon sur lian brakon) Nu, nu, — ne pli nune. Memoru, ke vi iros en festenon.

ELVSTED

Ne, ne, ne!

HEDDA

Ŝ-ŝ! Ili sidas vin rigardante.

LØVBORG

(demetas la glason) Vi, Tea, — diru nun la veron.

ELVSTED

Jes!

LØVBORG

Ĉu la notario sciis, ke vi postvojaĝus min?

ELVSTED

(tordas siajn manojn) Ho, Hedda, — vi aŭdas pri kio li demandas!

LØVBORG

Ĉu estis interkonsento inter vi kaj li, ke vi vojaĝu al la urbo por observi min? Eble estis la notario mem, kiu igis vin tion fari? Aha, vi, — eble li denove bezonis min en la oficejo! Aŭ ĉu estas ĉe la kartotablo ke mi mankis al li?

ELVSTED

(mallaŭte, ĝemplende) Ho, Løvborg, Løvborg —!

LØVBORG

(prenas glason kaj volas ĝin plenigi) Ankaŭ tosto por la maljuna notario!

HEDDA

(lin deturnante) Ne pli nun. Memoru, ke vi eliru por legi por Tesman!

LØVBORG

(trankvile, demetas la glason) Estis stulte de mi, Tea, tio ĉi. Jen konduti tiel, mi pensas. Ne koleru pro mi, vi kara, kara kamarado. Vi vidos, — kaj vi kaj la aliaj, — ke kvankam mi iun fojon falis, do —. Nun mi restariĝis! Pere de *via* helpo, Tea.

ELVSTED

(ĝojbrile) Ho Dio, dankon —!

(**Brack** intertempe rigardis sian horloĝon. Li kaj **Tesman** ekstaras kaj venas en la salonon.)

BRACK

(prenas sian ĉapelon kaj mantelon) Jen, sinjorino Tesman, nun estas horo por foriri.

HEDDA

Nun do estas.

LØVBORG

(ekstaras) Ankaŭ por mi, sinjoro Asesoro.

ELVSTED

(mallaŭte kaj petante) Ho, Løvborg, — ne faru!

HEDDA

(pinĉas sian brakon) Ili aŭdas vin!

ELVSTED

(krias malforte) Aj!

LØVBORG

(al **Brack**) Vi bonvole invitis min kunveni.

BRACK

Jen, vi tamen venos?

LØVBORG

Jes, multan dankon.

BRACK

Por mi ĝojege —

LØVBORG

(ekprenas la paketon de paperoj kaj diras al **Tesman**) Ĉar mi dezirus montri al vi ion kaj aliaĵon antaŭ ol ĝin transdoni.

TESMAN

Jen, imagu, — estos amuze! — Sed kara Hedda, kiel vi hejmenirigos sinjorinon Elvsted? Ĉu?

HEDDA

Nu, por tio ni ĉiuokaze trovos rimedon.

LØVBORG

(rigardas la sinjorinojn) Sinjorino Elvsted? Kompreneble mi revenos por ŝin serĉi. (pli proksime) Proksimume je la deka, sinjorino Tesman? Ĉu tio konvenas?

HEDDA

Jes, certe. Ege konvene.

TESMAN

Nu, do ĉio estas en bona ordo. Sed min vi ne devas atendi tiom frue, Hedda.

HEDDA

Ho, kara, vi restu tiom longe — tiom longe, kiom vi volas.

ELVSTED

(en obtuza timo) Sinjoro Løvborg, — mi do restos ĉi tie, ĝis vi revenos.

LØVBORG

(kun la ĉapelo en la mano) Memkompreneble, Sinjorino.

BRACK

Kaj jen ekveturas la amuzad-trajno, miaj sinjoroj! Mi esperas, ke ni festenos vivece, kiel certa bela sinjorino diradas.

HEDDA

Aj, se la bela sinjorino povus ĉeesti nevidata —!

BRACK

Kial nevidata?

HEDDA

Por aŭskulti iujn el viaj spritaĵoj sen pudoraj diskretaĵoj, sinjoro Asesoro.

BRACK

(ridas) Tion mi ne volas konsili al la bela sinjorino.

TESMAN

(ankaŭ li ridas) Ne, nun vi estas amuza, Hedda. Jen, imagu!

BRACK

Nu, adiaŭ, adiaŭ, sinjorinoj!

LØVBORG

(kapklinas adiaŭe) Do je la deka.

(**Brack**, **Løvborg** kaj **Tesman** eliras tra la pordo de la antaŭĉambro. Samtempe **Berte** venas de la malantaŭa ĉambro kun eklumigita lampo, kiun ŝi metas sur la salontablon, kaj eliras la saman vojon.)

ELVSTED

(ekstaris kaj maltrankvile paŝas sur la planko) Hedda, — Hedda, — al kio tio ĉi kondukos!

HEDDA

Je la deka, — tiam li do revenos. Mi vizie vidas lin. Kun vitfolioj en la hararo. Verva kaj vigla —

ELVSTED

Dio donu ke tiel estos.

HEDDA

Kaj tiam, vidu, — tiam li estos regajninta la regadon de si mem. Tiam li estos libera homo dum ĉiuj siaj tagoj.

ELVSTED

Ho Dio, jes, — se nur tiel li venos, kiel vi lin vizias.

HEDDA

Tiel kaj ne alimaniere li venos! (ekstaras kaj sin proksimigas) Dubu pri li, vi, tiom longe kiom vi volas. Mi fidas lin. Kaj nun ni testu —

ELVSTED

Vi havas iun kaŝ-intencon, Hedda!

HEDDA

Jes, estas. Unu fojon en la vivo mi volas havi potencon sur la sorto de homo.

ELVSTED

Ĉu vi ne tion havas?

HEDDA

Ne havas — kaj neniam havis.

ELVSTED

Sed sur via edzo do?

HEDDA

Hoj, *tio* efektive valorus la penon. Ho, se vi povus kompreni, kiom malriĉa mi estas. Kaj *vi* havu la favoron esti tiom riĉa! (ĉirkaŭbrakas ŝin pasie) Mi pensas, ke mi tamen forbruligos viajn harojn.

ELVSTED

Lasu min! Lasu min! Mi timas vin, Hedda!

BERTE

(en la pordaperturo) La tetablo estas pretigita en la manĝoĉambro, Sinjorino.

HEDDA

Bone. Ni venos.

ELVSTED

Ne, ne, ne! Mi prefere iru hejmen sola! Tuj!

HEDDA

Sensencaĵo! Unue vi havu tiun teakvon, vi eta stultulino. Kaj poste, — Je la deka, — revenos Ejler Løvborg — kun vitfolioj en la hararo.

(Kvazaŭ perforte ŝi tiras **sinjorinon Elvsted** al la pordo.)

TRIA AKTO

(La ĉambro de **gesinjoroj Tesman**. La pordokurtenoj estas tiritaj antaŭ la aperturo. Tiel same antaŭ la vitra pordo. Sur la tablo la kerosenlampo kun ŝirmilo, meĉo malsuprenŝraŭbita, lumas malklare. En la forno, kies pordo estas malferma, estis fajro, kiu nun preskaŭ estingiĝis.)

(**Sinjorino Elvsted**, envolvita en granda ŝalo kaj kun la piedoj sur skabelo, sidas tute apud la forno, malantaŭenklinita en la apogseĝo. **Hedda** kuŝas vestita, dormante sur la sofo kun kovrilo sur si.)

ELVSTED

(post paŭzo, ekrektigas sin en la seĝo kaj aŭskultas atente. Poste, laca, ŝi denove malleviĝas kaj mallaŭte plendas) Ankoraŭ ne! — Ho Dio, — ho Dio, — ankoraŭ ne.

(**Berte** singardeme ŝteliras enen tra la pordo de la antaŭĉambro. Ŝi havas leteron en la mano.)

ELVSTED

(turnas sin kaj flustras maltrankvile) Nu, — ĉu iu venis?

BERTE

(mallaŭte) Jes, ĵus venis knabino kun tiu ĉi letero.

ELVSTED

(rapide, etendas la manon) Letero! Donu al mi!

BERTE

Ne, ĝi estas por la doktoro, Sinjorino.

ELVSTED

Nu tiel.

BERTE

Estis la servistino de fraŭlino Tesman, kiu alportis ĝin. Mi metos ĝin ĉi tien sur la tablon.

ELVSTED

Jes, tion faru.

BERTE

(demetas la leteron) Estas plej bone, ke mi estingu la lampon. Ĝi fumas.

ELVSTED

Jes, estingu. Baldaŭ fariĝos taglumo.

BERTE

(estingas) Jam estas taglumo, Sinjorino.

ELVSTED

Jes, hela tago! Kaj ankoraŭ ne hejmenveninta —!

BERTE

Ho, Dio, — mi pensis ke tiel okazus.

ELVSTED

Vi tion pensis?

BERTE

Jes, kiam mi vidis ke certa viro estas reveninta al la urbo, tiam —. Kaj ilin kuntiris.
Ĉar pri tiu sinjoro oni ja aŭdis sufiĉe antaŭ iom da tempo.

ELVSTED

Ne tiom laŭte parolu. Vi vekas Sinjorinon.

BERTE

(rigardas al la sofo kaj suspiras) Ne, Dio, — lasu ŝin nur dormi, kompatindulinon. — Ĉu mi metu ion pli en la fornon?

ELVSTED

Dankon, ne por mi.

BERTE

Jen do. (ŝi malrapide eliras tra la pordo de la antaŭĉambro)

HEDDA

(vekiĝas pro la fermo de la pordo kaj suprenrigardas) Kio estas —!

ELVSTED

Estis nur la servistino —

HEDDA

(ĉirkaŭrigardas) Ha, jen en la salono —! Jes nun mi ja memoras — (rektigas sin, sidanta sur la sofo, streĉas sin kaj frotas siajn okulojn) Kioma horo estas, Tea?

ELVSTED

(rigardas sian horloĝon) Ĝi jam pasis la sepan.

HEDDA

Kiam revenis Tesman?

ELVSTED

Li ankoraŭ ne revenis.

HEDDA

Ankoraŭ ne hejmenvenis?

ELVSTED

(ekstaras) Eĉ ne unu revenis.

HEDDA

Kaj ni, kiuj sidis ĉi tie maldormante kaj atendante ĝis la kvara —

ELVSTED

(tordas la manojn) Kaj *tiel* kiel mi lin atendis!

HEDDA

(oscedas kaj diras kun la mano kovrante la buŝon) Ho jes, — pro tio ni estus nin ŝparintaj.

ELVSTED

Ĉu vi iom dormis poste?

HEDDA

Ho jes, Mi opinias, ke mi dormis sufiĉe bone. Ĉu vi ne?

ELVSTED

Eĉ ne momenton. Mi ne povis, Hedda. Estis tute neeble por mi.

HEDDA

(ekstaras kaj proksimiĝas al ŝi) Nu, nu, nu! Ne estas kaŭzo por maltrankvilo. Mi bone komprenas kiel statas.

ELVSTED

Jes, kaj kion vi do kredas? Ĉu vi povas al mi diri?

HEDDA

Nu, kompreneble tre longe daŭris ĉe la asesoro —

ELVSTED

Ho Dio, jes, — certe daŭris. Sed tamen —

HEDDA

Kaj jen, vidu, tiam Tesman ne volis hejmenveni kaj fari bruon kaj sonorigi meze dum la nokto. (ridas) Eble li ankaŭ ne volis montri sin — tia ĵus post viveca festeno.

ELVSTED

Sed kara, — kien li do estus irinta?

HEDDA

Kompreneble li iris al la onklinoj kaj sin kuŝigis *tie*. Ili havas ja lian antaŭan ĉambron atendanta.

ELVSTED

Ne, ĉe *ili* li ne povas esti. Ĉar ĵus venis letero al li de fraŭlino Tesman. Jen ĝi kuŝas.

HEDDA

Ĉu? (rigardas la surskribon) Jes, vere estas de onklino Julle propramane. Nu, do li kompreneble restas ĉe la asesoro. Kaj Ejler Løvborg, li sidas legante kun vitfolioj en la hararo.

ELVSTED

Ho Hedda, vi nur paroladas kaj diras ion pri kio vi mem ne kredas.

HEDDA

Vi vere estas stulta, Tea.

ELVSTED

Ho ja, bedaŭrinde, mi do eble tia estas.

HEDDA

Kaj kiel morte laca vi aspektas.

ELVSTED

Jes, mi vere *estas* morte laca.

HEDDA

Nu, tial vi faru, kiel mi diras. Iru en mian ĉambron kaj kuŝigu vin tempeton sur mia lito.

ELVSTED

Ho ne, ne, — mi tamen ne kapablas dormi.

HEDDA

Certe vi kapablas.

ELVSTED

Sed via edzo certe estos baldaŭ revenanta. Kaj jen mi devas tuj scii —

HEDDA

Mi atentigos vin, kiam li revenos.

ELVSTED

Do, vi tion promesas, Hedda?

HEDDA

Jes, tion vi povas fidi. Nur eniru kaj dormu dume.

ELVSTED

Dankon. Do mi tion provu. (ŝi iras tra la malantaŭa ĉambro)

(**Hedda** iras al la vitra pordo kaj flankentiras la kurtenojn. Hela taglumo ŝutiĝas en la salonon. Poste ŝi prenas de la skribotablo malgrandan manspegulon, rigardas sin en ĝi kaj ordigas la harojn. Ŝi iras al la pordo de la antaŭĉambro kaj premas la butonon de la sonorilo.)

(**Berte** iom poste envenas tra la pordo.)

BERTE

Ĉu Sinjorino ion deziras?

HEDDA

Jes, bonvole metu ion pli en la fornon. Mi ja vere frostadas.

BERTE

Jes brr, — tuj kaj senprokraste estu varme.

(Ŝi kunrastas la ardaĵojn kaj enmetas lignopecon.)

BERTE

(haltas kaj aŭskultas) Nun oni sonorigas ĉe la ĉefpordo, Sinjorino.

HEDDA

Do eliru, kaj malfermu. Mi mem okupiĝu pri la forno.

BERTE

Baldaŭ ekflamos. (ŝi eliras tra la antaŭĉambra pordo)

(**Hedda** genuas sur la skabelon kaj metas plurajn lignopecojn en la fornon.)

(Post mallonga daŭro **Jørgen Tesman** envenas de la antaŭĉambro. Li aspektas laca kaj iom serioza. Ŝteliras piedpinte direkte al la pordaperturo, kaj volas engliti inter la kurtenojn.)

HEDDA

(apud la forno, ne suprenrigardante) Bonan matenon.

TESMAN

(turnas sin) Hedda! (proksimiĝas) Sed kara vi, — tiom frue ellitiĝinta! Ĉu?

HEDDA

Jes, mi tre frue ellitiĝis hodiaŭ.

TESMAN

Kaj mi, kiu estis certa, ke vi ankoraŭ kuŝus dormante! Jen imagu, Hedda!

HEDDA

Ne parolu tiom laŭte. Sinjorino Elvsted kuŝas ene ĉe mi.

TESMAN

Sinjorino Elvsted, ĉu ŝi restis dum la nokto?

HEDDA

Jes, neniuj ja venis por ŝin serĉi.

TESMAN

Ne, do neniuj faris.

HEDDA

(fermas la pordon de la forno kaj ekstaras) Nu, ĉu estis tiom amuze ĉe la asesoro?

TESMAN

Ĉu vi estis timoplena pro mi? Ĉu?

HEDDA

Ne, pri tio mi eĉ ne momenton pensis. Sed mi demandis, ĉu vi bone amuziĝis.

TESMAN

Jes vere. Tiun ĉi fojon, do —. Sed pleje en la komenco, ŝajnas al mi. Ĉar tiam Ejler legis por mi. Ni alvenis ja pli ol horon tro frue, — jen imagu! Kaj Brack tiom okupiĝis pri la aranĝo. Sed dume Ejler legis.

HEDDA

(eksidis dekstre de la tablo) Nu? Rakontu —

TESMAN

(eksidas sur skabelon ĉe la forno) Sciu, Hedda, neblas por vi imagi, kia verko tiu fariĝos!
Certe estas io el la plej rimarkinda skribita. Jen imagu!

HEDDA

Ja, ja, tio ne interesas min —

TESMAN

Mi devas ion konfesi al vi, Hedda. Kiam li estis leginta, — io malica kreskis en mi.

HEDDA

Io malica?

TESMAN

Mi sidis kaj enviis Ejler, ke li kapablis skribi tiaĵon. Jen imagu, Hedda!

HEDDA

Jes, ja, mi ja imagas!

TESMAN

Kaj scii ke li, — tiel naturdotita — bedaŭrinde tamen estas neplibonigebla.

HEDDA

Ĉu vi ne sugestas, ke li havas pli da vitaleco ol la aliaj?

TESMAN

Ne, bona Dio —. Jen vidu, li tute ne povas moderigi sin meze en la ĝuo.

HEDDA

Kaj en kio rezultiĝis ĉio — fine?

TESMAN

Nu, mi trovas, ke vere estis bakanalo, Hedda.

HEDDA

Ĉu li havis vitfoliojn en la hararo?

TESMAN

Vitfoliojn? Ne, tion mi eĉ ne videtis. Sed li donis longan, konfuzan paroladon por la virino, kiu inspiris lin dum la laboro. Ja, tiel li sin esprimis.

HEDDA

Ĉu li nomis ŝin?

TESMAN

Ne, tion li ne faris. Sed mi ne povas imagi, ke estus iu alia ol sinjorino Elvsted.

HEDDA

Nu, — kie vi disiĝis de li?

TESMAN

Sur la vojo hejmen. Ni ekiris, — la lastaj de ni, — samtempe. Kaj Brack ankaŭ kuniris por spiri freŝan aeron. Kaj jen, vidu, ni decidis akompani Ejlert hejmen. Jes, ĉar li estis ja vere supersarĝita!

HEDDA

Do li estis.

TESMAN

Sed nun vi aŭdu la plej rimarkindan, Hedda! Aŭ la bedaŭrindan mi estus prefere dirinta. Ho, — mi preskaŭ hontas — pro Ejlert — tion rakonti —

HEDDA

Jen do —?

TESMAN

Nu, dum ni tiel iris laŭvoje, vidu, jen mi hazarde iom malantaŭiĝis. Nur kelkajn minutojn, — jen imagu!

HEDDA

Jes, ja, Dio, sed —?

TESMAN

Kaj kiam mi rapidas post la aliajn, jen, ĉu vi scias, kion mi trovas ĉe la vojrandoj? Ĉu?

HEDDA

Ne, kiel mi povus tion scii!

TESMAN

Nepre ne tion al iu ajn diru, Hedda. Atentu bone! Promesu al mi pro Ejlert. (tiras paketon en papervolvajo el la poŝo de la mantelo) Jen, imagu, — tion ĉi mi trovis.

HEDDA

Ĉu ne estas la paketo, kiun li kunportis ĉi tien hieraŭ?

TESMAN

Jes, ĝuste, estas lia valora, unika manuskripto! Kaj tiun li tie promenante perdis — sen tion rimarki. Jen nur imagu, Hedda! Kiom bedaŭrinde —

HEDDA

Sed kial do vi ne tuj redonis al li la paketon?

TESMAN

Ne, tion mi ne kuraĝis — pro lia tiama stato —

HEDDA

Ĉu vi eĉ ne diris al iuj el la aliaj, ke vi ĝin trovis?

TESMAN

Ho, tute ne. Kompreneble ke tion mi ne volis fari respektate al Ejler.

HEDDA

Do estas neniu, kiu scias, ke vi havas la manuskripton de Ejler Løvborg?

TESMAN

Ne, kaj tion ankaŭ neniu sciu.

HEDDA

Kaj poste, pri kio vi kun li interparolis?

TESMAN

Mi ne plu havis ŝancon kun li paroli. Ĉar kiam ni venis en la stratojn, tiam li kaj du aŭ tri aliaj tute malaperis por ni. Jen imagu!

HEDDA

Nu? Ili do akompanis lin hejmen.

TESMAN

Jes, aspekte ili tion faris. Kaj ankaŭ Brack foriris.

HEDDA

Kaj kien vi poste stumblis?

TESMAN

Jen, mi kaj kelkaj el la aliaj, ni akompanis unu el la vivecaj uloj, kaj trinkis matenkafon tie ĉe li. Aŭ pli ĝuste nomi ĝin noktokafo. Ĉu? Sed kiam mi nun estos iom

ripozinta — kaj kiam mi opinios ke Ejler, la kompatindulo, satdormis, tiam mi devos iri al li kun tio ĉi.

HEDDA

(etendas la manon por la paketo) Ne, — ne transdonu ĝin! Ne tuj, mi diras. Lasu min legi ĝin unue.

TESMAN

Ne, kara, bona Hedda, je Dio, tion mi ne kuraĝas.

HEDDA

Vi ne kuraĝas?

TESMAN

Ne, — ĉar vi bone povas imagi, kiom malespera li fariĝos, kiam li vekiĝas, kaj mankas al li la manuskripto. Ĉar sciu ke li ne havas kopion! Tion li mem diras.

HEDDA

(rigardas lin kvazaŭ esplorante) Kaj tiaĵon oni ne povas denove skribi? Ankoraŭ fojon, ĉu?

TESMAN

Tio neniam eblus, mi kredas. Ĉar la inspiro, — jen vidu —

HEDDA

Jes, ja, — ĝuste tiel do estas — (pasante) Sed mi memoras, — jen letero por vi.

TESMAN

Ĉu, imagu —!

HEDDA

(ĝin donante) Venis frue ĉi-matene.

TESMAN

De onklino Julle. Kio do estas? (metas la paketon sur la alian skabelon, malfermas la leteron, trakuras ĝin kaj eksaltas)

TESMAN

Ho Hedda, — ŝi skribas, ke la bedaŭrinda onklino Rina kuŝas ĉe la morto!

HEDDA

Tion oni devus ja atendi.

TESMAN

Kaj se mi dezirus ankoraŭ fojon vidi ŝin, mi devas rapidi. Mi tuj kuros tien.

HEDDA

(subpremas rideton) Vi eĉ volas kuri?

TESMAN

Ho, plej kara Hedda, — se vi povus decidigi vin kuniri! Jen imagu!

HEDDA

(ekstaras kaj diras lace kaj repuŝante) Ne, ne; ne petu min pri tiaĵo. Mi ne volas vidi malsanon kaj morton. Ne trudu al mi ion malbelan.

TESMAN

Nu, Dio do —! (ĉirkaŭkuras) Mian ĉapelon —? Mian mantelon —? Nu, en la antaŭĉambro —. Mi kore esperas, ke mi ne venos tro malfrue, Hedda? Ĉu?

HEDDA

Ho, nur kuru, kaj —

(**Berte** venas ĉe la pordo de la antaŭĉambro.)

BERTE

Asesoro Brack staras ekstere, kaj demandas ĉu li povus enveni.

TESMAN

Je tiu ĉi tempo! Ne, nun ne eblas por mi akcepti lin.

HEDDA

Sed mi povas. (al **Berte**) Petu la asessoron enveni. (**Berte** eliras)

HEDDA

(rapide fluŝtrante) La paketon, Tesman! (ŝi prenas ĝin de la skabelo)

TESMAN

Jes, donu ĝin al mi!

HEDDA

Ne, ne, mi kaŝos ĝin por vi dume.

(Ŝi iras al la skribotablo, kaj metas ĝin en la librobretton. **Tesman** penas pro urĝeco kaj ne kapablas surtiri la gantojn.)

(**Asesoro Brack** envenas de la antaŭĉambro.)

HEDDA

(kapklinas al li) Nu, vi ja estas frumatena birdo.

BRACK

Jes, vi trovas, ĉu ne? (al **Tesman**) Ĉu ankaŭ vi eliros?

TESMAN

Jes, mi nepre devas viziti la onklinojn. Imagu, — la malsana, ŝi kuŝas ĉe la morto, la bedaŭrinda.

BRACK

Nu Dio, ĉu tiel? Sed jen ne lasu min reteni vin. En tia serioza momento —

TESMAN

Jes, mi vere devas kuri —. Adiaŭ! Adiaŭ!

(Li rapidas eksteren tra la antaŭĉambra pordo.)

HEDDA

(proksimiĝas) Aspekto estis pli ol vivece hejme ĉe vi ĉi tiun nokton, sinjoro Asesoro.

BRACK

Mi eĉ ankoraŭ ne ŝanĝis vestojn, sinjorino Hedda.

HEDDA

Ankaŭ vi ne?

BRACK

Ne, kiel vi vidas. Sed kion Tesman rakontis pri la noktaj travivaĵoj?

HEDDA

Oho, ion tedegan. Nur ke ili ie eniris kaj trinkis kafon.

BRACK

Pri tiu kafokunveno mi jam estas informita. Tie Ejler Lønborg ne partoprenis, mi opinias?

HEDDA

Ne, antaŭe ili jam akompanis lin hejmen.

BRACK

Ankaŭ Tesman?

HEDDA

Ne, sed kelkaj aliaj, li diris.

BRACK

(ridetas) Jørgen Tesman vere estas naiva animo, sinjorino Hedda.

HEDDA

Jes, Dio scias ke li estas. Sed ĉu io kaŝiĝas en la afero?

BRACK

Jes, via suspekto ne estas senfunda.

HEDDA

Nu jen! Eksidu, kara Asesoro. Tiel vi rakontos pli bone.

(Ŝi eksidas maldekstre de la tablo. **Brack** ĉe la longa flanko de la tablo proksime al ŝi.)

HEDDA

Nu jen, do?

BRACK

Mi havis apartajn kialojn por postsekvi la vojojn de miaj gastoj — aŭ pli ĝuste dirite, de kelkaj el miaj gastoj ĉi-nokte.

HEDDA

Kaj inter ili eble estis ankaŭ Ejler Løvborg?

BRACK

Mi devas konfesi — li estis.

HEDDA

Nun vi vere igas min scivolema —

BRACK

Ĉu vi scias, kie li kaj kelkaj el la aliaj pasigis la reston de la nokto, sinjorino Hedda?

HEDDA

Se decas tion rakonti, jen faru.

BRACK

Kompreneble, decas rakonti. Nu, ili vizitis neordinare animitan vesperkunvenon.

HEDDA

De la pasia speco?

BRACK

De la plej pasia speco.

HEDDA

Iom pli pri tio ĉi, Asesoro —

BRACK

Løvborg estis antaŭe invitita, ankaŭ ili. Mi pri tio estis bone informita. Sed tiam li rifuzis veni. Ĉar nun li ja surmetis novan homecon, kiel vi scias.

HEDDA

Tie norde ĉe la notario Elvsted. Sed li tamen iris?

BRACK

Jes, vidu, sinjorino Hedda, — jen, bedaŭrinde, ĉe mi vizitas lin la genio ĉivespere —

HEDDA

Jes, tie li ja inspiriĝis, mi aŭdas.

BRACK

Treege inspiriĝis. Nu, jen li ekhavis alian ideon, mi opinias. Ĉar ni virhomoj, bedaŭrinde ne ĉiam estas tiom principfirmaj kiom ni devus esti.

HEDDA

Nu, vi mem ja estas escepto, asesoro Brack. Sed jen pri Løvborg —?

BRACK

Jes, mallonge, — la fino estis, ke li alvenis en la salonojn de fraŭlino Diana.

HEDDA

De fraŭlino Diana?

BRACK

Estis fraŭlino Diana, kiu prezentis la vesperkunvenan programon. Por elektita rondo de amikinoj kaj admirantoj.

HEDDA

Ĉu tiu estas iu ruĝhara?

BRACK

Ĝuste.

HEDDA

Iu tia — kantistino?

BRACK

Nu ja, — ankaŭ tio. Kaj krome ega ĉasistino — de sinjoroj, — sinjorino Hedda. Vi certe aŭdis pri ŝi. Ejler Løvborg estis unu el ŝiaj plej varmaj protektantoj — en siaj pli prosperaj jaroj.

HEDDA

Kaj kiel tio ĉi finiĝis?

BRACK

Ne tre amikece, aspektas. Fraŭlino Diana verŝajne de la plej kortuŝa akcepto transiris al luktado —

HEDDA

Kontraŭ Løvborg?

BRACK

Jes. Li kulpigis ŝin aŭ la amikinojn, ke ili priŝtelis lin. Li pretendis, ke lia poŝbileto malaperis. Kaj ankaŭ aliaj aĵoj. Mallonge, li estus farinta teruregan tumulton.

HEDDA

Kaj en kion rezultis tio?

BRACK

Tio rezultis en komunan bataladon inter kaj sinjorinoj kaj sinjoroj. Feliĉe fine alvenis la polico.

HEDDA

Ĉu ankaŭ la polico?

BRACK

Jes. Sed tio certe fariĝos multekosta ŝerco por Ejler Løvborg, tiu freneza homo.

HEDDA

Nu!

BRACK

Laŭdire li senbride kontraŭstaris. Li estus frapinta unu el la policistoj sur la orelon kaj disŝirinta lian mantelon. Jen li sekve estis kondukata al la stacio.

HEDDA

De kie vi nun sciiĝis pri tio?

BRACK

De la polico mem.

HEDDA

(rigardas penseme antaŭen) Tiel do ĉio okazis. Kaj sekve li ne havis vitfoliojn en la hararo.

BRACK

Vitfoliojn, sinjorino Hedda?

HEDDA

(ŝanĝas voĉtonon) Sed diru al mi nun, Asesoro, — kial vi do tiel postsekvas kaj kaŝobservas Ejler Løvborg?

BRACK

Unue ne estas tute indiferece por mi se informiĝos dum la ekzamenadoj, ke li venis rekte de mi.

HEDDA

Ĉu ankaŭ fariĝos ekzamenoj?

BRACK

Kompreneble. Cetere tio estu kiel tio estas. Sed mi opinias, ke mi, kia amiko de la familio, devis havigi al vi kaj al Tesman kompletan informon pri liaj noktaj heroaĵoj.

HEDDA

Kial vere tion, asesoro Brack?

BRACK

Nu, ĉar mi havas vivan suspekton, ke li volas uzi vin kiel ian ŝirmilon.

HEDDA

Ĉu, sed kial povas vi imagi tiaĵon!

BRACK

Ho Dio, — ni ja ne estas blindaj, sinjorino Hedda. Atentu nur! Tiu sinjorino Elvsted, verdire ŝi certe ne forlasos la urbon tiom frue.

HEDDA

Nu, ĉu estus io inter tiuj du, jen estas multaj aliaj lokoj, kie ili povos renkontiĝi.

BRACK

Neniu hejmo. Ĉiuj decaj domoj estos de nun denove fermitaj por Ejler Løvborg.

HEDDA

Kaj tia ankaŭ la mia devas esti, vi opinias?

BRACK

Jes. Mi konfesas, ke estus por mi pli ol ĝene, se tiu sinjoro estus enlasita ĉi tien. Se li, kia superflua — kaj entrudulo — sin enŝovus en —

HEDDA

En la triangulon?

BRACK

Ĝuste. Estus por mi same kiel fariĝi senhejma.

HEDDA

(rigardas lin ridetante) Do, — sola koko en la korto, — tio estas via celo.

BRACK

(kapklinas malrapide kaj malaltigas la voĉon) Jes, estas mia celo. Kaj por tiu celo mi batalos — kun ĉiuj rimedoj, pri kiuj mi disponas.

HEDDA

(perdante sian rideton) Aspekto vi estas danĝera homo, — kiam temas pri realigo.

BRACK

Vi tion opinias?

HEDDA

Jes, mi nun komencas tion kredi. Kaj mi estas kore ĝoja — tiom longe, ke vi ne potencas super mi.

BRACK

(ridas dusence) Ja-ja, sinjorino Hedda, — vi eble pravas pri tio. Kiu scias, ĉu mi okaze ne estus viro por elpensi eĉ ion kaj alian.

HEDDA

Do, sed aŭskultu nun, asesoro Brack! Aspektas ja kvazaŭ vi sidas tie minacante.

BRACK

(ekstaras) Ho, tute ne! La triangulo, vidu, — ĝi prefere fortikiĝu kaj defendiĝu libervole.

HEDDA

Tion ankaŭ mi opinias.

BRACK

Jen mi do diris kion mi deziras. Kaj mi nun ree devas trovi la vojon urben. Adiaŭ, sinjorino Hedda!

(Li iras al la vitra pordo.)

HEDDA

(ekstaras) Vi iras tra la ĝardeno?

BRACK

Jes, por mi estas pli mallonge.

HEDDA

Jes, kaj krome estas ja vojo kaŝa.

BRACK

Tute ĝuste. Mi ne estas kontraŭ kaŝaj vojoj. Foje ili povas esti sufiĉe pikantaj.

HEDDA

Kiam oni pafas per kugloj, vi opinias?

BRACK

(ĉe la pordo, ridas al ŝi) Ho, oni vere ne pafas siajn dresitajn kortkokojn!

HEDDA

(ankaŭ ŝi ridas) Ho ne, kiam oni ne havas pli ol unu solan, —

(Ili kapsalutas adiaŭe, sub ridado. Li foriras. Ŝi fermas la pordon post li.)

(**Hedda** staras momenton serioze rigardante eksteren. Poste ŝi iras kaj rigardas tra la kurteno de la fona muro. Ŝi iras al la skribotablo, prenas la paketon de **Løvborg** el la librobretaro kaj volas foliumi la paperojn. La laŭta voĉo de **Berte** aŭdiĝas de la antaŭĉambro. **Hedda** turnas sin kaj aŭskultas. Rapide ŝi metas la paketon en la tirkeston, ŝlosas kaj metas la ŝlosilon sur la skribilaron.)

(**Ejlert Løvborg** en mantelo kaj kun ĉapelo en la mano, tirmalfermas la pordon de la antaŭĉambro. Li aspektas freneze kaj ekscitite.)

LØVBORG

(turnita al la pordo de la antaŭĉambro) Kaj mi diras al vi, ke mi devas kaj volas eniri! Jen do!

(Li fermas la pordon, turnas sin, vidas **Hedda**, regas sin tuj kaj salutas.)

HEDDA

(ĉe la skribotablo) Nu, sinjoro Løvborg, estas ege malfrue ke vi venas serĉi Tea.

LØVBORG

Aŭ ege frue ke mi envenas ĉe vi. Mi petas vin pardoni.

HEDDA

Kiel vi scias, ke ŝi daŭre estas ĉe mi?

LØVBORG

Oni diris en ŝia loĝejo, ke ŝi estis ekstere la tutan nokton.

HEDDA

(iras al la salona tablo) Ĉu vi povis ion rimarki en la mienoj, kiam ili tion diris?

LØVBORG

(rigardas ŝin demande) Rimarki en la mienoj?

HEDDA

Mi aludas, ĉu aspektis, kvazaŭ ili pensus ion aŭ iel pri tio?

LØVBORG

(subite komprenas) Ho jes, tiel ja estas! Mi tiras ŝin malsupren kun mi! Cetere mi nenion povis rimarki. — Tesman eble ankoraŭ ne ellitiĝis?

HEDDA

Ne, — mi ne kredas —

LØVBORG

Kiam li hejmenvenis?

HEDDA

Tre malfrue.

LØVBORG

Ĉu li ion al vi rakontis?

HEDDA

Jes, mi aŭdis ke estis sufiĉe viklece ĉe asesoro Brack.

LØVBORG

Nenion pli?

HEDDA

Ne, mi kredas ke ne. Krome mi estis tiel ege dormema —

(**SinJORINO Elvsted** envenas tra inter la kurtenoj sur la fona muro.)

ELVSTED

(proksimiĝas al li) Ho, Løvborg! Fine —!

LØVBORG

Jes, fine. Kaj tro malfrue.

ELVSTED

(rigardas lin en timo) Kio estas tro malfrue!

LØVBORG

Nun ĉio estas tro malfrue. Pri mi estas finite.

ELVSTED

Ho ne, ne, — tion ne diru!

LØVBORG

Vi mem diros la samon, kiam vi aŭdos —

ELVSTED

Mi volas nenion aŭdi!

HEDDA

Vi eble deziras paroli kun ŝi sola? Ĉar do mi foriros.

LØVBORG

Ne, restu, — ankaŭ vi. Mi petas vin pri tio.

ELVSTED

Jes, sed mi nenion volas aŭdi, mi diras!

LØVBORG

Ne estas pri la noktaj travivaĵoj, ke mi volas paroli.

ELVSTED

Pri kio do —?

LØVBORG

Estas pri tio, ke niaj vojoj devas nun disiĝi.

ELVSTED

Disiĝi!

HEDDA

(senvole) Mi tion sciis!

LØVBORG

Ĉar mi ne plu bezonas vin, Tea.

ELVSTED

Kaj jenon vi povas diri! Ne plu bezonas min! Mi ja helpas vin nun kiel antaŭe?
Kompreneble ni daŭre kunlaboru?

LØVBORG

De nun mi ne plu intencas labori.

ELVSTED

(rezigne) Por kio mi do uzu mian vivon?

LØVBORG

Vi devas provi vivi, kvazaŭ vi neniam konis min.

ELVSTED

Sed tion mi ja ne kapablas!

LØVBORG

Provu ĉu vi kapablas, Tea. Vi devas revojaĝi hejmen —

ELVSTED

(ribele) Neniam en tiu ĉi mondo! Kie vi estas, tie ankaŭ mi deziras esti! Mi ne lasas min tiel forpeliĝi! Mi volas esti ĉi tie! Esti kune kun vi, kiam la libro eldoniĝos.

HEDDA

(duonlaŭte, en streĉa atento) Ho, la libro, — jes!

LØVBORG

(rigardas ŝin) La libro mia kaj de Tea. Ĉar *tia* ĝi estas.

ELVSTED

Jes, tia mi sentas, ke ĝi estas. Kaj tial mi ankaŭ rajtas esti ĉe vi, kiam ĝi venos! Mi volas vidi, ke denove ŝutiĝas estimo kaj honoro super vin. Kaj la ĝojo, — la ĝojo, tiun mi volas dividi kun vi.

LØVBORG

Tea, — nia libro neniam eldoniĝos.

HEDDA

Aj!

ELVSTED

Ne eldoniĝos!

LØVBORG

Neniam eldoniĝos.

ELVSTED

(en timema suspekto) Løvborg, — kien vi formetis la kajerojn!

HEDDA

(rigardas lin atente) Jes, la kajerojn —?

ELVSTED

Kie vi havas ilin!

LØVBORG

Ho, Tea, — prefere ne demandu min pri tio.

ELVSTED

Jes, jes, mi volas tuj ekscii. Mi rajtas tion tuj ekscii.

LØVBORG

La kajerojn — Nu do, — la kajerojn, tiujn mi disŝiris en mil pecojn.

ELVSTED

(krias) Ho ne, ne —!

HEDDA

(senvole) Sed tio ja tute ne —!

LØVBORG

(rigardas ŝin) Ne vero, vi opinias?

HEDDA

(regas sin) Nu jes. Kompreneble. Ĉar vi mem tion diras. Sed ŝajnis al mi nekredeble —

LØVBORG

Tamen vero.

ELVSTED

(tordas la manojn) Ho Dio, — ho Dio, Hedda, — disŝiris sian propran verkon.

LØVBORG

Mi disŝiris mian propran vivon. Sekve mi ankaŭ povis disŝiri mian vivoverkon —

ELVSTED

Kaj tion vi do faris ĉinokte!

LØVBORG

Jes, aŭdu. En mil pecojn. Kaj ŝutis ilin en la fjordon. Tre fore. Tie almenaŭ estas freŝa salakvo. Lasu ilin flosi en ĝi. Flosi laŭ fluo kaj vento. Kaj post ioma tempo ili subakviĝos. Pli kaj pli profunden. Kiel mi, Tea.

ELVSTED

Sciu do, Løvborg, ke tio pri la libro —. Ĉiujn miajn tagojn tio staros antaŭ mi, kvazaŭ vi mortigus etan infanon.

LØVBORG

Vi pravas. Estas kvazaŭ infanmortigo.

ELVSTED

Sed kiel vi do povis —! Ankaŭ mi havis ja mian parton de la infano.

HEDDA

(preskaŭ senvoĉe) Ho, la infano —

ELVSTED

(spiras peze) Do, finite. Ja, ja, nun mi foriros, Hedda.

HEDDA

Sed vi tamen ne forvojaĝos?

ELVSTED

Ho, mi ne mem scias, kion mi faros. Nun ĉio antaŭ mi estas mallumo.

(Ŝi eliras tra la pordo de la antaŭĉambro.)

HEDDA

(Hedda staras, iom atendente) Vi do ne volas akompani ŝin hejmen, sinjoro Løvborg?

LØVBORG

Mi? Tra la stratoj? Do la homoj vidus, ke ŝi irus kune kun mi?

HEDDA

Mi ja ne scias, kio cetere okazis ĉi-nokte. Sed ĉu do estas tiom tute neripareble?

LØVBORG

Tiu ĉi nokto ne restos la sola. Tion mi certe scias. Sed ankaŭ estas *tio*, ke mi eĉ ne emas plu vivi tian vivon. Ne nun denove. Estas la vivo forto kaj necedemo, kiujn ŝi rompis en mi.

HEDDA

(rigardas penseme antaŭen) La dolĉa, eta stultulino fingrumis homan sorton. (rigardas lin) Sed tamen kial vi povis esti tiom senkora kontraŭ ŝi?

LØVBORG

Ho, ne diru, ke mi estis senkora!

HEDDA

Tiel detruu tion, kio plenigis ŝian animon dum longaj, longaj tempoj! Tion vi ne nomas senkora!

LØVBORG

Al vi mi povas diri la veron, Hedda.

HEDDA

La veron?

LØVBORG

Unue promesu al mi, — donu al mi vian promeson, ke tio, kion mi nun konfidas al vi, pri tio Tea neniam sciiĝu.

HEDDA

Jen mia promeso.

LØVBORG

Bone. Do mi volas diri al vi, ke ne estas vero, kion mi al ŝi rakontadis.

HEDDA

Tio pri la kajeroj?

LØVBORG

Jes. Mi ne disŝiris ilin. Ankaŭ ne ĵetis ilin en la fjordon.

HEDDA

Ne, ne — sed kie do ili estas?

LØVBORG

Mi tamen detruis ilin. Funde kaj efike, Hedda!

HEDDA

Tion ĉi mi ne komprenas.

LØVBORG

Tea diris, ke tio, kion mi faris, al ŝi estas kvazaŭ infanmortigo.

HEDDA

Jes, — tion ŝi diris.

LØVBORG

Sed mortigi sian infanon, — ne estas la plej fia, kion patro povas fari kontraŭ ĝi.

HEDDA

Tio ne la plej fia?

LØVBORG

Ne, sed aŭdi la plej fian, de tio mi volis ŝpari Tea.

HEDDA

Kaj kio do estas tio, la plej fia?

LØVBORG

Imagu nun, Hedda, ke viro, — tiel je frua matena horo, — post freneza, diboĉega nokto revenis hejmen al la patrino de sia infano kaj diris: Jen aŭdu — tie mi estis kaj tie. En tiuj kaj tiuj lokoj. Kaj mi kunprenis nian infanon. En tiajn kaj tiajn lokojn. La

infano por mi perdiĝis. Tute perdiĝis. Diablo scias en kies manojn ĝi falis. Kies manoj kaptis ĝin.

HEDDA

Ho, — sed finfine tio — ĉi tio estis ja nur libro —

LØVBORG

La pura animo de Tea estis en tiu libro.

HEDDA

Jes, mi komprenas.

LØVBORG

Kaj tial vi ja ankaŭ komprenas, ke inter ŝi kaj mi neniue estonteco estas.

HEDDA

Kaj kiun vojon vi nun iros?

LØVBORG

Neniun. Nur aranĝi pri fino de ĉio. Ju pli frue, des pli bone.

HEDDA

(paŝon pli proksimen) Ejler Løvborg, — jen aŭskultu — Ĉu vi ne povus aranĝi, ke — ke okazos en beleco?

LØVBORG

En beleco? (ridetas) Kun vitfolioj en la hararo, kiel vi en pli fruaj tagoj imagis —

HEDDA

Ho ne. La vitfolioj, — je tiuj mi ne plu kredas. Sed tamen en beleco! Unu solan fojon! — Adiaŭ! Foriru nun. Kaj ne pli ofte revenu.

LØVBORG

Adiaŭ, sinjorino. Kaj salutu Jørgen Tesman de mi. (li volas foriri)

HEDDA

Ne, atendu! Kunprenu memoraĵon de mi.

(Ŝi iras al la skribotablo kaj malfermas la tirkeston kaj la skatolon kun pistoloj. Ŝi returnas al **Løvborg** kun unu el la pistoloj.)

LØVBORG

(rigardas ŝin) Tiun? Do *tiu* estas la memoraĵo?

HEDDA

(kapklinas malrapide) Vi rekonas ĝin? Iam ĝi leviĝis kontraŭ vin.

LØVBORG

Tiam vi estus devinta ĝin uzi.

HEDDA

Jen! Uzu ĝin *vi* nun.

LØVBORG

(metas la pistolon en la brustpoŝon) Dankon!

HEDDA

Kaj en beleco, Ejler Løvborg. Promesu al mi nur tion!

LØVBORG

Adiaŭ, Hedda Gabler. (li eliras tra la pordo de la antaŭĉambro)

(**Hedda** aŭskultas momenton ĉe la pordo. Poste ŝi iras al la skribotablo, kaj elprenas la paketon kun la manuskripto, iom rigardas inter la kovraĵon, duone elprenas kelkajn foliojn kaj rigardas ilin. Poste ŝi kunprenas ĉion kaj eksidas en la apogseĝon apud la forno. La paketon ŝi havas ĉe la sino. Iom poste ŝi malfermas la pordon de la forno kaj poste ankaŭ la paketon.)

HEDDA

(ĵetas unu el la kajeroj en la fajron kaj flustras antaŭen) Nun mi forbruligas vian infanon, Tea!
— Vi kun la krispa hararo! (ĵetas pliajn kajerojn en la fornon) Vian infanon kaj tiun de Ejler Løvborg. (enĵetas la restantajn) Nun bruligas, — nun bruligas mi la infanon.

KVARA AKTO

(La samaj ĉambroj ĉe la **gesinjoroj Tesman**. Estas vespero. La salono estas malluma. La malantaŭa ĉambro estas lumigita de la penda lampo super la tablo tie. La kurtenoj antaŭ la vitra pordo estas kuntiritaj.)

(**Hedda**, nigre vestita, paŝadas sur la planko en la nelumigita ĉambro. Ŝi iras en la malantaŭan ĉambron kaj tie iras maldekstren. Aŭdiĝas kelkaj akordoj de la piano. Poste ŝi ree aperas kaj iras en la salanon.)

(**Berte** envenas de dekstre tra la malantaŭa ĉambro kun lumigita lampo, kiun ŝi metas sur la tablon antaŭ la sofo en la angulo de la salono. Ŝiaj okuloj estas plorŝvelaj, kaj ŝi havas nigrajn bendojn sur la manteleto. Ŝi eliras singardeme dekstren. **Hedda** iras al la vitra pordo, iom tiras la kurtenon flanken kaj rigardas eksteren en la mallumon.)

(Mallonge poste enen de la antaŭĉambro venas **Fraŭlino Tesman**, funebre vestita, kun ĉapelo kaj vualo. **Hedda** iras al ŝi renkonte kaj etendas al ŝi la manon.)

FRAŬLINO TESMAN

Nu, Hedda, jen mi venas en koloroj de funebro. Ĉar nun mia kompatinda fratino finis sian agonion.

HEDDA

Mi jam scias, kiel vi certe vidas. Tesman sendis al mi karton.

FRAŬLINO TESMAN

Jes, li ja promesis. Sed mi tamen opiniis, ke al Hedda, — ĉi tie en la domo de vivo, — ĉi tie devas mi mem raporti pri la morto.

HEDDA

Estas tre ĝentile de vi.

FRAŬLINO TESMAN

Ho, Rina ne devus forpasi ĝuste nun. La domo de Hedda ne devus funebri en tiu ĉi tempo.

HEDDA

(deturnante la temon) Ŝi ja mortis tre trankvile, fraŭlino Tesman?

FRAŬLINO TESMAN

Ho, tiom bele, — tiom pace ŝi fine feliĉiĝis. Kaj aldone tiu nepriskribebla feliĉo, ke ŝi ankoraŭ fojon revidis Jørgen. Kaj povis al li diri la finan adiaŭon. — Ĉu eble li ankoraŭ ne hejmenvenis?

HEDDA

Ne. Li skribis, ke mi ne atendu lin tiom frue. Sed bonvolu eksidi.

FRAŬLINO TESMAN

Ne dankon, kara — benita Hedda. Mi vere emus. Sed mi ne havas sufiĉe da tempo. Nun mi devas prizorgi ŝin kaj beligi tiel kiel mi povas. Vere bela ŝi venu en sian tombon.

HEDDA

Ĉu ne mi povas pri io helpi?

FRAŬLINO TESMAN

Ho, ne pensu pri tio! Tiajn aferojn Hedda ne devas tuŝi per siaj manoj. Kaj ankaŭ ne al ili ligi siajn pensojn. Almenaŭ ne dum tiu ĉi tempo, certe ne.

HEDDA

Ho, la pensoj, — ili ne lasas sin tiel regi —

FRAŬLINO TESMAN

(daŭrigante) Ja, bona Dio, tiel fariĝas en tiu ĉi mondo. Hejme ĉe mi ni nun kudros lintolon por Rina. Kaj mi opinias ke ankaŭ ĉe vi oni baldaŭ kudros. Sed tio estos de alia speco, tio, — dankon al Dio!

(Jørgen Tesman envenas de la antaŭĉambro.)

HEDDA

Nu, estas bone ke vi fine revenas.

TESMAN

Ĉu vi estas ĉi tie, onklino Julle? Ĉe Hedda? Jen imagu!

FRAŬLINO TESMAN

Mi ĵus intencis foriri, mia kara knabo. Nu, ĉu vi sukcesis fari ĉion, kion vi promesis al mi?

TESMAN

Ne, mi vere timas, ke mi forgesis la duonon. Mi devas denove enkuri ĉe vi morgaŭ. Ĉar hodiaŭ mia kapo estas kvazaŭ konfuzita. Mi ne povas kunteni la pensojn.

FRAŬLINO TESMAN

Sed kara Jørgen, vi ne devas reagi tiel.

TESMAN

Do? Kiel do, vi opinias?

FRAŬLINO TESMAN

Vi devas ami la funebbron. Esti ĝoja pro tio kio okazis. Kia mi estas.

TESMAN

Ho jes, jes. Vi pensas pri Rina, ĉu?

HEDDA

Fariĝos solece por vi nun, fraŭlino Tesman.

FRAŬLINO TESMAN

La unuajn tagojn, jes. Sed ne daŭros longe, espereble. Mi intencas, ke la ĉambreto de karmemora Rina ne restu malplena.

TESMAN

Nu? Kiun vi volas, ke enloĝiĝu? Ĉu?

FRAŬLINO TESMAN

Nu, troviĝas ĉiam iu aŭ alia malsana kompatindulino, kiu bezonas zorgadon kaj flegon, bedaŭrinde.

HEDDA

Ĉu vi vere ankoraŭfoje volas preni sur vin tian krucon?

FRAŬLINO TESMAN

Krucon! Dio pardonu vin, infano, — ne estis ja kruco por mi.

HEDDA

Sed se nun venus fremda homo kaj —

FRAŬLINO TESMAN

Ho, kun malsanaj homoj oni baldaŭ amikiĝas. Kaj mi ja vere bezonas iun por kiu vivi, ankaŭ mi. Nu, dankon al Dio, — en via domo eblus ankaŭ okazi io aŭ alia por laborigi la manojn de maljuna onklino.

HEDDA

Ho, ne parolu pri niaj aferoj.

TESMAN

Jes, imagu kiom bonege ni tri povus kune vivi, se —

HEDDA

Se —?

TESMAN

(maltrankvila) Ho, nenio. Certe ordiĝos. Esperu tion. Ĉu?

FRAŬLINO TESMAN

Ja, ja. Vi du certe havas ion priparolendan, mi komprenas. (ridetas) Kaj Hedda eble havas ion rakontindan por vi, Jørgen. Adiaŭ! Nun mi devas hejmeniri al Rina. (turnas sin ĉe la pordo) Bona Dio, kiel strange imagi! Nun Rina estas ĉe mi kaj ĉe karmemora Jochum samtempe.

TESMAN

Jes, jen imagu, onklino Julle! Ĉu?

(Fraŭlino Tesman eliras tra la pordo de la antaŭĉambro.)

HEDDA

(sekvas **Tesman** per la okuloj malvarme kaj explore) Mi vere kredas, ke la morto atakas *vian* koron pli ol ŝian.

TESMAN

Ho, ne estas sole jena morto. Estas Ejlert pro kiu mi estas tiom maltrankvila.

HEDDA

(rapide) Ĉu estas io nova pri li?

TESMAN

Mi intencis kuri supren al li nun posttagmeze, kaj diri al li, ke la manuskripto estas sendifekta.

HEDDA

Nu? Vi ne renkontis lin?

TESMAN

Ne. Li ne estis hejme. Sed poste mi renkontis sinjorinon Elvsted, kaj ŝi diris, ke li estis ĉe ni frue ĉi-matene.

HEDDA

Jes, tuj post via foriro.

TESMAN

Kaj, laŭdire, li estis disŝirinta la manuskripton. Ĉu?

HEDDA

Jes, li tion asertis.

TESMAN

Sed, bona Dio, do li estis ja tute freneza! Kaj sekve vi ne kuraĝis redoni ĝin al li, Hedda?

HEDDA

Ne, li ĝin ne ricevis.

TESMAN

Sed vi certe diris al li, ke ni ĝin havas?

HEDDA

Ne. (rapide) Eble vi tion diris al sinjorino Elvsted?

TESMAN

Ne, tion mi ne volis. Sed al li mem vi estus tion dirinta. Imagu, se li en malespero ekpensus sin meti en danĝeron de morto! Donu al mi la manuskripton, Hedda! Mi tuj kuros kun ĝi al li. Kie vi havas la paketon?

HEDDA

(malvarma kaj nemoviĝanta, sin apogante al la apogseĝo) Mi ĝin ne plu havas.

TESMAN

Vi ĝin ne plu havas! Pro la ĉielo kion vi aludas per tio!

HEDDA

Mi forbruligis ĝin — ĉion.

TESMAN

(eksaltas en timo) Forbruligis! Forbruligis la manuskripton de Ejler!

HEDDA

Ne krii tiel. La servistino povus eble vin aŭdi.

TESMAN

Forbruligis! Sed bona Dio —! Ne, ne, — tio estas tute neebla!

HEDDA

Jes, sed tiel tamen estas.

TESMAN

Sed ĉu vi mem komprenas, kion vi faris, Hedda! Estas ja kontraŭleĝa traktado de trovitaĵo. Jen imagu! Jes, demandu nur al asesoro Brack, kaj vi aŭdos.

HEDDA

Estas pli konsilinde, ke vi ne parolu pri tio, — nek al la asesoro, nek al iu alia.

TESMAN

Sed kiel povis vi ekpensi iun tiagrade neaŭditan agon! Kiel povis vi ekhavi tiun ideon? Kiel tia koncepto obsedis vin? Respondu al mi pri tio. Ĉu?

HEDDA

(subpremas preskaŭ nerimarkeblan rideton) Mi tion faris por vi, Jørgen.

TESMAN

Por mi!

HEDDA

Kiam vi revenis hejmen ĉi-matene kaj rakontis, ke li legis por vi —

TESMAN

Jes, jes, kaj kio jen?

HEDDA

Tiam vi konfesis, ke vi enviis al li lian verkon.

TESMAN

Ho Dio, ne prenu tion laŭlitere —.

HEDDA

Tamen. Mi ne povis toleri la penson, ke iu alia superombru vin.

TESMAN

(kun ekkrio inter dubo kaj ĝojo) Hedda, — ho, ĉu estas vero, kion vi diras! — Tamen, — tamen — tiel mi neniam antaŭe spertis vian amon. Jen imagu!

HEDDA

Nu, do estas plej bone ke vi eksciu — ke ĝuste en tiu ĉi tempo — (impete, interrompante) Ne, ne, — vi povas pridemandi ĉe onklino Julle. Kaj certe ŝi donos al vi informon.

TESMAN

Ho, mi preskaŭ kredas ke mi komprenas vin, Hedda! (kunfrapas la manojn) Eja, bona Dio, vi —, ĉu tio estus ebla! Ĉu?

HEDDA

Ne kriu tiel. La servistino povus aŭdi vin.

TESMAN

(ridante en senrega ĝojo) La servistino! Ne, nun vi estas vere amuzega, Hedda! La servistino, — tiu estas ja Berte, tiu! Mi mem iros tion rakonti al Berte.

HEDDA

(premegas la manojn kiel en malespero) Ho, mi krevos, — mi krevos en ĉio ĉi!

TESMAN

En kio do, Hedda? Ĉu?

HEDDA

(malvarme, sinrege) En ĉio tio — ridinda, — Jørgen.

TESMAN

Ridinda? Ke mi estas tiom ĝojega. Sed tamen —. Eble ne estas saĝe, ke mi ion diru al Berte.

HEDDA

Ho ja, — kial ne ankaŭ tio?

TESMAN

Ne, ne, ankoraŭ ne. Sed onklino Julle nepre devas tion scii. Kaj ankaŭ *tio* ke vi komencis nomi min Jørgen! Jen imagu. Ho, onklino Julle, ŝi fariĝos ege ĝoja, — ege ĝoja!

HEDDA

Kiam ŝi aŭdos ke mi forbruligis la paperojn de Ejler Løvborg — por vi?

TESMAN

Ne, jen vere! Tion pri la paperoj, tion kompreneble neniu devas ekscii. Sed ke vi forbruligas por mi, Hedda, — en tiu scio vere ankaŭ onklino Julle partoprenu! Cetere mi ŝatus scii, mi, ĉu tia sinteno estas kutima ĉe junaj edzinoj? Ĉu?

HEDDA

Vi devas demandi al onklino Julle ankaŭ pri *tio*, mi opinias.

TESMAN

Jes, tion mi certe okaze faros. (denove aspektas maltrankvile kaj hezitante) Tamen, — tamen, la manuskripto? Bona Dio, estas ja tamen terure pensi pri la kompatinda Ejler.

(**Sinjorino Elvsted**, vestita kiel je la unua vizito, kun ĉapelo kaj supervestoj, envenas tra la pordo de la antaŭĉambro.)

ELVSTED

(salutas rapide kaj diras ekscitite) Ho, kara Hedda, ne ofendiĝu pro tio, ke mi revenas.

HEDDA

Kio okazis al vi, Tea?

TESMAN

Ĉu denove estas io pri Ejler Løvborg? Ĉu?

ELVSTED

Ho jes, — mi terure timas, ke akcidento okazis al li.

HEDDA

(prenas ŝian brakon) Ho, — vi tion kredas!

TESMAN

Ne do. bona Dio, — kial vi povas ekpensi pri tiaĵo, sinjorino Elvsted!

ELVSTED

Ja, ĉar mi aŭdis, ke oni parolis pri li en la pensiono, — ĝuste kiam mi envenis. Ho, disvastiĝas ja la plej nekredeblaj onidiroj pri li en la urbo hodiaŭ.

TESMAN

Jes, imagu, tion ankaŭ mi aŭdis! Kaj tamen mi povas atesti, ke li iris rekte hejmen kaj kuŝigis sin. Jen imagu!

HEDDA

Nu, — kion oni diris en la pensiono?

ELVSTED

Ho, mi eksciis nenion. Aŭ ĉar ili nenion certe sciis aŭ —. Ili silentiĝis, kiam ili min vidis. Kaj demandi mi ne kuraĝis.

TESMAN

(maltrankvile paŝadante) Ni esperu — ni esperu, ke vi misaŭdis, sinjorino Elvsted!

ELVSTED

Ne, ne, mi estas certa, ke pri li oni parolis. Kaj jen mi aŭdis, ke oni ion menciis pri malsanulejo aŭ —

TESMAN

Malsanulejo!

HEDDA

Ne, — tio do vere neblas!

ELVSTED

Ho, mi morte timas pro li. Kaj sekve mi supreniris al lia loĝejo, kaj serĉis lin *tie*.

HEDDA

Ĉu vere vi *povis* decidigi vin al tio, Tea!

ELVSTED

Jes, kion do mi alie farus? Ĉar ŝajnis al mi, ke mi ne plu povis elteni tiun necertecon.

TESMAN

Sed vi ne renkontis lin? Ankaŭ vi ne? Ĉu?

ELVSTED

Ne. Kaj la aliaj loĝantoj nenion sciis pri li. Li ne estis hejme de post hieraŭ posttagmeze, ili diris.

TESMAN

Hieraŭ! Imagu, ke ili povis tion diri!

ELVSTED

Ho, ŝajnas al mi, ke devas esti okazinta iu akcidento al li!

TESMAN

Vi, Hedda, — ĉu mi iru urben, kaj tie informiĝu pri li en diversaj lokoj —?

HEDDA

Ne, ne, vi ne impliku vin en tio ĉi.

(**Asesoro Brack**, kun ĉapelo en la mano, envenas tra la pordo de la antaŭĉambro, kiun **Berte** malfermas kaj poste malantaŭ li fermas. Li aspektas serioze kaj salutas silente.)

TESMAN

Ho, jen vi, kara Asesoro? Ĉu?

BRACK

Jes, mi nepre devis viziti vin ĉivespere.

TESMAN

Mi povas vidi laŭ via aspekto, ke vi ricevis mesaĝon de onklino Julle.

BRACK

Ankaŭ tiun mi ricevis, jes.

TESMAN

Ĉu ne estas malĝojige? Ĉu?

BRACK

Nu, kara Tesman, tio estas kiel oni tion konceptas.

TESMAN

(rigardas lin necerte) Ĉu estas okazinta io alia?

BRACK

Jes, vere estas.

HEDDA

(ekscitita) Io malĝojiga, asesoro Brack?

BRACK

Ankaŭ tio laŭkoncepte, Sinjorino.

ELVSTED

(senvole ekĝemas) Ho, estas io pri Ejler Løvborg!

BRACK

(iom rigardas ŝin) Kial Sinjorino ekpensas pri *tio*? Ĉu eble Sinjorino jam ion scias —?

ELVSTED

(konfuzita) Ne, ne, mi tute nenion scias; sed —

TESMAN

Sed bona Dio, diru do!

BRACK

(ŝultrotiras) Nu, — bedaŭrinde, — Ejler Løvborg estas portita al la malsanulejo. Li certe jam estas mortonta.

ELVSTED

(ekkrias) Ho Dio, ho Dio —!

TESMAN

En la malsanulejo! Kaj eĉ mortonta!

HEDDA

(senvole) Tiom rapide do —!

ELVSTED

(lamentante) Kaj ni, kiuj disiĝis sen repaciĝo, Hedda!

HEDDA

(flustras) Sed, Tea, — Tea do!

ELVSTED

(sen atenti ŝin) Mi devas iri al li! Mi devas vidi lin en vivo.

BRACK

Vi neniel povas, Sinjorino. Neniu estas permesata enveni al li.

ELVSTED

Ho, sed diru do al mi nur tion, kio okazis al li! Kio do estas?

TESMAN

Jes, ĉar li kredeble ne mem —! Ĉu?

HEDDA

Jes, mi certas ke li mem faris.

TESMAN

Hedda, — kial vi povas —!

BRACK

(kiu konstante ŝin rigardas) Bedaŭrinde vi ĝuste divenis, sinjorino Tesman.

ELVSTED

Ho, kiom terure!

TESMAN

Li mem do! Jen imagu!

HEDDA

Sin pafis!

BRACK

Ankaŭ nun vi ĝuste divenis, Sinjorino.

ELVSTED

(provas sin regi) Kiam tio okazis, sinjoro Asesoro?

BRACK

Nun, posttagmeze. Inter la tria kaj la kvara.

TESMAN

Sed bona Dio, — kie li do tion faris? Ĉu?

BRACK

(iom necerta) Kie? Jes, kara, — eble li tion faris en sia loĝejo.

ELVSTED

Ne, tiel ne povas esti. Ĉar tie mi enrigardis inter la sesa kaj la sepa.

BRACK

Nu, do en iu alia loko. Tion mi ne precize scias. Mi nur scias, ke oni trovis lin —. Li estis sin pafinta — tra la brusto.

ELVSTED

Ho, kiom terure imagi! Jen ke pri li tiel finiĝis!

HEDDA

(al **Brack**) Ĉu estas tra la brusto?

BRACK

Jes, — kiel mi diras.

HEDDA

Do ne tra la tempio?

BRACK

Tra la brusto, sinjorino Tesman.

HEDDA

Ja, ja, — la brusto estas ankaŭ bona.

BRACK

Kiel, Sinjorino?

HEDDA

(repuŝante) Ho ne, — nenio.

TESMAN

Kaj la vundo estas vivdanĝera, vi diras? Ĉu?

BRACK

La vundo estas absolute mortiga. Verŝajne jam estas finite pri li.

ELVSTED

Ja, Ja, tion mi antaŭsentis! Estas finite! Finite! Ho, Hedda —!

TESMAN

Sed diru al mi, — kie vi eksciigis pri ĉio tio?

BRACK

(abrupte) Tra iu el la policistoj. Iu kun kiu mi interparolus.

HEDDA

(laŭte) Fine heroaĵo!

TESMAN

(timigita) Dio gardu min, — kion vi diras, Hedda!

HEDDA

Mi diras, ke en tio ĉi estas beleco.

BRACK

Hm, sinjorino Tesman —

TESMAN

Beleco! Ne, jen imagu!

ELVSTED

Ho, Hedda, kiel vi do povas paroli pri beleco en tiaĵo!

HEDDA

Ejlert Løvborg faris la saldon pri sia vivo. Li kuraĝis tion fari, kio — kio estis farenda.

ELVSTED

Ne, neniel kredu, ke tiel okazis! Kion li faris, tion li faris en deliro.

TESMAN

En malespero li tion faris!

HEDDA

Tiel ne estas. Pri tio mi estas certa.

ELVSTED

Jes, li faris! En deliro! Ĝuste kiel kiam li disŝiris siajn kajerojn.

BRACK

(ekmiras) La kajerojn? La manuskripton, vi aludas? Ĉu li disŝiris ĝin?

ELVSTED

Jes, tion li faris ĉi-nokte.

TESMAN

(flustras mallaŭte) Ho, Hedda, el tio ni neniam liberiĝos.

BRACK

Hm, estas strange.

TESMAN

(paŝadante sur la planko) Jen imagu, ke Ejlert tiel forlasas la mondon! Kaj ne postlasas tion, kio daŭre famigus lian nomon —

ELVSTED

Ho, se eblus tion rekonstrui!

TESMAN

Jes, imagu, se tio eblus! Mi ne scias kiom mi donus —

ELVSTED

Eblus, sinjoro Tesman.

TESMAN

Kion vi sugestas?

ELVSTED

(serĉas en la poŝo de la robo) Jen, vidu. Mi gardis la foliaĵojn, kiujn li kunportis, kiam li diktis.

HEDDA

(paŝon pli proksimen) Aĥ —!

TESMAN

Ilin vi gardis, sinjorino Elvsted! Ĉu?

ELVSTED

Jen ili estas. Mi kunprenis ilin, kiam mi forvojaĝis. Kaj ili restis en la poŝo —

TESMAN

Ho, permesu al mi rigardi!

ELVSTED

(donas al li amaseton da folietoj) Sed estas tiom konfuzite. Tiom intermiksate.

TESMAN

Imagu, ĉu ni tamen povus trovi vojon en ĝi! Eble kiam ni du helpus unu la alian —

ELVSTED

Ho jes, ni almenaŭ provu —

TESMAN

Ni *plenumu*! Ni *devas* sukcesi! Mi metas mian vivon en tion!

HEDDA

Vi, Jørgen? Vian vivon?

TESMAN

Jes, aŭ pli ĝuste dirite la tutan tempon je mia dispono. Miaj propraj kolektoj, ili kuŝu dume. Hedda, — vi komprenas min? Ĉu? Estas io kion mi ŝuldas al la renomo de Ejler.

HEDDA

Eble tio.

TESMAN

Kaj jen, kara sinjorino Elvsted, ni do al la laboro. Bona Dio, ne utilas kovi sur tio, kio estas okazinta. Ĉu? Ni provu tiom retrovi animan trankvilon, ke —

ELVSTED

Jes, jes, sinjoro Tesman, mi provos kiom eble plej bone.

TESMAN

Nu, venu do ĉi tien. Ni devas tuj ekzameni la noticojn. Kie ni sidu? Ĉi tie? Ne, tie en la malantaŭa ĉambro. Pardonu, kara Asesoro! Venu do kun mi, sinjorino Elvsted.

ELVSTED

Ho Dio, — se nur estus fareble!

(**Tesman** kaj **sinjorino Elvsted** iras en la malantaŭan ĉambron. Ŝi deprenas ĉapelon kaj supervestojn. Ambaŭ sidigas sin ĉe la tablo sub la penda lampo kaj sin profundigas en fervora ekzameno de la paperoj. **Hedda** iras al la forno kaj eksidas sur la apogseĝon. Iom poste **Brack** iras al ŝi.)

HEDDA

(duonlaŭte) Ho Asesoro, — kia liberiĝo estas en tio ĉi pri Ejler Lønborg.

BRACK

Liberiĝo, sinjorino Hedda? Jes, por li ja efektive estas liberiĝo —

HEDDA

Mi pensas, por mi. Liberiĝo scii, ke almenaŭ io kuraĝa povas libervole okazi en tiu ĉi mondo. Io, sur kio falas lumo de spontanea beleco.

BRACK

(ridetas) Hm, — kara sinjorino Hedda —

HEDDA

Ho, mi certe scias, kion vi volas diri. Ĉar vi estas ia fakulo, ankaŭ vi, kiel — nu!

BRACK

(rigardas ŝin firme) Ejlert Løvborg signifis por vi pli ol vi eble volas agnoski por vi mem. Aŭ ĉu mi eraras en tio?

HEDDA

Pri tiaĵo mi ne al vi respondas. Mi nur scias, ke Ejlert Løvborg havis kuraĝon vivi la vivon laŭ sia propra animo. Kaj nun — la heroaĵo! El kiu brilas beleco. Tio, ke li havis forton kaj volon elŝiri sin el la vivofesteno — tiom frue.

BRACK

Mi bedaŭras, sinjorino Hedda, — sed mi estas devigata tiri vin el bela iluzio.

HEDDA

Iluzio?

BRACK

El kiu vi tamen baldaŭ elŝiriĝus.

HEDDA

Kaj kiu estas do tiu?

BRACK

Li ne mortpafis sin mem — libervole.

HEDDA

Ne libervole!

BRACK

Ne. La afero pri Ejlert Løvborg ne estas tia, kia mi ĝin prezentis.

HEDDA

(emociita) Ĉu vi ion prisilentis? Kaj kion?

BRACK

Pro la kompatinda sinjorino Elvsted mi iomete ŝanĝis la esprimojn.

HEDDA

Kiujn do?

BRACK

Unue tiun, ke li jam vere estas morta.

HEDDA

En la malsanulejo.

BRACK

Jes. Kaj sen regajni konscion.

HEDDA

Kion pli vi prisilentis?

BRACK

Tion, ke la evento ne okazis en lia ĉambro.

HEDDA

Nu, tio povas ja esti sufiĉe indiferenta.

BRACK

Ne tute. Ĉar mi al vi diru, — Ejler Lønborg troviĝis mortpafita en — la buduaro de fraŭlino Diana.

HEDDA

(volas eksalti, sed refalas) Neeblas, asesoro Brack! Tie li ne denove troviĝus hodiaŭ!

BRACK

Li estis tie hodiaŭ posttagmeze. Li venis por postuli ion, kion oni estus forpreninta de li. Parolis konfuzite pri infano, kiu malaperis —

HEDDA

Aĥ, — tial do —

BRACK

Mi pensis, ke eble povus esti lia manuskripto. Sed tiun li ja mem neniigis, mi aŭdas. Do eble estis lia poŝbiletujo.

HEDDA

Eble estis ĝi. — Kaj tie, — tie oni trovis lin.

BRACK

Jes, tie. Kun elpafita pistolo en la brustpoŝo. La kuglo trafis lin mortige.

HEDDA

En la brusto, — jes.

BRACK

Ne, — ĝi trafis lin en la abdomenon.

HEDDA

(ekrigardas lin kun esprimo de abomeno) Aldone tio! Ho ridindaĵo kaj abomenaĵo, kiuj suprenmetas sin kiel malbenon sur *ĉion*, kion mi nur tuŝas.

BRACK

Aldoniĝas ankaŭ io alia, sinjorino Hedda. Io, kion oni ankaŭ klasifiku sub la fia.

HEDDA

Kaj kio estas tio?

BRACK

La pistolo, kiun li ĉe si havis —

HEDDA

(senspire) Nu! Kio pri ĝi!

BRACK

Ĝin li devas esti ŝtelinta.

HEDDA

(eksaltas) Ŝtelinta! Ne estas vero! Tion li ne faris.

BRACK

Nenio alia eblas. Li certe estas ĝin ŝtelinta —. Ŝ-ŝt!

(**Tesman** kaj **sinjorino Elvsted** ekstaris ĉe la tablo en la malantaŭa ĉambro kaj venas en la salonon.)

TESMAN

(kun la paperoj en ambaŭ manoj) Aŭdu, Hedda, — preskaŭ neeblas por mi vidi tie sub la penda lampo. Jen imagu.

HEDDA

Jes, mi imagas.

TESMAN

Ĉu povus ni sidi ĉe via skribotablo. Ĉu?

HEDDA

Volonte. (rapide) Ne, atendu! Lasu min unue iom ordigi.

TESMAN

Ho, tion vi tute ne bezonas, Hedda. Estas sufiĉe da loko.

HEDDA

Ne, ne, lasu min nur ion forigi, mi diras. Porti tion ĉi tien sur la pianon dume. Jen do!

(Ŝi tiras objekton, kovritan de notfolioj, el sub la bretaro, almetas pliajn notfoliojn, kaj portas ĉion maldekstren en la malantaŭan ĉambron. **Tesman** metas la paperfoliojn sur la skribotablon kaj translokigas tien la lampon de la tablo en la angulo. Li kaj **sinjorino Elvsted** eksidas kaj rekomencas la laboron. **Hedda** revenas.)

HEDDA

(malantaŭ la seĝo de **sinjorino Elvsted**, mole palpante ŝiajn harojn) Nu, dolĉa Tea, — ĉu eblas pri la monumento de Ejler Løvborg?

ELVSTED

(rigardas ŝin senespere) Ho Dio, — certe fariĝos ege malfacile trovi sistemon.

TESMAN

Ni devas kapabli. Estas la sola vojo. Kaj ordigi la paperojn de aliuloj, — tio estas ĝuste io por kio mi taŭgas.

(**Hedda** iras al la forno kaj eksidas sur unu el la taburetoj. **Brack** staras super ŝi, apoganta al la apogseĝo.)

HEDDA

(flustras) Kion vi diris pri la pistolo?

BRACK

(mallaŭte) Ke li nepre estas ĝin ŝtelinta.

HEDDA

Kial ĝuste ŝtelinta?

BRACK

Ĉar ĉiu alia klarigo devas esti neebla, sinjorino Hedda.

HEDDA

Ĉu?

BRACK

(rigardas ŝin iom ekzamene) Ej lert Løvborg kompreneble estis ĉi tie hodiaŭ matene. Ĉu ne?

HEDDA

Jes.

BRACK

Vi estis sola kun li, ĉu?

HEDDA

Jes, momenton.

BRACK

Ĉu vi ne forlasis la ĉambron, dum lia ĉeesto?

HEDDA

Ne.

BRACK

Pripensu. Ĉu vi ne eliris momenton?

HEDDA

Jes, eble mallongan momenton — eksteren en la antaŭĉambron.

BRACK

Kaj kie vi dume havis vian pistolskatolon?

HEDDA

Ĝi estis ene en —

BRACK

Nu, sinjorino Hedda?

HEDDA

La skatolo staris tie sur la skribotablo.

BRACK

Ĉu vi poste rigardis ĉu ambaŭ pistoloj estas tie?

HEDDA

Ne.

BRACK

Ankaŭ ne estas necese. Mi vidis tiun pistolon, kiun Løvborg havis ĉe si. Kaj mi tuj rekonis ĝin de hieraŭ. Kaj ankaŭ de pli frue.

HEDDA

Ĉu vi eble havas ĝin?

BRACK

Ne, la polico ĝin havas.

HEDDA

Kion la polico faros pri la pistolo?

BRACK

Serĉos sciiĝon pri la posedanto.

HEDDA

Ĉu vi kredas, ke oni tion povas malkaŝi?

BRACK

(klinas sin super ŝi malsupren kaj flustras) Ne, Hedda Gabler, — ne tiom longe kiom mi silentas.

HEDDA

(rigardas lin timeme) Kaj se vi ne silentas, — kio do?

BRACK

(ŝultrotiras) Estas ja ĉiam la klarigo, ke la pistolo estas ŝtelita.

HEDDA

(firme) Prefere morti!

BRACK

(ridetas) Tiaĵon oni diras, sed oni tion ne faras.

HEDDA

(ne respondante) Kaj se la pistolo do ne estas ŝtelita. Kaj la posedanto troviĝas. Kio tiam sekvos?

BRACK

Ja, Hedda, — tiam sekvos la skandalo.

HEDDA

La skandalo!

BRACK

La skandalo, jes, — kiun vi tiom morte timas. Kompreneble vi estos vokata antaŭ la tribunalon. Kaj vi kaj fraŭlino Diana. Ŝi devas ja klarigi kiel ĉio okazis. Se estis akcidenta pafo aŭ intenca mortigo. Ĉu li tirus la pistolon el la poŝo por ŝin minaci? Kaj jen la kuglo pafiĝus? Aŭ ĉu ŝi tirus la pistolon el lia mano, kaj jen mortpafus lin, kaj remetis la pistolon en lian poŝon? Ŝi certe kapablas tion fari. Ĉar ŝi estas fortika knabineto, tiu sama fraŭlino Diana.

HEDDA

Sed ĉio ĉi abomena ne koncernas *min*.

BRACK

Ne. Sed vi devas respondi tiun demandon: Kial vi donis la pistolon al Ejler Løvborg? Kaj kiujn konkludojn oni tiros el la fakto, ke vi al li ĝin donis?

HEDDA

(mallevas la kapon) Vere. Pri tio mi ne pensis.

BRACK

Nu, feliĉe neniu danĝero estas, tiom longe kiom mi silentas.

HEDDA

(rigardas supren al li) Mi do estas sub via potenco, Asesoro. De nun vi regas mian korpon kaj animon.

BRACK

(flustras pli mallaŭte) Plej kara Hedda, — kredu min — mi ne misuzos la staton.

HEDDA

Tamen same sub via potenco. Dependanta de viaj postuloj kaj volo. Mallibera. Do mallibera! (ekstaras impete) Ne, — tiun penson mi ne eltenos! Neniam.

BRACK

(rigardas ŝin duone mokante) Kutime oni rezignas antaŭ la neevitebleco.

HEDDA

(reciprokas lian rigardon) Ja, eble.

(Ŝi iras al la skribotablo.)

HEDDA

(subpremas senperan rideton kaj imitas la akcenton de Tesman) Ĉu vi do sukcesas, Jørgen? Ĉu?

TESMAN

Dio scias, kara. Estos laboro almenaŭ de pluraj monatoj, tio ĉi.

HEDDA

(kiel antaŭe) Jen imagu! (rapidas leĝere per la manoj tra la hararo de **sinjorino Elvsted**) Ĉu ne estas strange por vi, Tea? Nun vi sidas ĉi tie kune kun Tesman — ĝuste kiel vi antaŭe sidis kune kun Ejler Lønborg.

ELVSTED

Ho Dio, se mi nur povus inspiri ankaŭ vian edzon.

HEDDA

Ho, tio certe venos — kun la paso de tempo.

TESMAN

Ja, sciu, Hedda, — jam vere ŝajnas al mi, ke mi komencas ion tian percepti. Sed retrovu seĝon ĉe la asesoro.

HEDDA

Ĉu estas nenio, por kio vi du povas uzi min en tio?

TESMAN

Ne, absolute nenio. (turnas la kapon) De nun vi vere devas esti tiom afabla teni al Hedda kompanion, kara Asesoro!

BRACK

(kun ekrigardo al Hedda) Estos por mi ega plezuro.

HEDDA

Dankon. Sed ĉivespere mi estas laca. Mi volas iom kuŝi tie ene sur la sofo.

TESMAN

Jes, tion faru, kara. Ĉu?

(**Hedda** iras en la malantaŭan ĉambron kaj kuntiras la kurtenojn post si. Mallonga paŭzo. Subite oni aŭdas, ke ŝi ludas sovaĝan dancmelodion tie ene sur la piano.)

ELVSTED

(eksaltas de sur la seĝo) Hu, kio do estas!

TESMAN

(kuras al la pordaperturo) Sed, plej kara Hedda, — ne ludu do por danco ĉivespere!
Memoru do onklinon Rina! Kaj ankaŭ Ejlert!

HEDDA

(metas la kapon antaŭen inter la kurtenoj) Kaj ankaŭ onklinon Julle. Kaj la tutan aron. — De nun mi estos silenta.

(Ŝi denove fermas post si.)

TESMAN

(ĉe la skribotablo) Ŝi eble suferas vidi nin ĉe tiu ĉi doloriga laboro. Sciu, sinjorino Elvsted, — vi transloĝiĝu al onklino Julle. Kaj jen mi venos en la vesperoj. Kaj ni povos sidi laborante *tie*. Ĉu?

ELVSTED

Jes, estus eble pli bone —

HEDDA

(en la malantaŭa ĉambro) Mi bone aŭdas kion vi diras, Tesman. Sed kiel mi pasigu la vesperojn ĉi tie?

TESMAN

(foliumas la paperojn) Ho, asesoro Brack certe estas tiom ĝentila, ke li tamen vizitos vin.

BRACK

(sur la apogseĝo, krietas ĝoje) Kun plezuro ĉiun laŭvican vesperon, sinjorino Tesman! Ni kune certe bone amuziĝu ĉi tie, ni du!

HEDDA

(klare kaj aŭdeble) Jes, ĉu vi ne nutras tiun esperon, Asesoro? Vi, kia sola koko en la korto — —

(Pafo aŭdiĝas tie ene. **Tesman**, **sinjorino Elvsted** kaj **Brack** eksaltas.)

TESMAN

Aj, nun ŝi denove fingrumas la pistolojn.

(Li distiras la kurtenojn kaj kuras enen. **Sinjorino Elvsted** same. **Hedda** kuŝas senviva, sternita sur la sofo. Konfuzo kaj kriado. Konfuzita **Berte** envenas de dekstre.)

TESMAN

(krias al **Brack**) Pafis sin! Pafis sin tra la tempio! Jen imagu!

BRACK

(duone paralizita sur la apogseĝo) Sed Dio kompatu, — tiaĵon oni ja *ne faras!*

*** END OF THE PROJECT GUTENBERG EBOOK HEDDA GABLER: DRAMO EN KVAR
AKTOJ ***

Updated editions will replace the previous one—the old editions will be renamed.

Creating the works from print editions not protected by U.S. copyright law means that no one owns a United States copyright in these works, so the Foundation (and you!) can copy and distribute it in the United States without permission and without paying copyright royalties. Special rules, set forth in the General Terms of Use part of this license, apply to copying and distributing Project Gutenberg™ electronic works to protect the PROJECT GUTENBERG™ concept and trademark. Project Gutenberg is a registered trademark, and may not be used if you charge for an eBook, except by following the terms of the trademark license, including paying royalties for use of the Project Gutenberg trademark. If you do not charge anything for copies of this eBook, complying with the trademark license is very easy. You may use this eBook for nearly any purpose such as creation of derivative works, reports, performances and research. Project Gutenberg eBooks may be modified and printed and given away—you may do practically ANYTHING in the United States with eBooks not protected by U.S. copyright law. Redistribution is subject to the trademark license, especially commercial redistribution.

START: FULL LICENSE